

JOSEPH ROTH

la ribelo

Romano

SAT-Brošurservo
1988 * 18 FF

la ribelo

Romano
de
JOSEPH ROTH

Tradukita de TARSEN REGIS

KOREKTENDOJ

p.53, linio +11 : "porceltelero" devas esti "porcelantelero"

*Tiu ĉi romano aperas en la kadro de SAT-Broŝurservo
Plenan katalogon eblas ricevi de
Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque*

En la komenco de la romaneto la aŭstria verkisto Joseph Roth prezentas al ni invalidon, kiu perdis kruron dum sia militservo kaj pro tio ricevis premion. En la hospitalo li nun atendas sian liberigon. Pri homoj, kiuj insultas la registaron, li retrovis la vorton "paganoj", ĉar al li la registaro estas io, kio regas super la lando, kiel dio super la tero. Li mem taksas sin feliĉulo, elstarulo, ĉar ne ĉiu militvundito ricevis premion. La aliaj do insultu kaj tial sin enabismigu, lin Andreas Pum la registaro subtenos. Li revas pri gurdolicenco. Eksciinte, ke nur tremadantoj rajtas gurdolicencon, li ŝajnigas sin antaŭ la kuracista komiono tremadanto, komentante tion al si mem: "Miraklo okazis. Miraklo okazis."

Post sia ekŝigo el la hospitalo li gurdiste enspezas siajn vivrimedojn. En sia imago li samniveligas la gurdistan laboron kun tiu de oficisto, ĉar li ja ludas la nacian himnon kaj kantojn, kiuj altigas la por-patrujan spiriton. Hejmenveninte li okupiĝas pri la defendpretaj kaj laŭtvoĉaj virinoj, kiuj lin forpelas el la domoj kaj kortoj. Posedi tian virinon kaj nomi unu el ili sia propra iĝas lia plej potenca deziro. Lia hejmo estas loĝejo, konsistanta el unu ĉambro, en kiu krom li ankoraŭ loĝas Willi kaj Klara, senlaborulo kaj dua kasistino en malgranda kafejo; ŝi eĉ nokte kontribuas al la malgrandaj enspezoj de ambaŭ. Ĉar Willi la restadan tempon de Andreas per la vortoj: Ordo devas esti! severe reglamentas, Andreas nur nokte vizitas sian kuŝejon. Sed tio ne ĝenas lin, ĉar li kun certo progresos sub la registara egido. Kaj vere li trafas sur vidvinon, kiu prefere elektas inter la polica subinspektoro kaj li mem. Ili geedziĝas aŭ pli vere ŝi prenas lin je ambaŭflanka avantaĝo. Komune ili nun vivas, la tagoj venas kaj malaperas, formas semajnojn, monatojn, kaj ĉio aspektas eksterordinare feliĉa.

Sed subite kiel fulmo el serena ĉielo ŝanĝas evento la vivon kaj la primondan opinion de Andreas Pum. Iutage nome li renkontas sinjoron Arnold, kiu tute alie pensas pri invalidoj ol Andreas. Tio naskas kverelon, en kies sekvo Andreas devas al policisto enmanigi sian licencon, ĝin ne rericovonte. La malamo en la interno de Andreas Pum kontraŭ sanuloj kaj precipe kontraŭ bonstataj, kontraŭ la servema tramkonduktoro kaj la kruda policisto, kiu ne komprenas, ke ankaŭ Andreas Pum estas oficisto,

krevas tiom abrupte, ke el tio konsekvencas juĝa alvoko al la licencposedanto Andreas Pum. Lia edzino Katharina Blumich postraporte deturniĝas de li, malestimo pri Andreas montriĝas en ŝiaj okuloj. Tuj ŝi "konsiligas" la subinspektoron.

Duonan horon antaŭ la fiksita horo de la juĝa alvoko aperas polica agento, kiu eskortas Andreas al polica demandejo. Tie Andreas ekscias, ke pro sia foresto antaŭ la tribunalo li estas sentencita, kio signifas, ke li devos punsidi ses semajnojn mallibereje. Denova atako kontraŭ la polica komisaro arestigas lin dudek kvar horojn. Ĝemante la komisaro diras: "Senlicencigo!" kaj "La sekvanto!"

Kiel ondoj, ŝutante sin sur la bordajn ŝtonojn, la eventoj katenas Andreas. Post sia restado en la arestejo li transloĝiĝas, kun mallonga interrompo, kiun la denunco de lia edzino finis, en la malliberejon. Tie la mallumo forigas lian blindon. La ĉelaj muroj memorige al li reflektoras lian vivon kaj ties sencon. "Pagano" li estas kaj fieras pri tio. Jen la ribelo - laŭ kiu Roth nomis sian romaneton. Tute alie Andreas nun perceptas la mondon, tute alie li pensas. Sed tiu ŝanĝo postulas forton, multe da forto de Andreas, tiom, ke tiu proceso maljunigas lin. Je la fino de la libro, post ekŝiĝo el la malliberejo, Andreas fariĝas neceseja gardisto en la kafejo "Halali". En la abismo li vivas ĝismorte. Kiel memstara personeco sen obeo al dio, al la registaro aŭ iu alia li vivos plu helpe per tiu libro. Liaj lastaj vortoj antaŭ dio konstatas sume liajn kolektitajn ekkonojn: La kredo je dio (je io krom je siaj propraj kapabloj kaj ebloj) kreas medion, en kiu homoj devas suferi pro malmulto da riĉuloj, medion, en kiu la homoj ne rajtas prosperi. La kredo kaj la akcepto de la ordinaraĵ homoj je potenco super ili realigas la homan mizeron.

Tarsen Regis

I

La barakoj de la milithospitalo numero XXIV situis rande de la urbo. De la trama finstacio ĝis la hospitalo sanulo devintus migri energie duonan horon. La tramo kondukis monden, en la grandan urbon, al la vivo. Sed la loĝantoj de la milithospitalo numero XXIV la traman finstacion ne povis atingi.

Ili estis blindaj aŭ lamaj. Ili lamiris. Ili havis pafdetruitajn spinojn. Ili atendis amputon aŭ estis jam amputitaj. Lastafoje en tre fora tempo ili kontaktis kun la milito. Forgesita estis por ili la dresado; la serĝento; la sinjoro kapitano; la marŝkompanio; la milita pastro; la imperiestra naskiĝtago; la gamelo; la tranĉeo; la sturmo. **Ilia** paco kun la malamiko estis sigelita. Ili jam armis sin por nova milito; kontraŭ la doloroj; kontraŭ la protezoj; kontraŭ la lamaj membroj; kontraŭ la kurbaj dorsoj; kontraŭ la noktoj sen dormo; kaj kontraŭ la sanuloj.

Nur Andreas Pum estis kontenta pri la iro de l' aferoj. Li perdis kruron kaj ricevis premion. Multaj ne posedis premion, kvankam ili perdis pli ol nur unu kruron. Ili estis sen brako kaj kruro. Aŭ ili devis kuŝi ĉiam enlite, ĉar ilia spina medolo estis difektita. Andreas Pum ĝojis, vidante la aliajn suferi.

Li kredis je justa Dio. Tiu disdonis pafojn al la spinaj medoloj, amputojn, sed ankaŭ premiojn laŭmerite. Se oni la aferon pripensis prave, tiukaze la perdo de kruro estis ne tro grava kaj la feliĉo, esti premiito, granda. Invalido rajtis kalkuli je la respekto de la mondo. Premiita invalido je la registara.

La registaro estas io troviĝanta super la homoj, kiel la ĉielo super la tero. Kio venas de ĝi povas esti bona aŭ malbona, sed ĉiam ĝi estas granda kaj superforta, neesplorita kaj neesplorable, kvankam ankaŭ foje-foje komprenebla por ordinaraj homoj.

Ekzistas kamaradoj, kiuj insultas la registaron. Laŭ ilia opinio al ili ĉiam okazas maljustaĵoj. Kvazaŭ la milito ne necesus! Kvazaŭ ĝiaj sekvoj ne memkompreneble devus esti doloroj, amputoj, malsato kaj mizero! Kion ili volis?

Ili havis nek Dion, nek imperiestron, nek patrujon. Ili estis verŝajne paganoj. "Paganoj" estas la plej bona esprimo por homoj, kiuj defendas sin kontraŭ ĉio, kio devenas de la registaro.

Estis varma dimanĉo en aprilo, Andreas Pum sidis sur unu el la blankaj krude ĉarpentitaj benkoj, starigitaj meze sur la gazono antaŭ la hospitalbarakoj. Preskaŭ sur ĉiu benko sidis kune du aŭ tri resaniĝantoj kaj parolis. Nur Andreas Pum sidis sola kaj ĝojis pri la nocio, kiun li trovis por siaj kamaradoj.

Ili estis paganoj, kiel homoj tiaj, sidantaj en pundomo pro falsaj ĵuroj kaj ŝtelo, batmortigo, murdo aŭ eĉ pro rabomurdo. Kial ŝtelis homoj, mortigis, rabis, dizertis ili? Ĉar ili estis paganoj.

Sed ĉi-momente demandate de iu, kiaj estas paganoj, Andreas estus respondinta tiel: ekzemple homoj sidantaj en prizono, kaj ankaŭ tiuj, kiujn oni pro hazardo ankoraŭ ne kaptis. Andreas tre kontentis, ke li retrovis la vorton "paganoj". Tiu vorto sufiĉis al li, ĝi satigis liajn cirklantajn demandojn kaj donis respondon al multaj misteroj. Ĝi liberigis lin de la devo plue mediti kaj turmentigi pri la esplorado de la aliaj. Andreas ĝojis pri la vorto. Kaj samtempe donis ĝi al li la senton de l' supereco pri la kamaradoj, babile sidantaj sur la benkoj. Parte ili havis seriozajn vundojn kaj ne premion. Ĉu ne prave okazis al ili? Pro kio ili insultis? Kial ili malkontentis? Ĉu ili timis pro sia estonteco? Se ili plue spite persistos, ĉi-kaze ili certe pravos pro sia estonteco turmenti sin. Ili fosis ja por si mem la tombojn! Ja pro kio la registaro subtenu siajn malamikojn? Sed lin, Andreas Pum, ĝi certe prizorgos.

Kaj dum la suno sur la sennuba ĉielo rapide kaj rekte alstrebis sian zeniton, iĝante pli kaj pli arda kaj preskaŭ somera, Andreas Pum pensis pri la sekvaj jaroj de sia vivo. La registaro transdonas al li debitejon de poŝtmarkoj aŭ laboron kiel gardisto en ombra parko, aŭ en malvarmeta muzeo. Jen li nun sidas kun sia krucordeno sur la brusto, soldatoj salutas lin, eble preteriranta generalo frapas lian ŝultron, kaj la infanoj havas timon pro li. Sed al ili li ne faras malbonaĵon, li nur estas atentema, por ke ili ne petolu sur la gazanon. Aŭ la homoj venantaj en la muzeon aĉetas ĉe li katalogojn kaj kartojn de artistoj, tamen lin ne rigardante ordinara butikisto sed oficisto. Eble krom tio troveblos ankaŭ vidvino, sen infano aŭ kun

unu, aŭ matura knabino. Bone prizorgata invalido kun pensio ne estas malbona kapto, kaj viroj post la milito estas tre serĉataj.

La hela tono de sonorilo saltetis super la gazono antaŭ la barakoj, anoncante la tagmanĝon. La invalidoj pene levigis kaj ŝanceligis, apogante sin unu sur la alian, en la direkto al la granda, longa, ligna manĝobarako.

Andreas levis kun hasta fervoro sian teren-falintan lambastonon kaj lamiris vigle post la kamaradoj por preterkuri ilin. Li ne vere kredis je iliaj doloroj. Ankaŭ li devis suferi. Kaj tamen - vidu! - kiom li kapablas rapidi, se la sonorilo vokas lin!

Memkompreneble li preterpasas la lamulojn, la blindulojn, la virojn kun la kurbaj spinoj, kies dorsoj estas tiel fleksitaj, ke ili formas paralelan linion al la tero, kiun ili suriras. Ili postvokas al Andreas, sed li ne aŭdos ilin.

Oni denove preparis avenan griaĵon, kiel en ĉiu dimanĉo. La malsanuloj ripetis, kion ĉiudimanĉe ili kutimis diri: Avena griaĵo estas teda. Sed Andreas konsideris ĝin tute ne teda. Li levis la teleron al la lipoj kaj trinkis la reston, multfoje vane provinte kapti ĝin per kulero. La aliaj rigardis al li kaj sekvis heziteme lian ekzemplon. Li longe tenis la teleron antaŭ sia vizaĝo kaj strabis trans la rando al la kamaradoj. Li konstatis, ke la supo bongustis al ili, ke iliaj paroloj pruvigis fanfaronado kaj aroganteco. Ili estas paganoj! - triumfis Andreas kaj demetis la teleron.

La seka legomo, de la aliaj nomata "drataĵo", malpli bongustis al li. Tamen li malplenigis la teleron. Poste li havis la kontentigan senton de plenumita devo, kvazaŭ li estus ĝis brilo polurinta rustan pafilon. Li bedaŭris, ke ne venis kaporalo por kontroli la telerojn. Lia telero estis pura kiel lia konscienco. Sunradio falis sur la porcelanon, kaj ĝi ekbrilis. Aspektis tio kiel oficiala laŭdo de la ĉielo.

Posttagmeze venis la longe jam anoncita Mathilde en flegistina kostumo. Andreas, kiu komandis en sia sekcio la ĉambron, staris rigide ĉe la pordo. La reĝidino donis al li la manon kaj li kliniĝis, kontraŭvole, kvankam li estis planinta resti rigida. Lia lambastono falis teren, la akompanantino de reĝidino Mathilde sin klinis kaj restarigis ĝin.

La reĝidino foriris, post ŝi la ĉefa flegistino, la supera

kuracisto kaj la pastro. "Fia putino!" diris viro el la dua litvico. "Senhonte!" kriis Andreas. La aliaj ridis. Andreas iĝis kolera. Li ordonis : Litojn ordigi, kvankam ĉiuj kovriloj zorge kaj laŭreglamente trifoje estis falditaj. Neniu sin ekmovis. Kelkaj komencis ŝtopi siajn pipojn.

En tiu momento venis ĉefsoldato Lang, inĝeniero, al kiu mankis la dekstra brako kaj antaŭ kiu ankaŭ Andreas montris respekton, kaj diris : "Ne ekscitiĝu, Andreas, ni ja ĉiuj estas povraj diabloj!"

Fariĝis tre silente en la barako; ĉiuj la inĝenieron alrigardis, Lang staris antaŭ Andreas kaj parolis. Oni ne sciis, ĉu li parolis al Andreas, ĉu al la aliaj, aŭ tute nur por si mem. Li rigardis tra la fenestro eksteren kaj diris: "Reĝidino Mathilde estas nun certe tre kontenta. Ankaŭ ŝi finis penplenan tagon. Ŝi vizitas ĉiudimanĉe kvar malsanulejojn. Ĉar ekzistas, tion vi sciu, jam pli da malsanulejoj ol da reĝidinoj kaj pli da malsanuloj ol da sanuloj. Ankaŭ la laŭŝajnaj sanuloj estas malsanaj, multaj tion nur ne scias. Eble ili baldaŭ faros pacon."

Kelkaj ektusis. La viro en la dua litvico, kiu antaŭe diris "fia putino", tuisis laŭte. Andreas lamiris al sia lito, prenis de la ĉekapa breto skatolon da cigaredoj kaj vokis la inĝenieron al si. "Bona cigaredo, sinjoro doktoro!" diris Andreas. Li nomis la inĝenieron "doktoro".

Lang parolis kiel pagano sed ankaŭ kiel ekleziulo. Eble, ĉar li estis tiel klera. Sed ĉiam li pravis. Oni emis kontraŭdiri al li kaj ne trovis argumentojn. Li nepre devis pravi, ĉar ne eblis kontraŭdiri al li.

Vespere la inĝeniero kuŝis vestita sur la lito kaj diris: "Se la landlimoj denove estos malfermaj, mi veturos malproksimen. Ne estos io plu por akiri en Eŭropo."

"Ke ni nur venku en la milito", diris Andreas. "Ĉiuj malvenkos en ĝi", respondis la inĝeniero. Andreas ne komprenis, sed li respektoplene kapjesis, kvazaŭ li devus pravigi Lang.

Dume li en la malo planis resti en la lando kaj vendi artajn poŝtkartojn en muzeo. Li ja konsentis, ke por kleruloj eble ne estas loko. Ĉu la inĝeniero eble fariĝu gardisto en parko?

Andreas ne havis parencojn. Kiam aliaj akceptis vizitojn, li eliris kaj legis libron el la hospitala biblioteko. Ofte li estis jam preskau edziĝanta. Sed la timo, ke li perlaboris tro malmulte por vivteni familion, ĉiam retenis lin peti

la manon de Anny, la kuiristino, de kudristino Amalie, de vartistino Poldi.

Li nur "amikigis" kun ĉiu el la tri. Lia profesio ja vere ne estis io alloga por junaj virinoj. Andreas nokto-gardistis en lignejo ekstere de la urbo, kaj havis nur unufoje semajne liberan tagon. Lia ĵaluza naturo certe estus ĝeninta lian kvietan ĝojon pri ekzakte praktikata deĵoro aŭ tiun tute malebliginta.

Kelkaj dormis kaj ronkis. La inĝeniero legis. "Ĉu mi forŝaltu?" demandis Andreas.

"Jes", diris la inĝeniero kaj formetis la libron.

"Bonan nokton, doktoro", respondis Andreas. Li forŝaltis la lumon. Li demetis en la malhelo siajn vestojn. Lia lambastono apogis sin kontraŭ la muro dekstraflanka. Andreas pensas, antaŭ ol li ekdormas, pri la protezo, promesita al li de la supera kuracisto. Estos senmanka protezo, samtia kiel tiu, kiun kapitano Hainigl portas. Oni eĉ ne rimarkas, ke al li mankas kruro. La kapitano iras libere sen bastono tra la ĉambro, kvazaŭ li havus nur pli mallongan kruron. Protezoj estas grandioza invento de la sinjoregaj moŝtoj, de la registaro, kiu vere por tio ne ŝparas elspezojn. Tion oni devas diri.

II

La protezo ne venis. Anstataŭe venis la malordo, la pereco, la revolucio. Andreas trankviligis nur du semajnojn poste, kiam li konkludis el la gazetoj, el la okazaĵoj kaj el la paroloj de la homoj, ke ankaŭ en respublikoj registaroj estras super la sortoj en la respektivaj landoj. En la grandaj urboj oni pafis kontraŭ la ribelantoj. La paganecaj spartakistoj ne ĉesis tumulti. Verŝajne ili intencis aboli la registaron. Ili ne sciis, kio tiam sekvas. Ili estis malbonaj aŭ malprudentaj. Ili estis pafmortigitaj, tion ili meritis. Ordinaraĵoj ne intermiksiĝu en la aferojn de la prudentaj.

Oni atendis kuracistan komisionon. Ĝi devis decidi pri la pacientaro de la hospitalo, pri la labora nekapablo, pri la provizado de la loĝantoj. La onidiro, ĉi tien flirtinta el aliaj malsanulejoj, opiniis scii, ke nur la tremadantoj restus. Ĉiuj aliaj ricevus monon kaj eventuale gurdolicencon. Pri debitejo de poŝtmarkoj, pri gardista posteno en parko aŭ en muzeo ne povus esti eĉ parolo.

Andreas ekbedaŭris ne esti tremadanto. El la cent kvindek ses malsanuloj de la milithospitalo numero XXIV tremadis nur unu. Ĉiuj enviis lin. Li estis forĝisto, lia nomo Bossi, deveno itala, nigrahara, larĝaŝultra, morna. Lia hararo kreskis peza super la okuloj kaj minacis per tutvizaĝa konkero, inundo sur la mallarĝa frunto kaj vangokovrado, trovi unuigon kun la sovaĝa barbo.

La malsano de Bossi ne mildigis la teruran efikon de lia fizika fortego sed pligrandigis lian hororecon. La mallarĝa frunto sulkiĝis kaj malaperis inter la dikaj brovoj kaj la hararkomenco. Tiel deŝ pli montriĝis la verdaj okuloj, la barbo tremis, oni aŭdis klakadi la dentojn. Liaj kruroj kurbigis, ke la pateloj jen sin tuŝis internaflanke kaj jen forurĝis, kaj la ŝultroj eksupriĝis kaj falis reen, dum la kolosa kapo restis en daŭra, mallaŭta, nea skuado, kiel oni tion vidas ĉe senfortaj kapoj de oldaj virinoj. La seninterrompaj movoj de la korpo malhelpis la forĝiston paroli klare. Li elspulis duonajn frazojn, ĵetis kraĉe vorton, restis momenton silente kaj rekomencis. Ke tiom forta

sovaĝa viro devis tremadi, ŝajnis la ĝenerale konatan malsanon pli terura ol ĝi estis. Granda malĝojo ekkaptis ĉiun, kiu vidis la tremadantan forĝiston. Li estis kiel ŝanceliĝanta koloso sur necerta grundo. Li katenis ĉiujn en atendo pro sia disrompiĝo baldaŭ sekvonta, kaj tamen ne kolapsis. Nekredeble estis, ke viro kun tiaj dimensioj senĉese ŝanceliĝis sen, liberigante sin mem kaj la ĉirkaŭon, eksplodi laste. Eĉ la plej malfeliĉaj invalidoj, havantaj pafdetruitan spinon, falis proksime de Bossi en senklare senfinan timon, kiel oni ĝin sentas antaŭ katastrofoj, kiuj ne volas okazi kaj kies eksplodoj estus liberigo.

Kiu vidis lin, sentis samtempe kaj la neceson plibonigi lian staton kaj la senpotencon. Doloriga estis la ekkono, ke oni ne povis helpi al li, kaj hontiga. Pro honto oni ekdeziris tremadi mem. La malsano infektis la rigardanton. Finfine oni retiriĝis, forfuĝis kaj tamen forgesi la imagon pri la tremadanta giganto ne eblis.

Tri tagojn antaŭ la alveno de la komisiono Andreas Pum iris al la barako de Bossi, kiun li ĝis nun ĉiam evitis. Dudek lamuloj kaj unukruruloj jam kunvenis ĉirkaŭ la forĝisto kaj rigardis al li en pasia silento. Eble ili esperis pri la infekta efiko de la tremado. Ĉiukaze, jen tiu kaj jen tiu eksentis konvulsion en la pateloj, en la kubutoj kaj manartikoj. Ili ne konfesis tion unu al la alia. Kelkaj kaŝe foriris kaj provis tremi, estante momenton solaj.

La suspektema Andreas, kiu antipatis al Bossi pro tute ne difineblaj kaŭzoj, komence pridubis la malsanon. Envio ekkaptis lin kaj unuafoje amaro kontraŭ la registaro, kiu volis rekompenci ĝuste nur la tremadantojn kaj ne la aliajn. Unuafoje lin penetris ekkono pri la maljusto de tiuj, kiuj komandas kaj dekretas. Subite li sentis, ke liaj muskoloj tremis, ke lia buŝo kurbiĝis, ke lia dekstra palpebro ekflagris. Ĝojiga teruro atakis lin. For li lamis. Liaj muskoloj trankviliĝis. Lia palpebro ne flagris plu.

Li ne ekdormis. En malhelo li vestis sin, kaj sen lambastono, por ne vekti la dormantojn, apogante la manojn sur la litkapon kaj la tablon, li svingis sian kruron al la fenestro kaj postvenigis la supran korpduonon. Li vidis parton de la nokta herbejo kaj la briletan blanke pentritan kadron. Pli longe ol horon li staris tiel kaj pensis pri gurdo.

Estas hela somera posttagmezo. Andreas staras en la korto de granda domo, en la ombro de maljuna larĝa arbo. Eble estas tilio. Andreas turnas la krankon de sia gurdo kaj ludas: "Kun mi estis kamarado". Aŭ: "Ele ĉe l' pordego"; aŭ la nacian himnon. Li estas en uniformo. Li portas sian krucon. El ĉiuj malfermitaj fenestroj flugas moneroj volvitaj en silkopapero. Oni aŭdas la mildigitan metalsonon de falinta mono. Infanoj ĉeestas. Servistinoj kliniĝas trans la fenestra sojlo. Ili ignoras la riskon. Andreas ludas.

La luno venis el super la rando de la arbaro, situanta antaŭ la barakoj. Heliĝis. Andreas ektimis, ke liaj kamaradoj subite povus rimarki lin. Li ne volis stari meze en la pala helo. Svinge li denove enlitiĝis.

Du tagojn li vivis kviete kaj enpense.

Venis la komisiono. Ĉiu unuope estis envokata. Viro staris ĉe pordokurteno, ŝirmanta la komisionon kontraŭ la rigardoj de la atendantaj invalidoj. Ĉiufoje forŝovis la viro la kurtenon kaj elĵetis nomon. Ĉiufoje solviĝis senforta korpo el la aliaj, ŝanceliĝis, lamis, bruegis kaj malaperis postkurtene.

La inspektitaj invalidoj ne revenis. Ili devis forlasi la halon tra alia elirejo. Ili ricevis papereton kaj iris tiam siabarakon, pakis siajn aĵojn kaj rampis al la tram-fin-stacio.

Andreas atendis inter la aliaj, li ne partoprenis ilian flustratan interparolon. Li silentis kiel iu, kiu senmaskiĝi ne deziras kaj vivas kun la timo, ke eta rimarko povus tenti lin fordoni sian tutan grandan sekreton.

La viro forŝovis la kurtenon kaj ĵetis la nomon Andreas Pum en la halon. Kelkfoje frapis la lambastono de Andreas Pum kontraŭ la planko, eĥante en la ekesta silento.

Subite Andreas ekstremadis. Li vidis la komisionestron, altrangan oficiron kun ora kolumo kaj blonda barbo. Barbo, vizaĝo kaj uniforma kolumo miksiĝis al amaso da oro kaj blanko. Iu diris: "Plia tremadanto". La apogiloj, kutime sub firma kontrolo de Andreas, per si komencis hopi super la planko. Du skribistoj eksaltis el la seĝoj kaj apogis Andreas.

"Licenco!" ordonis la voĉo de la altranga oficiro. La skribistoj premis Andreas sur seĝon kaj rapidis al sia laboro. Tuj ili jam sidis kurbe super susurantaj paperoj, kaj iliaj plumoj dancis.

Poste Andreas tenis faskon da paperoj en la baraktanta mano kaj lamiris tra la pordo eksteren.

Kiam li komencis paki siajn aĵojn, perdiĝis ĉe li la tremado. Li pensis nur: Miraklo okazis! Miraklo okazis!

Li atendis en la necesejo ĝis ĉiuj kamaradoj malaperis. Tiam li nombris sian monon.

En la tramo la homoj cedis al li sidlokojn. Li elektis la plej bonan el la lokoj al li prezentataj. Li sidis kontraŭe de la enirejo, apud li rektangule trans la vagona mezo kuŝis lia bastono, kiel limpaliso. Ĉiuj rigardis al Andreas.

Li veturis al tiu hospico, kiun li konis.

III

La gurdo devenas de la stratorgena fabriko Dreccoli & Co. Ĝi estas kuboforma kaj kuŝas sur ligna stablo, kiun kunfaldi kaj porti oni povas. Per du rimenoj Andreas portas surdorse sian keston kiel tornistran. Sur la maldekstra flankomuro de la instrumento troviĝas ne malpli ol ok ŝraŭboj. Helpe per tiuj oni elektas la melodiojn. Ok rulojn la kesto entenas, inter ili la nacian himnon kaj la "Lo-relej".

Andreas konservas sian licencon apud la pli granda papermono en monujo, propradire iama leda bindaĵo de notlibro, hazarde trovita en sterkejo, kiun Andreas ĉiutage pasas. Kun licenco enpoŝe la homo paŝas sendanĝere tra la stratoj de ĉi-mondo, en kiu la policistoj spione atendas. Oni ne timas danĝeron, jes, oni ne konas ian. La denuncon de la najbaroj panenviantaj kaj malbonemaj ni ne bezonas atenti. Per poŝtkarto ni sciigas al la publika instanco, pri kio temas. Ni skribas koncize kaj objektivite. Ni, por tiel diri, samnivelas al la publika instanco, dank'al nia licenco. Al ni la registaro koncesiis la privilegion ludi kie kaj kiam al ni plaĉas. Ni rajtas loki nian instrumenton ĉe la vivplenajn stratangulojn. Memkompreneble venas post kvin minutoj la polico. Ne kaŭzo por ekscitiĝi, ĝi do venu! Meze en rondo de streĉe gapantaj homoj ni elpoŝigas nian licencon. La polico respektoplene salutas. Ni ludas plu laŭ ĵusa kaprico: "Knabino, ne ploru!" kaj "Ineto nigrebruna!" kaj "Ĉe la fonto sidis knabo!". Por monduma publiko ni havas valson el la lastjara opereto.

Laŭplaĉe Andreas kapablas tiel rapide turni la krandon, ke la valso iĝas vigla kaj militema kiel marŝo. Foje-foje nome li mem havas bezonon al marŝmelodio, precipe dum tagoj friskaj kaj mornaj, kiam la pluvo sin anoncas per doloroj en la ĉirkaŭaĵo de la amputita kruro. La jam delonge enterigita gambo turmentas lin. La loko ĉe la kruro, kie oni ĝin desegis, bluiĝas. La kuseno en la genukavo de la ligna lambastono ne estas plu sufiĉe mola. Estus necese plenigi ĝin lanuge aŭ pelte. Dum tiaj tagoj Andreas devas

meti kelkajn naztukojn sur la bastonan genukavon. Ili efikas ne kiel vera kompenso.

La doloroj perdiĝis, tuj kiam venis la pluvo. Sed dum pluvaj tagoj Andreas ne bonŝancis akiri grandan profiton. La vakstuko, iam brila, malmola kaj akvorezista, kelkloke fendiĝis. Sulkoj ĉie trafosas la surfacon, formante ion mappsimilan. Se la pluvo sukcesus, kion Dio ĝis nun malhelpis, nome - penetri tra la kovraĵo en la altvaloran lignon kaj tra tiu en la instrumentan internon, tiam la ruloj ne estus plu saveblaj.

Andreas staris, kiam pluvis, dum horoj en unu el tiuj afablaj koridoroj, en kiuj "almozado kaj kolportado" ne estis malpermesataj, en kiuj ne gardis mordema hundo, kaj kie nek grumblema domzorgisto nek ties edzino projektis la sanktecon de la domenirejo. Ho jes, ankaŭ per la ina sekso Andreas kolektis malagrablajn spertojn. Ili tamen ne ĝenis lin revii pri la kruela dolĉeco de nuntempe nekonata virina mano, kiun oni povus nomi sia propra. Andreas ne havis kutiman guston. Ju pli akre virino sakris, fuĝigante lin, ju pli la sono de ŝia voĉo energiis, ju pli la pozo de ŝia figuro minacis, des pli bone ŝi plaĉis al li. Kaj dume li dorsmontrante forlasis la sengasteman pordistinon, ravis lin ŝia virineco samtiom, kiom la neatendita perdo de enspezo lin seniluziigis. Aventurojn tiuspecajn Andreas ofte trapasis. Ili estis liaj ununuraj impresoj. Ili okupis liajn noktojn, kreis al li viziojn pri defendfortaj virinoj, kaj la penso pri ili kiel pitoreska teksto akompanis la plaĵ seriozajn el la melodioj de lia gurdo. Tial povis okazi, ke li konsideris sian instrumenton ne mekanika kaj sian ludadon virtuozece. Jes, la sopiron, la timon, la funebbron de sia animo li enigis en la manon turnantan la krandon, kaj li kredis je sia kapablo ludi laŭ deziro kaj humoro pli forte kaj pli mallaŭte, pli senteme aŭ pli militeme. Li komencis ami sian gurdon, kun kiu li dialogis en lingvo nur de li komprenata. Andreas Pum estis vera muzikanto.

Kiam li intencis distri sin, li rigardis la buntan pikturon sur la dorsflanka vando de la gurdo. La pentraĵo prezentis scenaranĝon de marioneta teatro kaj parton de ties starpartero. Blondaj kaj nigraharaj infanoj skoltis al la scenejo, sur kiu okazis streĉaj eventoj. Sorĉistino kun griza kaj hirta hararo tenis en la mano magian forkon. Antaŭ ŝi staris du infanoj, sur kies kapoj elkreskis kornaro.

Apud la infanoj paŝtis cervino. Nenia dubo, ke tiu pentraĵo plej verŝajne figuris homajn estaĵojn, ensorĉatajn de malbona ino. Neniam pensis Andreas pri la ebleco de tiuj eventoj en reala mondo. Sed ĉar la bildon li ofte devis alrigardi, ĝi fariĝis al li konfida kaj kredebla, kiel iu alia vido ĉiutage ĝuata. Restis preskaŭ nenio fabela en tia ensorĉo. Pli admirinda ol la proceso mem estis la buntaj koloroj, per kiuj ĝi montriĝis. La okuloj de Andreas trinkis la oleecan intenson de tiuj koloroj kaj lia animo ebrigiĝis de la sonora harmonio, kun kiu sanganta ruĝo dronis en sopiran oranĝon de le vespera ĉielo en la fono.

Por tiaj rigardoj li havis hejme sufiĉe da tempo. Certe, por diri ĉion, lia hejmo ne estis unu el tiaspecaj, en kiuj la homo eventuale povus resti la tutan tagon. Pli ĝuste ĝi konsistis el spaco por lito en unu, kiel al Andreas Pumŝajnis, vasta ĉambro. En ĝi dormis krom Andreas ankoraŭ knabino kaj ŝia amiko. Ŝi nomiĝis Klara kaj li Willi. Ŝi estis vickasistino en malgranda kafodomo kaj li senlabora metalturnisto. Nur unufoje semajne Willi laboris kaj ankaŭ tiam ne en sia profesio. Li kondukis tra la stratoj manĉareton por aĉeti gazetan paperon. Vespere li portis siajn varojn al la rubkomercisto. De ĉiu funto Willi ricevis trionon. Ankaŭ la etan kapitalinveston la rubkomercisto pruntedonis al li. Estis logike, ke Willi ne povis vivi de siaj enspezoj. Willi vivis de Klara. Ŝi havis kromajn lukrojn. Li estis ĵaluza. Sed nokte, kiam ili ambaŭ sin trovis sub la maldika kovraĵo, li provis forgesi de kio li vivas, kaj li sukcesis. Dum la sekvanta mateno, li restis kuŝanta, kiam Klara kaj Andreas jam delonge ellitiĝis. Li hejmis la tutan tagon kaj ne permesis al Andreas eniri antaŭ noktigo en la ĉambron. Tion li ĉiam motivigis per la argumento: Ordo devas esti! Ja li estis tre fore de tio eble malami Andreas, la kriplulon. Li ŝatis la ordon. Andreas havis lokon por dormi sed ne loĝejon. Estas tiel aranĝite en la mondo, ke ĉiu rajtas ĝui nur tion, kion li povas pagi.

Ankaŭ Andreas kontentis pri tiu ĉi ordo kaj venis akurate post komenco de vespera krepusko. Li preparis teon sur alkohola kuiraparato. Willi trinkis la alkoholon, malkoncentrita en akvoglaso, Andreas la teon. Li manĝis al tio panon. Foje-foje Willi liveris kolbason. Ĉar okazis ne malofte, ke Willi en agrablaj tagoj, se li entreprenis promenadon, iris al la magazeno por luksnutraĵoj, sur kies pordo la dikventraj kolbasoj kiel pendumitoj pendis surnajle.

Pli allogite de petolemo ol de dumŝtela ĝojo, Willi tiam detranĉis du aŭ tri kolbasojn. Lin stimulis la danĝero kaj la plezuro en la propra lerto. Krome, peko oni devus nomon, se li ne akceptus la sortan ofertan. Andreas iel supozis la devenon de tiuj kolbasoj. Unufoje li demandis, de kie ili venas. "Manĝu kaj silentu", diris Willi "Ordo devas esti."

Je feliĉo tio ne kontraŭagis la ordon, se Andreas, digestante sian vespermanĝon, sin fordonis al la meditado pri la pikturo sur la gurdo. La nefinita ensorĉo, kiun la pentraĵo prezentis, devigis al daŭrigo. Andreas tre volonte pentrus plu. Li metamorfozus ankaŭ la du infanojn, vivantaj en ankoraŭ homa staturo, al cervinoj, aŭ al aliaj bestoj. Estiĝis multaj ebloj. Ĉu oni ne povus metamorfozi infanojn al ratoj? Hu! Ratoj! Aŭ al katoj; al junaj leonoj; al malgrandaj beletaj krokodiloj; al lacertoj; al abeloj; al birdoj - tirili! Al birdoj. Bona pentristo, sperte manipulantanta penikon kaj kolorojn, povus daŭrigi la pikturon.

Tuj post noktomezo venis Klara. Ŝi senvestiĝis. Andreas lasis palpebron fendete malfermita kaj vidis ŝin en nura ĉemizo. Lia rigardo okulumis kiel rabema kato al ŝia nuda mammo, kaj lia koro frapis en la espero, ke ŝultrobendo povus deĝi. Tiam li aŭdis kisojn kaj ĉirkaŭbrakojn kaj ekdormis songante pri fortaj, larĝakoksaj vidvinoj kun balkona brusto.

Ah, li sopiris al ino, al propra ĉambro kaj al larĝa gedza lito plena de ŝvelanta varmo. Nome jam konsiderinde la somero marŝis, antaŭsentigante la vintran kruelcon. Sola Andreas staris en la mondo. La lastan vintron li ankoraŭ pasigis en la hospitalo. Nun la vintreca strato minacis, kaj leviĝis kelkfoje antaŭ li krute klinita kiel luĝejo. Nia malamiko estas la strato. En realo ĝi estas tiel, kiel ĝi ŝajnas al ni, kruta kaj dekliva ebena. Tion ni nur ne rimarkas, ĝin trapasante. Sed en vintro - tion oni legas en la gazetoj - la pordistoj kaj la servistoj de vendejoj, la samaj, kiuj forpelas nin el la domoj kaj kortoj, kaj kies skoldaj paroloj persekutas nin, forgesas disŝuti cindron kaj sablon sur la glatan glacian, kaj ni falas, ĉar la frosto la elaston de niaj membroj forrabis.

Andreas tre ŝatus ĝis vintro havi virinon, unu el tiuj defendpovaj, fortaj kaj disputemaj pordistinoj, antaŭ kiuj li devis fuĝi kaj kies imponan pozicion tamen li ĉiam supozis : li vidis ŝin, apoganta la manojn sur la koksojn tiel, ke tiuj ŝvele elformiĝis kaj la pugo streĉiĝis, amasa

kaj blanka sub la jupoj. Tian inon nomi sia propra - tio donis forton, donis kuraĝon kaj certecon kaj ŝanĝis la vintron al infana ludo.

Frue jam vekis lin la sakraĵo de Willi, kiun dum la plej bona matendormo ĝenis la ellitiĝa Klara. Poste Andreas suriris la matenan straton kaj lamis haste kun la hastantoj, kvazaŭ lin ne vokis la libera plezuro ludi en iu ajn korto, sed la neceso atingi ĉi tiun tre foran precize fiksitan. Li eĉ sistemigis kaj klasifikis la urbon laŭ distriktoj, tute arbitre, konforme al siaj propraj celoj, atribuante al ĉiu tago propran distrikton. Tiamaniere li ĉiam venis pliafoje en novajn regionojn, esplor- kaj scivoleme, lamis sen timo trans la glata asfalto de larĝaj stratoj, estis singarda, haltigis per sia levita bastono alveturajn aŭtomobilojn, kaj sakris post senskrupulaj ŝoforoj. Tiel li lernis venki la straton, la danĝeran straton, kiu malamiko estas de ni ĉiuj. Esti subpremata de ĝi li ne akceptis, tute ne, ne de ĝi. Li ja posedis la licencon. Licencon de la registaro por ludi kie kaj kiam ajn al li plaĉas. Li posedis lambastonon kaj licencon kaj ordenon. Ĉiuj vidis, ke li invalidas, soldato sanginta por la patrujo. Kaj ĝis nun ankoraŭ ne perdiĝis la estimo por tiaj viroj. Fulmotondro, se oni ne estimus lin!

Ĉar ja... kion? Ĉu li ne plenumis sian devon, muzikante per sia gurdo? Ĉu la licenco, kvazaŭ propramane transdonita de la registaro al li, ne estis devoligo kaj ne privilegio? Ludante li malŝanĝis la registaron de la prizorgado por li, liberigante la landon de konstanta imposto. Jes, ne estis dubo, ke lia laboro estis komparebla nur kun tiu de oficistoj kaj li mem proksimume kun oficisto; ja precipe, kiam li ludis la nacian himnon.

IV

Okazis en la Pestalozzi-strato, dum varmega ĵaŭdo, en la korto de la domo numero 37 (fronte al la preĝejo el flavaj brikoj, kiu aranĝis ĉirkaŭ si meze en la strato verdan gazonon kvazaŭ por substreki sian apartecon al ĉiuj aliaj domoj) - ke la deziro superfortis Andreas Pum ludi marŝon, eble ĉar la kreskanta febleco de la tago kaj la propra de Andreas necesigis ekskuan interrompon.

Andreas reguligis la elektilon sur la maldekstra flanko-muro de la gurdo al: "Nacia himno" kaj turnis la krakon tiel vigle, ke la solenaj sonoj perdis sian adaĝan pompon, haste ekhopis, la silentojn forgesis, kaj efektive atingis malproksiman similecon al marŝmelodio.

Kvin infanoj staris en la korto kaj du servistinoj kliniĝis emociite super la fenestraj sojloj. Nigre vestita virino aperis el la koridoro, stirante siajn virecajn kaj celkonsciajn paŝojn en la direkton, en kiu troviĝis Andreas, kaj haltis malantaŭ li. Ŝi metis fortan manon sur la ŝultro de Andreas Pum kaj diris: "Hieraŭ mia bona Gustav al Dio formigris. Ludu ion melankolian!"

Andreas, kvankam laŭ naturo ne poltrono, tamen ek-timis pro la surprizo, ekĉesis, tiel ke la krako haltis kun suprenmontra mantenido, kaj turnis sin al la vidvino. Dum tio li bedaŭris, ke la forta kaj varma mano hezite sed necese forglitis de lia ŝultro. Li rigardis en la vidvinan ruĝigitan vizaĝon. Ĝi plaĉis al li. Kvankam por taksi ŝian aĝon li ne havis sufiĉan tempon, lin tamen subite trafluis la ekkono, ke la nigre vestita blondulino estis vidvino en tia aĝo, kiun oni nomas "la plej bona". El tiu kono Andreas ankoraŭ ne tiris anticipe pliajn konkludojn. Nur obskura sento disvastiĝis en li, ke tiu virino samtempe eniĝis en tiun korton kaj lian vivon. Ŝajnis al li, kvazaŭ io komencis heliĝi en lia animo.

"Kun la plej granda plezuro", diris Andreas kaj faris etan perkapan riverencon. Kvazaŭ por melankolia kanto estus necesaj tute apartaj preparoj, li malŝraŭbis kun grava pedanteco la pivoton por la nacia himno, donis al

la kranko eksvingon, tiel ke ĝia mantenilo descendis kaj el la kesto la ankoraŭ retenata tono forfuĝis, simile al sufokata kaj eksilenta oscedo. Post tio Andreas turnis la kvarlastan pivoton. Sekundon li ŝanceliĝis inter "Lorelej kaj "Ĉe la fonto knabo sidis". Li decidiĝis por la "Lorelej", ĉar li supozis, ke tiu kanto estos konata al la vidvino.

Tiu supozo montriĝis vera. La vidvino, retiriĝinta en sian ĉambron, por ĝui pli komforte ĉe la fenestro la melankolian melodion, komencis kanti. Ŝi klopodis fruiĝi al la sonoj de la instrumento en tiu maniero, kvazaŭ ŝin la malpacienco kaj la ambicio pelus pruvi al si kaj al la aŭskultantoj, ke ŝi konas kaj la melodion parkere kaj ne bezonas pergurdan helpon; dume Andreas, kontraŭe al la virina hasto, opiniis precipan malrapidecon necesa kaj faris trankvilajn turnojn, por ke la melankolio de la kanto efiku pli rimarkeble. Des pli multe, ĉar ankaŭ li troviĝis en tia animstato, kiu nin kaptas dum nia vivo en decidemaj momentoj, kaj por kiu ni kutime volonte cedas elstaran solenecon.

Post kiam li longiĝis la "Lorelej" al kvarona horo, la vidvino revenis en la korton, enmane estis kuko, pano kaj papera saketo da fruktoj. Andreas dankis. La vidvino diris: "Mia nomo estas Blumich, naskita Menz. Revenu post la funebra ceremonio." Andreas opiniis, ke estus konvene, preni ŝian manon. Li faris tion, ĉirkaŭprenante ŝian fermitan pugnon per siaj fingroj kaj diris: "Mia kondolenco, Sinjorino Blumich".

Ĉi-tage li ne plu ludis. Li iris al benko antaŭ la preĝejo, manĝis la kukon kaj la fruktojn kaj konservis la panon en la sako. Pli malfrue ol kutime li alvenis hejme. Willi jam delonge sentis la bezonon sterni sin en la lito kaj atendis ankoraŭ nur pro timo, ke ekdorminte li povus pli poste esti vekota, por ke li ellitiĝu kaj malfermu al la "kriplulo" la ŝlositan pordon. Kiam Andreas aperis en la ĉambro Willi ne resalutis. Tion Andreas bedaŭris. Estis ja tago, en kiu Andreas sentis por Willi grandan bonecon. Li alportis la alkoholan kuiraparaton por prepari sian teon. Willi ĉagreniĝis pri la silenteco. Tre volonte li kverelus kun Andreas. Tial li diris: "Se vi morgaŭ denove alvenos tiel malfrue, mi disrompos vian gurdon. Venu ĝustatempe! Ordo devas esti!". Sed ekkolerigi Andreas ĝuste hodiaŭ ne estis facila afero. Ridetante al Willi, li metis la panon sur la tablon kaj diris ĝentile kun grandmondula galanteco: "Bon-

volu servi vin mem, sinjoro Willi."

"Sed, ke vi ja estu ĝustatempe hejme!", diris Willi kaj sidiĝis al la tablo. Verdire gaja frato! li jam pensis repacigita. Li havis ankoraŭ kolbason de la lasta promenado. Ĝi pendis de la najlo super la lito. Singarde li deprenis ĝin, rompis ĝin en la mezo kaj donis duonon al Andreas.

"Mi hodiaŭ konatiĝis kun virino", Andreas sentis sin pelata diri.

"Mi gratulas!" diris Willi.

"Vidvino, ŝia nomo Blumich."

"Ĉu juna?"

"Jes, juna."

"Bonŝanculo!"

"Ŝia edzo mortis hieraŭ."

"Kaj jam - ?"

"Ne!"

"Rapidu, amiko! Vidvinoj ne longe atendas!"

Ĉi tiun diron Andreas memortenis. Li tute ne intencis taksu Willi homo eksterordinara, sed li konfesis, ke tiuspecaj personoj en virinaj aferoj estis plej bonaj rutinistoj kaj kolektis jam multajn spertojn. Ĉu eble estus utile, ja pro decaj kaŭzoj eĉ necese, partopreni la funebran procesion? Aŭ ĉu eble tio ne decas, pro la najbaroj - ĉu ankaŭ al sinjorino Blumich tio ne plaĉas? Preskaŭ kaŭzis al li aflikton, ke li ne konis ŝian antaŭnomon. Li devis nomi ŝin en intima memoro "sinjorino Blumich" kaj sentis, ke ŝi jam delonge al li ne estis plu fremdulino. Ju pli longe li pensis pri ŝi, des pli ŝi proksimiĝis al lia animo. Eĉ ne unu homo surtere staris kun li tiel koralkore, kiel ŝi. Kun neniu li kredis esti en tia intima rilato, kiel kun ŝi, kvankam ne havante pruvojn por tio. Ja propre, ĉu ne estis la doloro pro la ĵus perdita edzo la kaŭzo, al kiu li, Andreas, ŝuldis ŝian konatecon kaj afablecon? Ĉu virino forgesis tiel leĝere? Kaj - se ŝi kapablis al tio, ĉu ŝi tiam estis ankoraŭ inda? Kiu ajn konis la virinojn? Kiu scias, kiom longe ŝia edzo estis malsana, vivanta mortinto? Kiom longe la povrulino devis reteni sian naturan vivoĝojon? Andreas estis pro kompato skuita.

Ankaŭ hodiaŭ li lasis palpebron fendete malfermita kaj lia rigardo okulumis kaŝe al la brusto de la fraŭlino. Sed ne envio kaptis lin, nur la deziro kompari. Tiuj mal-

longaj momentoj en la korto sufiĉis al li por doni imagon pri la korpa stato de sinjorino Blumich. Aĥ, ŝi estis fortika kaj oni vidis kiel la malvasta robo kvazaŭ dum batalo devis bridi ŝiajn malobeemajn abundajn mamojn; kiel ŝiaj koksoj larĝaj kaj esperigaj, fortoplenaj kaj voluptemaj perforte rezistis kontraŭ la korsaĵo; kiel ĉio estis sana korpu-lenteco kaj tute nenio superflua. Riverego el vivo kaj ĝojo venis de ŝiaj varmaj manoj, kaj kiel du viglaj deziroj estis ŝiaj brunaj iomete ruĝplorintaj okuloj.

Ĉu viro kiel Andreas estis egalranga al tia virino? Kion li povis doni al ŝi? Sana oni ja povis nomi lin, kvankam foje-foje, antaŭ la pluvtagoj, la mankanta kruro doloris. Sed tio koneksis kun la malbona vivo. Li estis forta, li havis larĝajn ŝultrojn, impone malvastan kaj ostecan nazon, ŝvelantajn muskolojn, densan brunan hararon kaj, se li nur volis kaj streĉis sian vizaĝon, la sentiman aglan rigardon de militisto, precipe, kiam la malhelaj ankoraŭ longe ne grizaj lipharoj estis ŝike torditaj ambaŭflanken, grasigitaj per vazelino. Ankaŭ li ne estis knabo ankoraŭ sperta en amaferoj kaj ĝuste nun, post longa sindeteno, plena de multpromesa vira forto. Li estis viro kapabla kontentigi ne moderan vidvinon.

Kun tiuj fieraj pensoj li ekdormis, kun ili li vekigis. Unufoje, post longa tempo, li rigardis dum la vestado persiste kaj tutpedante en la spegulon, kiel antaŭ apelo dum la militista tempo. La metalan krucon li spirblovis kaj frotis ĉe la maniko tiel pura, ke ĝi fariĝis eble plej brila. Trifoje li alfiksis la kombilon, antaŭ ol li trovis la rektan linion de la hardislimo. Lia unua vojo kondukis al la Pestalozzi-strato.

Survoje li rememoris, ke li lasis sin ne sufiĉe ofte razi. Dufoje semajne, vendrede kaj marde, li kutime vizitis la metilernejon por barbiroj, kie la metilernantoj dolorige sed senpage skrapis la barbon. Tiu metilernejo kaj same la maniero lasi sin razi nur dufoje semajne, ŝajnis al Andreas maldecaj por viro, kiu inkliniĝis impresi konstante kaj sukcese al belaspekta virino. Kaj ĉi tiu venkoriĉa facilanimeco, antaŭ kiu ni feliĉege kapitulacas, kiam ni certas pri konkero de virina koro, ekkaptis ankaŭ Andreas Pum violente kaj fortiĝis pli ol lia alikaze tiom atentema singardo. Andreas iris en barbirejon, kiu ne malprave nomis sin frizosalono, kaj trafis, kvankam lia gurdo ja devus kaŭzi iomete da miro, tamen sur la saman varman

ĝentilecon, kiu kontraŭfluis al ĉiuj enirantoj de frizejoj kiel milda aero printempa.

Li vidis sin en la spegulo, kun la vizaĝo blanke polvumita per pudro, lia verto brilanta pro oleo, kaj la noblan odoron, de li mem venanta, enspiris li kun fiera agrabla sento. La decido tute ne plu viziti la metilernejon sed anstataŭe des pli ofte diversajn frizejojn en li kreskis neskuebla. Li streĉis la kaphaŭton, la frunton, aperigis la du malgrandajn imponajn faltojn ĉe la naz-aloj, kaj estigis tiel la aglan rigardon, kiun li ĉiam alprenis dum decidaj momentoj de sia militista kariero. Post tio li sukcesis ĉirkaŭpendigi la gurdon per tiel nobla movo, ke li preskaŭ egalas al kontista serĝento, sabron surmetanta.

Skrupuloj de malsama naturo kaj graveco ekatakis lin nur sur la strato, proksime de la domo numero 37, kiel altrudiĝema muŝaro. Li opiniis sin ŝtonkora egoisto, sensenta homo kaj krome vantulo, kiu faris afektulan tualeton, ne respektante la dolorplenan tagon de vidvino Blumich, eble la plej dolorplenan de ŝia juna vivo. Kion ŝi pensus, se li tiel aperus antaŭ ŝi, post kiam ŝi vidis lin hieraŭ en ordinara stato? Ĉu ŝi ne tutprave sentus sin ofendita, frapita, ja eĉ en doloriga aflikto? Eble estis tute ne oportune viziti hodiaŭ vidvinon Blumich. Oni ja ankaŭ devus iomete honti antaŭ la mortinta edzo, kiu ankoraŭ ne kuŝas en la tero. Propre, Andreas ja havis plenplenan kaŭzon resti atendema kaj lasi al la vidvino tempon, ĝis ŝi tute akordiĝos pri sia unua edzo. Krom tio ja ne por hodiaŭ sed por morgaŭ ŝi invitis lin, jes, oni povis eĉ diri, ke ŝi petis lin veni.

En tiu tago Andreas havis tiom multe da feliĉo, kiel ankoraŭ neniam, post ol li komencis migri per la stratorgeno en la kortojn. Ĉu eble, ĉar la neordinare varmega horo devigis ĉiujn homojn lasi siajn fenestrojn vaste malfermitaj, kaj homoj pro tio prenis la sonon de muziko kiel atendantan pretekston preni iom da freŝa aero kaj klini sin super la fenestraj sojloj, ĉu eble ankaŭ, ĉar la freŝe razita kaj pura Andreas ornamita per brilanta kruco precipe ŝajnis al ili simpatia - ni ne scias, kial okazis, ke ĉirkaŭe de Andreas pluvis mono, ke iĝis peno klini sin teren, tiomfoje li devis refari la saman movon. Ne plua dubo estis: la feliĉo venis samtempe kun vidvino Blumich en lian vivon. Kaj ridetante, milde kaj bonanime, kiel la radĵoj de la subira suno, kiu ankoraŭ ripozis sur la fron-

tonoj de la domoj, Andreas revenis hejmen, frue antaŭ komenco de la krepusko, kun kora saluto por Willi sur siaj lipoj kaj kun benita apetito, kiu ofte aperas kiel agrabla akompanaĵo de plena kontenteco.

V

Ĝis nun supozis Andreas absolute nenion pri sia amkonkuranto, kiun oni, en konsidero pri lia profesio, povis nomi dangera. Li estis tiu en la domo 37 loĝanta, juneca, svelta kaj de l' kapo ĝis la piedoj donĵuana subinspektoro de la polico Vinzenz Topp, favorato de l' virinoj en tiuj regionoj, kie li deĵoris, viro, kiu siajn profesian dignon kaj plaĉan mildon sciis bone interplekti, afable al la pasantoj kaj subuloj, kaj al la ĉefoj en simpatia korekteco, inter kiu tamen ja miksiĝis ankaŭ iomete da rigida humileco. Eĉ en la uniformon Vinzenz lerte kontrabandis sian personan noton tiel, ke li laŭŝajne ne nur pli belaspektis ol siaj kamaradoj, sed ankaŭ al la reglamento pli konformis. Li estis humana dum deĵoro kaj soldata en privataj kontaktoj.

Dum la longdaŭra malsano de sia edzo sinjorino Blumich eltrovis per sento, pro sindeteno duoble akriĝita, la avantaĝojn de sia najbaro en ĝia tute konfuziga riĉeco kaj ĝuis ne malofte la afablecojn de mallonga interparolo, de rideta saluto.

Tamen ŝi klare vidis, ke la subinspektoro, kvankam certe momenta distro por bezonaj virinoj, neniam povus esti fidinda kaj fidela edzo. Kaj aldone la noktaj deĵoroj trifoje en semajno. Sinjorino Blumich timis sola kun sia kvinjara knabino en iliaj du malgrandaj sed en la nokta malhelo ŝajne preskaŭ vastegaj ĉambroj. Kaj kvankam ŝi ĝenerale sin opiniis certe kapabla bridi kaj firmteni virojn inklinajn al alternado, ŝi tamen sin kredis tute malsukcesa kontraŭ la petolemo de sinjoro Vinzenz. Nu vere, estis nek ŝia instinkto tiel celtrafa, nek ŝia intelekto tiel klarvida, ke ŝi estus sciinta, kiom forte ĝuste la ŝajne petolema subinspektoro sopiris al la sekura ekzisto de viro edziĝinta kun vidvino. Objektive, Vinzenz Topp estis fakte malkontenta pri sia vivo. Iom post iom li glitis en la jarojn, en kiuj iĝas ĝene oferi pensojn, tagojn kaj eĉ monon por la senfine ŝanĝiĝantaj objektoj de l' amo. La koro sopiras al la trankviligaj reguloj de bonmora edzeco. Ni ne plu volas, por tiel diri, ĉiam esti survoje por

satigi nian rajtan deziron al la varma proksimo de virino. Jam sole nia profesio igas nin senhejma. Ni bezonas familiaran hejmon, de kie okazaj ekskursoj ne ekskludiĝas kaj en silento estas pardonataj. Plie ni bezonas propran nun tute ne atingeblan duĉambran loĝejon meblitan kaj ne malgrandan familian aldonan salajron por la edzino kaj la infano. Kaj fine la enoficigon inspektoro, kiu kvankam sendepende de edziĝo tamen per atentigo pri la plej altaj bezonoj ĉe favore pensanta ĉefo povus realiĝi pli frue.

Pri tio eĉ parte supozis, kiel dirite, sinjorino Blumich - ŝi nomiĝis cetere Katharina - tute nenion. Ŝi jam kutimiĝis impresi virojn kaj trovis tial nenion eksterordinaran ĉe tio, kiam ankaŭ Vinzenz Topp sendis al ŝi unu el tiuj aventuremaj kaj tamen estimoplenaj rigardoj, kiujn ĉiuj virinoj scias ŝati. Amason da tiaj rigardoj ŝi kolektis ĉiutage en la domo kaj sur la strato, en la parko kaj en la vendejo. Tio signifis nenion. El la viroj estas unu pli senzorga ol la alia, ĉiuj volas senrespondece ĝui, ĉiu volas posedi, neniu pagi, kiel la proverbo diras. Katharina Blumich estis sobre pensanta virino. Ankaŭ la unuan viron ŝi elektis zorgeme. Ke li fariĝis pli malfrue pulmomalsana, ĉar li estis laboristo farinta brosojn, estis volo de Dio. Kontraŭ la sorto oni ne povas entrepreni ion, sed al sia intelekto oni devas tamen doni okazon paroli. Tiu pledis por viro en matura aĝo kun korpa malperfektaĵo se eble, kiu tamen ne povas bari la edzecan feliĉon; la prudento diktis birdon kun plumaro jam pritondita, kiu estas facile tenebla kaj ne plu bezonas ekscitan disciplinon. Ĉe tio ludas la socia rango neniun rolon aŭ nur etan, nur tiom, kiel ŝajnis al sinjorino Blumich pli bonaŭgure tiri estaĵon el pli profunda sfero al sia pozicio ol mem esti suprentirata. Ĉi-lasto devigus ŝin al dankemo kaj forrabus de ŝi la aŭtoritaton. Sed en ĉiu mastrumejo estas la aŭtoritato de la virino la afero plej grava. Tial rezignis sinjorino Katharina Blumich pri subinspektoro Vinzenz Topp. Li do malfeliĉigu alian virinon. Sian tutan vivon li do rilatu nur kun ulinoj facilmoraj. Kiel daŭra minaco por la legitima edzo kaj kaŭzo por ties ĵaluzo estis li ja ĉiam najbare tuj ĉe la mano kaj bone utiligebla. Oni devas profiti el ĉio, sed oni ne rajtas sin forĵeti.

La tago, en kiu Andreas Pum faris sian oficialan debutan viziton en la korto de la domo numero 37, estis morna kaj plumba, kaj malgraŭ sia somerfina prema varmo antaŭ-

sento de la aŭtuno kaj en streĉa denso de humideco, kiu kaŭzis al Andreas dolorojn en la mankanta kruro. En tiaj tagoj li estis sen io alia jam helpbezona, infaneca, sola, elegia, plena de sopiro. Tuj post kiam li en la korto ektoniĝis la "Lorelej" kiel rekonajon, kvazaŭ sekrete inter ili konsentita, aperis sinjorino Blumich, petis lin interrompi sian ludon, por ke li ĝin daŭrigu en ŝia loĝejo. Malgaja melankolia kanto ĝi estis kaj ne damaĝis la funebbron.

Post la muziko sekvis bonkondata riverenco de la malgranda pala Anna kun maldika harplektaĵo kaj tro granda vespertosimila banto. Pro la malgajaj ekscitoj la infano estis konfuzita kaj silentis. La nova viro kun la ligna kruro kaj la instrumento plaĉis al ŝi malgraŭ sia fremdeco. Ŝi iĝis tre konfidema. Ŝi estis kvinjara, homo en la aĝo, en kiu oni ankoraŭ estas scianta dio, antaŭ kiu la kaŝita boneco de la aliaj kuŝas videble kiel buntaj ŝtonoj sub klara akvo de montara rivero.

Tiam fluis la parolo, interrompita per kafo kaj membakita kuko, silenta funebra festo por sinjoro Blumich. "Li havis bonegan vestaron", gloris la virino, "Kaj same de kresko kiel vi li estis. Du brunaj kostumoj havas apenaŭ kvin jarojn, tiam li estis ankoraŭ soldato, kaj mi zorgis pri li, ho kial li ne mortis sur batalkampo, kiu scias, ĉu ĉi-kaze la doloro eble estus pli malgranda kaj la infano ne ĉi tie, infano sen patro! Aĥ, vi ja ne scias kiel vivas tutsola absolute sola senedza virino en tiu malbona mondo. Vi ja tute ne povas scii tion, la viroj tion ja tute ne povas scii."

"Mia patrino, la beata, restis ankaŭ juna vidvino", tion diri Andreas nun opiniis necese.

"Kaj ŝi edziniĝis neniam denove, ĉu?"

"Jes, ŝi prenis tubiston."

"Ĉu li estis honesta?"

"Tre honesta."

"Li vivas ankoraŭ, ĉu?"

"Ne, ili ambaŭ mortis en la milito."

"Ambaŭ en la milito?"

"Jes, ambaŭ."

"Nu, se oni tiel feliĉas kaj la dua estas ankaŭ bona fidela vivkamarado."

Jen sinjorino Blumich kredis konvena plori; ŝi serĉis naztukon, trovis ĝin kaj eklarmis.

Andreas konsideris ne malprave tiun malgajan scenon

favora destino. Nun kun ŝanco sukcespromesa li povis provoki la riskon. Kaj klinante sin super la plorsingulta virino, tuŝante kvazaŭ hazarde ŝian mamon, li diris:

"Mi volas ĉiam esti fidela al vi."

Sinjinoro Blumich forigis la naztukon kaj demandis per preskaŭ sobra voĉo:

"Ĉu vere?"

"Vere, kiel mi sidas ĉi tie."

Sinjinoro Blumich ekstaris kaj premis kison sur la frunto de Andreas. Li serĉis ŝian buŝon. Ŝi falis sur lian sinon. Tie ŝi restis sidanta.

"Kie vi loĝas nun?" ŝi demandis

"En pensiono", diris Andreas.

"Ni ne forgesu la najbarojn. Alikaze ni povus kunloĝi jam morgaŭ. Pli bone ni atendu kvar semajnojn."

"Tiom longe?" demandis Andreas, ĉirkaŭbrakis Katharina, sentis la streĉan molon de ŝia korpo kaj ripetis veante:

"Tiom longe?"

Katharina deŝiriĝis per rezoluta ektiro. "Kio devas esti, devas esti", ŝi diris severe kaj tiel konvinke, ke Andreas la pravon al ŝi cedis kaj obeis, kaj tamen tuj kreis plej dolĉajn revojn pri la estonteco.

VI

Kia bonŝanculo li do estis! Tiaj aferoj okazas ne ĉiutage, ili estas neordinaraj aferoj, estas mirakloj. Kiom multe da homoj de lia speco atendis tremante nun la vintron kiel solecaj kadukaj arbustoj, sciante, ke ili estas senprotektaj kaj mortkondamnitaj kaj tamen sen forto por ekfuĝi per abrupta sinmortigo for de la malrapide pereiga sorto. Sed lin, Andreas Pum, el miloj da invalidoj, elektis vidvino Katharina Blumich, al kiu iom post iom kaj kvazaŭ por prepari sin li donis la nomon "Kathi". Al li nun apartenis la ino el liaj revoj, la vastmama, largĝ-talia, varma; seksarda moleco, apetenca senkonsciiga nebulo, fluis el ŝia korpo, la longe mankinta odoro de l' ino, ŝvelanta jam same per si mem kiel la karno ondas kaj la mamoj, ja tiu odoro, en kiun oni povas enlitigi kiel sur korpo.

Riĉa je avantaĝoj estis Katharina Blumich. Sed ne malpli riĉaj ŝajnis al Andreas kelkhore la propraj. Li estis viro kun maloftaj animaj donoj. Pieta, milda, ordema kaj en perfekta harmonio kun la diaj kaj surteraj leĝoj. Homo, kiu estis kaj spirita najbaro de la pastroj kaj de la oficistoj, atentata de la registaro, oni povis diri: premiita, neniam juĝe punita, kuraĝa soldato kaj ne revoluciisto, malamanto al la paganoj, al la drinkuloj, ŝtelistoj kaj enrompisto. Kia diferenco inter li kaj Willi, ekzemple! Inter li kaj la multaj aliaj, la nekontroleblaj, kiuj ludis kaj kantis en la kortoj, kaj ĉio sen licenco! La resonantaj paŝoj de policisto en foro ektimigis ilin, ĉiumomente ilin povis atingi la denunco de iu malbona najbaro, la malmultajn enspezojn ili perdis en drinkejo, prostituistoj, krimuloj, tiaj ili estis! Kiom da ekzemploj Andreas povis mencii nur el sia hospitala tempo, tiom svarmis ja inter la malsanuloj la paganoj! Tiom multe havis malbelajn, aĉformajn kaj infektajn malsanojn! La povraj inoj! Ili ja eĉ ne sciis, al kiu ili sin donis! Sed Andreas estis irinta tra la vivo pura je korpo kaj koro, kvazaŭ inokulite kontraŭ pekoj kaj doloroj, filo obeema al sia patro kaj poste

subulo volonte humila al siaj ĉefoj. Li ne strabis al la havaĵoj de la riĉuloj! Li ne rampis tra la fenestroj en iliajn vilaojn. Li atakis neniun en malhelaj parkstratoj. Pro tio la sorto rekompencis lin per modela ino. Ĉiu forĝas laŭ si la feliĉon. Li meritis la bonon. Nenion oni akiras iel-tiel senpene. Ribelantoj pensas tiel. Ili ĉiam enbatigās.

Subite teruro interrompis la gajan fluon de la ideoj. Andreas rememoris pri forĝisto Bossi kaj pri sia propra tremado antaŭ la komisiono, al kiu li ŝuldis la licencon. Kion fari, se similaĵo ripetigūs? Kiu povas certe scii, ĉu en liaj membroj, en lia korpo, en lia sango ne jam gastis la ĝermo de la tremado, ĉu ĝi ne burĝonos malĝustatempe kaj igos forta, venkante la povran Andreas, pereigante lin? Kial distingigis ĝuste li, premiita de la sorto antaŭ ĉiuj aliaj, posedante licencon sen daŭra tremado? Ĉu la sorto ne iam ekpostulos sian repagon? Li volis igi certa kaj iri al la doktoro.

Ĉu al la doktoroj? Ni havas rajtan suspekton kontraŭ la doktoroj. En iliaj atendejoj oni fariĝas malsana. Dum ili explore serĉas nian malsanon per siaj manoj, siaj instrumentoj, sia intelekto, atakas nin malsano, je kiu ni neniam suferis. La okulvitroj de la doktoro, lia blanka vestaĵo, la odoro, kiun li eligas, la kruela puro de liaj vitroj kaj pinĉiletoj transdonas nin al morto. Ankoraŭ iu dio, reganta super ĉiuj doktoroj, decidus pri nia saneco; kaj ĉar tiu ĝis nun estis tiel kompleza, li ja vere kuraĝigas nin konfidi nur al li plu.

La noktoj de Andreas naskis tiujn pensojn kaj timojn, fruktodonaĵoj kaj konstantaj, jen kruelaj kaj jen afablaj. Aĥ! Ĉio estis verŝajne nur la sopiro al Katharina Blumich. Alie la tagoj, plenumiĝantaj per la aktiveco de la aliaj kaj nia propra faro, per la helaj stratoj kaj iliaj histantaj homoj, per la infanoj en la kortoj kaj la servistinoj ĉe la fenestroj, donas al ni, kvankam ne havante ion komunan kun la celo de nia koro, tamen la konsolan certecon, ke ni atingos ĝin. Precipe tial, ĉar finiĝis ĉiu tago kun posttagmezo en la domo de sinjorino Blumich, de Kathi, kun taso da kafo kaj flustrita aminterparolo. Tiu konsistis neniel el vantaj aŭ embarasaj, varmegaj kaj balbutataj amĵuraj, sed sekvis celojn praktikajn, pruvante la grandajn avantaĝojn de l' ina prudento, kiu neniam estas sen gracio.

"Ni evoluigos la entreprenon!" diris Katharina. "Ni aĉetos malgrandan azenon kaj metos vian keston sur manĉareton

por ke vi ne plu devu portegi ĝin!"

Kia ideriĉa kapo! Kia amplena ekpenso: aĉeti azenon!

Azeno estas stulta sed pacienca besto! pensis Andreas. Tiom ofte li jam aŭdis pri ĝi. Azenoj eltenas multon. Tiu besto adaptiĝas plej taŭge al niaj bezonoj. Per magnetita forto ĝi decide allogos la publikon en la kortoj kaj stratoj.

"Kiel ni volas nomi la azenon?" demandis Katharina.

Vere! Nenion ŝi forgesas. Kiel nomi azenon? "Lux" estas nomo por hundo.

"Muli", proponis Katharina. "Muli" estis bonega.

Ĉiutage antaŭ vespera krepusko demandis Kathi: "Ĉu vi amos Anni*?" Al tio Andreas, se li parolus sincere, ne kapablis respondi. Anstataŭe li prenis la malgrandan Anni ĉemane, nun malpli pura ol dum la debuta vizito, kaj kredis vere senti nekonitan patran amon por la infano. Ŝi estis kvietaj kaj tiel ŝajnis inteligenta. Kvietajn infanojn ni ĉiam imagas sciantaj observantoj, kaj flatas nin, se ni al ili plaĉas.

La varman viglecon de la infana maneto Andreas kunprenis senkonscie hejmen dum la soleca longa vojo. Foje-foje li pensis pri Anni kun la ĝoja espero, ke ŝi eble baldaŭ fariĝos tute lia propra infano. Multajn horojn li ankoraŭ sentis en sia manĉo ŝian malgrandan molan pugnon kiel birdon. Kial eblas, ke oni forgesas objektojn aliajn de ni tuŝitajn, sed ne la pugnon de Anni? Eble tial, ĉar la manoj havas sian propran memoron! Tirili! Sian propran memoron! Per strangaj pensoj oni meditas estante feliĉa.

Du semajnoj pasis, de kiam Andreas konatiĝis kun sia fianĉino. Kaj li certe ankoraŭ du pliajn devintus atendi ĝis ekkomenco de la nova komuna vivo, se la naturo ne estus helpinta lin.

Nome en iu posttagmezo, dum Kathi preparis kafon, estiĝis ŝtormo, kaj la vitroj de la malfermaj fenestroj tintis. Malheliĝis subite. Komencis plui. Kaj eble tial, ĉar Katharina ja delonge jam esperis, ke neatendita naturfenomeno al ŝia jam ekzistanta inklino venu helpe por mallongigi la atendotempon de ŝi kaj Andreas, aŭ eble, ke la abrupto de la tempesto kreis same decideman

* germana karesa formo por Anna.

forton: ĉiukaze Katharina ne hezitis kaj diris senpere: "Vi povas jam hodiaŭ resti ĉi tie. Dum tia vetero oni ja eĉ hundon ne pelas surstraten."

En la sekva mateno transloĝiĝis Andreas. Li adiaŭis al Willi kaj postlasis por Klara saluton. Willi akompanis lin, portis la valizon ĝis la tramhaltejo kaj fajfis survoje senrespekte viglan kanton. Li kaŝis ambaŭ manojn en la pantalonaj poŝoj kaj iris senhaste per grandaj paŝoj kaj dis-tendataj kruroj apud la lamanta Andreas. La malgrandan sed pezan lignovalizon, fiksitan per rimeno ĉirkaŭ la brako, li portis kiel butikuman saketon aŭ malplenan foirejan korbon. Tio estis signo de silenta riverenco por la foriranta Andreas, ke tiel Willi demonstris sian fortegon. Ankaŭ la viglan kaj petolan kanton li fajfis nur pro melankolio. Kaj apud la haltejo li diris el inter la dentoj: "Do multe da feliĉo, Andreas!" - kaj tiam li turnis sin, reiris la vojon malrapide kaj ĵetis ankoraŭ longdaŭran rigardon en la flankan strateton, kie antaŭ la magazeno por luksnutraĵoj pendis la kolbasoj, plenegaj kaj grasaj, kiel dikaj pendumitoj.

Estis neeviteble, ke Andreas post kelkaj tagoj konatiĝis kun la subinspektoro de la polico kaj ties bondeziron ricevis. Tiu renkonto okazis en ĉeesto de sinjorino Katharina, kiu ne povis supozi, kian doloron Vinzenz Topp kaŝis malantaŭ sia formala ĝoja parollerto. Ke oni preferis kriplulon antaŭ li, la viro plej bone kreskinta en la tuta ĉirkaŭaĵo, ke oni lian rangon ne atentis, lian uniformon kaj lian inteligentecon, ke lia kono pri virinoj restis senefika kaj liaj aludoj vanaj - ĉi tio ofendis Vinzenz Topp. Li decidis, al la nova viro de Katharina Blumich - jen maltrafo de tiu alikaze tiel prudenta virino - montri tute ne simpatian. Li salutis malofte, kiam li kaj Andreas renkontiĝis endome.

Sed Andreas rimarkis nenion, li vivis nome en tiu nova kaj senkonsciiga feliĉego, kiu igas nin sensenta kaj kiel kirasoj kontraŭ la malbono kaj la ofendoj, kaj kiel vualo bonkora, kovranta la malicon de la homoj.

Jes, Andreas estis feliĉa. Dia ino varmigis lian kuŝejon kaj ŝanĝis ĝin al paradizo. Neniu doloro memoris pri la mankanta kruro. En la nove ŝtofita lambastono kuŝis la stumpo varme envolvita kiel en kavo de virina mano amanta. La matenon enkondukis la vaporanta kafotaso. La tagon finis varma manĝaĵo. En liaj poŝoj kuŝis buterpanoj, akompanante lin survoje kiel salutoj de lia virino. En la

horoj de la vespera krepusko sidis Anni, la pala grandokula infano, sur lia sana genuo. Andreas klarigis al ŝi la admirindan sencon de la surgurda pentraĵo.

"Vi estas kara malgranda knabino", diris li ofte kaj sence, ĉar li vane penegis eltrovi pli belan diron por Anni.

Iom post iom kaj kiel granda bona saniga varmo disvastiĝis en li la amo.

En unu el la komenctagoj de novembro ili geedziĝis. Por la lasta fojo en ĉi-aŭtuno brilis la suno tiom varme, ke oni povis stari tutfacile kaj libere, kiel en printempo, antaŭ la preĝejo (antaŭ la flavbrika preĝejo, kiun ĉirkaŭis milde prujnita gazono) kaj la malgranda Anni ne sentis malvarmon, kvankam ŝi portis maldikan blankan muslinrobon, sen mantelo. Ŝi aspektis kvazaŭ malgranda novedzino.

Tiam venis la malserenaj, la pluvriĉaj, la frostaj tagoj. Nur antaŭtagmeze Andreas foriras por ludi en la kortoj. Malvarmon li ne sentas. Lin ne malsekigas la trudema pluvo. Li ne funebras pro la nubokovrita suno. Dank' al ŝia nova, malsupre prirabotita eĝohava bastono li neniam glitas sur la glata pavimon. Tute apud la trotuara rando li iras, kaj antaŭ li kondukas Muli, la malgranda azeno, la gurdon sur la manĉareto. Ĉio estas propra posedo de Andreas. Nun li jam pensas pri papago kaj pri verdaj lotoj por printempo. Infanoj kaj plenkreskuloj postrigardas lin. Malgraŭ la malvarmo pluvigas mono el ĉiuj fenestroj, en ĉiuj kortoj. Malgraŭ la malvarmo enmetas la pasantoj la manojn en la plej sekretajn poŝojn. Ĉiuj - ne ĉiuj, sed multaj konas lin. Kio mankas al Andreas Pum?

Li amis ĉion en la mondo kaj speciale du - ĉu objektoj ĉu homoj? Ili apartenas unu al la alia kaj ne samspecas. Andreas amis Anni kaj Muli, la infanon kaj la azenon.

Por la azeno li estis konstruinta malgrandan stalon en la korto. Nokte li foje-foje pensas pri tio, ke la azeno frostotremas. En la venonta tago li volas meti pli da pajlo en la stalon.

Afiŝoj estas videblaj sur la informkolonoj. La invalidoj pliafoje malkontentas. Paganoj, kiaj ili estas! "Kamaradoj!" krias la afiŝoj. La registaro! La registaro! La registaron ili volas aboli! Lin, Andreas Pum, oni ne povas varbi por tiaj aferoj. Li ne tumultas, li estas kvieta homo, li malestimas kartludantojn, drinkulojn kaj ribelantojn.

Kun tiu malestimo en la koro Andreas Pum eble pov-

intus vivi ĉiujn longajn aŭ mallongajn jarojn, destinitajn de la sorto al li, kun tiu malestimo en la koro, en tiu varma komforteco, en tiu perfekta harmonio kun la surteraj kaj diaj leĝoj, samproksime kaj al la pastroj kaj al la oficistoj de la registaro - se ne estus veninta tutfremda viro en la vivon de Andreas Pum por pereigi ĝin ne per volo inklina al malico sed devigata al tio pro la blindo de l' hazardo, kiel ilo senscia en la mano de la diablo, kiu iam kaj iam interrompas la dian regadon tiamaniere, ke ni nenion antaŭsentas; tiel, ke ni ankoraŭ en la konsola certo, ke Dio gardas super ni, sendas supren al Liajn silentajn preĝojn - kaj ni miras, se ili ne estas aŭdataj. La viro, kiu kaŭzis al Andreas la malfeliĉon, estis la komercisto por pasamentoj Arnold el la firmao Arnold & Hahn.

VII

Sinjoro Arnold estis altstatura, sana kaj tamen mal-kontenta. La entrepreno prosperis. Hejme atendis lin lia fidela edzino, kiu naskis al li du infanojn: knabon kaj knabinon, ĝuste tiel, kiel li tion deziris. Liaj vestoj konformis bone, liaj kravatoj estis ĉiam modernaj, lia poŝhorloĝo funkciis ekzakte, lia tago dividiĝis en komforta precizeco. Nenia ĉagrena surprizo povis ĝeni la mildan ordon de lia vivo. Ŝajnis preskaŭ neeble, ke al li iam manna poŝto povus alporti la fatalan almozpetan leteron de povra parenco. Li ne havis malriĉajn parencojn. Li devenis de bonstata familio, kie malakordoj ne ekzistis. Ĉiujn el ĝiaj membroj unuigis paciga senzorgeco kaj simila maniero percepti la mondon, prijuĝi la politikon, montri la individuan guston, kritiki aŭ partopreni la modon ĵus regantan. En la hejmo de Arnold eĉ ne troveblis tiuj familiaj ĉagrenoj, kies kaŭzoj ordinare sin kaŝas en fuŝita plej ŝatata manĝaĵo. Kaj eĉ la infanoj lernis bone, kondutis senmanke-discipline kaj sciis laŭŝajne, kian respondecon ili ŝuldis al la nomo de la patro kaj ties ne bagatela deveno.

Malgraŭ tio suferis sinjoro Arnold pro kronika kaj - kiel oni supre eksciis - senkaŭza malkontento. Certe, li mem konis sufiĉe da motivoj. Unuflanke ekscitis lin la nuntempaj cirkonstancoj. Nome li heredis de siaj antaŭuloj klaran sencon por la ordo, kaj pro tio ŝajnis al li, ke la nuntempaj tendencoj celas al konfuzo de diversaj ordoj. Aliflanke li proksimiĝis al tiu aĝo de familiestro, en kiu ina distro necesas por la konservo de interna ekvilibro. Sed ĝuste tiu ampasio kreis tioman malcerton, ke ĝi la tagan ordon kaj pli la noktan minacis eksplodigi, sin iom post iom rimarkigis en ĉiuj faroj de sinjoro Arnold, influis la gravajn kontraktojn kaj eĉ la prizorgadon de la korespondado; precipe ĉi-lastan, ĉar Arnold al la juna Veronika Lenz*, kiu preskaŭ intence portis tiun nomon, kutime diktis la leterojn.

* germana poeta esprimo por printempo.

Bedaŭrinde estis fraŭlino Lenz jam baldaŭa fianĉino. Nu tamen, viro pli sperta en delogaj aferoj ne estus de-teninta sin de tiu fakto. Sed ĝuste la manko de spertoj ĝis nun elstarigis sinjoron Arnold, subtenis lian solidecon, motivigis lian reputacion kaj donis al li la forton indigni pri la demoralizaj aperoj nuntempaj. Aĥ, kiagrade li timis la tagon, en kiu li implikiĝos en la plej malĝajan kontraŭstaron al sia tuta ekzistado, kaj kiel li sopiris je la komenciĝo de ĉi tiu tago! Kiel li devis ĉiuhore gardi sin kontraŭ sin mem, kontraŭ sian kompanion, sian edzinon kaj kontraŭ siajn infanojn! Kaj kiagrade ege tio afliktis lin!

Nome ne estis facile forgesi Veronika Lenz, helblondan knabinon kun fortaj manoj kaj rimarkinde ĉarma vizaĝo, en tre figurfavora vesto, kiu permesis supozi la plej gravajn korpopartojn en ekscitiga klareco. Neforgeseble ŝi restis precipe en tiuj tagoj, kiam ŝi venis vestita per malhelverda senmanika bluzo, videbligante brunan denaskan makulon en la varma bluombra kavado de la kubuto. Kisi tiun lokon deziris sinjoro Arnold.

Li ne pridubis, ke li sukcesus, se li nur iam ekprenus la decidon. Per larĝaj ŝultroj kaj ruĝeta blondo lia vireco ja devis impresi: kvankam en lia vizaĝo ĝenis heredita manko, kiu jam de jarcentoj hejmis en diversaj vizaĝoj de familio Arnold. Sinjoro Arnold havis ne rektan kaj sube pli platan nazon. La kaŭzo de tio estis la oblikva nazomuro, formanta unu truon randa kaj la alian triangula. La naturo almenaŭ provis, eĉ en sia malboneco ne nur ŝtonkora, mildigi tiun mankon per tio, ke ĝi skulptis la nazpinton karneca, plata kaj movebla. Tiu elasto povis okaze efiki, ke oni la oblikvajn truojn konsideris kiel momentan delokadon, eble pro tro forta bloypurigado. Krom tio trompis la supraĵan rigardanton ankaŭ la faskoformaj ruĝetaj lipharoj, kiuj ŝajnis la nazon duaranga parto de la vizaĝo kaj dume sin elstare atentigis je ties kostoj.

Nepridubeble virecaj estis ĉiuj aliaj ecoj de la Arnolda korpa tutaĵo. Se li paŝadis, diktante leterojn, en la ĉambro, tiam ĝemis sub lia peza plando la planko. Li havis la kutimon, per antaŭen klinita korpo, kun la manoj en la ĵakaj poŝoj, stari certan tempon sur unu piedo kaj tuŝi la tapiŝon per la pinto de la alia, tiel, ke li de fore memorigis pri pozo de statuo, firmtenanta hastantan viron en difinitan momenton dum lia kurado. Nur post du aŭ tri

sekundoj la teron tuŝis la kalkano de la alia piedo. La paŝoj estis potence larĝaj kaj spacorabaj. La dikto sonis severe, kaj la stilo de la leteroj memorigis, kvankam ili entenis ĝentilaĵojn, pri admonoj kaj riproĉoj. Kaj malgraŭ tio, ke sinjoro Arnold de pli ol dek jaroj subskribis la firmaoleterojn, li tamen ĉiam denove trovis ĝojon pri sia subskribo. Ĉar ĝi estis, eĉ tiom multfoje refarita, kiel aprobo de la Arnolda potenco kaj sole nur kiel grafika aperaĵo impona ornamaĵo. Tial li faris siajn subskribojn en spir-retena silento, rapide kaj tamen zorgeme, dum en la maldekstra mano troviĝis la balanca sorbilo kiel rimedo por kvietigi la tranĉan efikon de la inkmalseka nomo.

Dum tio staris Veronika Lenz malantaŭ lia seĝo kaj ensorĉis sian mastron, sen celi tion. Estis fakto, ke ŝi ne havis aliajn intencojn krom skrupule plenumi la korespondadon kaj forlasi sian laborejon plejeble rapide. Sed ĝuste tion pridubis sinjoro Arnold. Nome, kvankam ĝenerale li sciis nur malmulte pri la vivo de junaj knabinoj en ĉi-tempo, ŝajnis tamen al li tiom certe, ke iu baldaŭa fianĉino ankoraŭ ne povis esti nomata fianĉino. Ja sole nur ĉi tiu nomo jam sufiĉus plenigi lin per jena distanca frostotremo, kiun ni sentas kontraŭ la konsekritaj kaj sanktaj nomoj. Pensi pri pekaj rilatoj al fremdaj fianĉinoj eĉ en songoj ni ne rajtas. Tio ja preskaŭ similas al adulto. Al rabo de fremda havaĵo. Al insida ŝtelo. Sed ni vivas en mondo, en kiu la propraĵo de la proksimulo devas esti delikate traktata. Ja, ĉu ni preferu la fiaoson!

Kompare al tio gefianĉiĝo, ĝis nun ne fiksita kaj eble pro certaj kondiĉoj tute nerealigebla, povas ankoraŭ ne konkuri kun la sankta stato de gefianĉoj. Ja, ĝi pli similas al malpli sankta rilato, kiun respekti oni ne bezonas - precipe, se oni scias, ke tiu viro estas netaŭgulo, cirka artisto, komedianto, kiu vojaĝas tra la urboj de la mondo kaj verŝajne ĉiurbe havas knabinon. Lin oni ne malriĉigas. De li oni forrabas tute nenion. Oni faras - kontraŭe - eble diplaĉan servon, malfermante la knabinajn okulojn kaj akriĝante ilian inertan sencon por la amaraj realoj sur ĉi tiu tero, kiujn oni forgesi kaj venki povas nur en mallongaj, nedaŭraj kaj antaŭ ĉio sensekvaj ekstazoj.

Post kiam sinjoro Arnold per tiaspecaj zorgemaj konsideroj venis al la konkludo ŝajniĝi la eksterordinaran

staton de sia enamiĝo kiel normalan inklinon al bonfar-ema agado, li perdis la timon antaŭ la malfacilaĵoj, starintaj kontraŭ lia konkero. Kaj tiel povis okazi, ke li iutage, subskribojn donante, malrapide surtabligis la balancan sorbilon, eninkujigis sian plumon kaj - tuj rememorante, ke plumojn oni ne povas lasi en inko sen kaŭzi difekton - rapide kaj atenteme relokis ĝin sur la feran tenil-stablon. Post tio li turnis sian kapon, streĉis ambaŭ brakojn supren kaj stringis la dolĉan kurbitan nukon de la blonda knabino.

Veronika Lenz energiis kontraŭ la brakumantaj manoj, kies premo estis pli forta kaj restis supereca. En ega ek-timo kaj en vana rifuzo ĝemante, ŝi devis proksimigi sian vizaĝon al la vango de sinjoro Arnold. Dume ŝi vidis la ruĝetajn hartufojn en liaj oreloj, flaris la malvarman haladzon de cigaroj kaj de homa graso, kiu ŝajne elfluis el la fendoj inter la kolumo kaj mentono de ĉi tiu viro. La dorsa rando de la seĝo tranĉis dolorige en ŝian korpon. La okulojn ŝi fermis kvazaŭ por atendi la morton kaj eksentis sur sia vango mordon.

Nur ekde tiam ŝi retiris sian kapon violente, kraĉis sur la nukon de sinjoro Arnold, ekprenis haste la jakon, mantelon kaj mansakon kaj rapidegis elen.

Restis nur unusola espero por Arnold: ke tiu knabino, nun malamata de li, neniam revenu. Li tuj volis asignigi pli grandan sumon. Tiun hontigan incidenton li ja certe iam forgesos. Nenio pikas poreterne. Labori kaj ne mal-esperi! Ĉiam rekte la kapon! Ankaŭ la plej saĝa faras stultaĵojn. Kaj jam li revis, ke jaro pasis kaj la evento enteriĝis sub la kolosa amaso da tricent sesdek kvin labor-kaj kontraktoriĉaj tagoj.

Do sian ekscititan animon kvietigante, li veturis aŭtomobile hejmen, eniris kun laŭta elsupra ŝaluto en sian ĉambron, kisis ambaŭ vangojn de sia ankoraŭ nun bela edzino, promesis al siaj infanoj donacojn je kristnasko, trovis afablajn vortojn por la servistino, distribuis benon sur sian domon. Tiam li dormis longan, trankvilan, sanan nokton kaj veturis je la mateno fajfante al la firmao.

Sed jen interrompis Luigi Bernotat, imitisto de bestovoĉoj el la Rokoko-Varieté, la optimisman humoron de sinjoro Arnold. Luigi Bernotat, viro scianta la ĝentilan konduton, pardonpetis unue, ke li ĝenas jam tiel frue, kaj komencis nur tiam senhezite paroli pri sia fianĉino, kiu pro bedaŭrinda sintrudo de sinjoro, laboranta en tiu ĉi

alikaze tiel solida firmao, estas devigata ekŝigi el la deĵoro kaj postuli kontentigon.

"Kun la plej granda plezuro" - interrompis tiumomente sinjoro Arnold la bone aranĝitan parolon de Luigi Bernotat.

"Tio estas tre plaĉa", diris Bernotat, "sed fakte nur via devo. Krom tio mi fianĉo de tiu sinjorino sentas min tre ofendita. Mi do venis, por anonci al vi, ke mi ekprocesos, ke mi havas la firman intencon ekprocesi - des pli por starigi avertan ekzemplon."

Nun estiĝis minaca paŭzo.

Sinjoro Arnold ekkaptis la brilan liniilon el fero, premis la fingrojn ĉirkaŭ la malvarmeta metalo, kio estis al li agrabla kaj almenaŭ forigis de unu loko kaj dum mallonga tempo la subitan varmegon, konkerintan lian tutan korpon. Li volas ĉantaĝi, li volas ĉantaĝi, mi enkaptiĝis, mi bele enkaptiĝis - pensis sinjoro Arnold. Tiam li ekstaris kaj diris:

"Kiom vi volas?"

Ŝajnis, ke Luigi Bernotat atendis tiun demandon. Nome kiel aktoro, kies repliko venis, li komencis malrapide kaj celkonscie parolon, jen per artaj paŭzoj kaj jen per deklamo tre rapide fluanta, kaj lia voĉo tiagrade katenis sian aŭskultanton, ke li mem nur mallongatempe atentis la iom post ioman altiĝon kaj descendon de la sono kaj sen interrompo pluigis la parolon.

"Vi certe pensas", diris Luigi Bernotat, "ke mi estas ĉantaĝisto, ĉu? Kiel vi povus eĉ alie. Homoj viaspecaj memkompreneble kredas, ke la honoro de viro estas aĉetebla. Ne la mia! De mi tute ne, sinjoro Arnold. Vi mem pagos por tio, kion vi aŭdacis entrepreni. Ankoraŭ ekzistas tribunaloj. Vi kredis, ke varietea artisto tion trakotos ne tiel skrupule. La fianĉinon de komerca amiko aŭ de advokato, de studento aŭ de oficiro vi ne estus tuŝinta. Mi vin instruos pri tio, ke ankaŭ la fianĉino de varietea artisto ne estas ĉasbesto laŭ ĉies plezuro. Mi povus elvoki vin al duelo, se mi ne estus ano de la anti-ligo. Ne kredu, ke mi estas poltrono. Oni konas min. Mi donis al la famkonata Martin Popovics, lian nomon vi certe jam aŭdis, al la blovinstrumenta artisto Popovics dufoje vangobatojn, ĉar li spritis stultaĵojn. Krome mi estas amatora boksisto. Mi estas do, kiel vi vidas, ne poltrono. Sed mi ne neas miajn principojn. Konsekvenco estas la

plej grava en la vivo. Estu konsekvenca viro kaj portu la sekvojn."

Sinjoro Arnold staris senvorte, ĉar rabita for de li estis la voĉo. Li observis la ruĝe, nigre kaj brune striitan kontraŭulan banton, elstarantan senrespekte super ambaŭ kolumfinoj kiel rekviziton de l' vivoĝojo. Iĝis tre silente, post kiam Luigi Bernotat per voĉo plifortigita finis sian parolon. Subite Bernotat ektrilis. Evidente li volis prui sian impertinentan petolemon, imitante en frapanta simileco alaŭdon. Lia fajfado ŝvelis, kaj baldaŭ ŝajnis, ke komplete alaŭdo-floro jubilis.

Jen ekkriis sinjoro Arnold: "Ne trilu ĉi tie, vi impertinenta kanajlo!"

Luigi Bernotat kliniĝis: "Tion vi devos prui". Tion li diris mallaŭte kaj tute ne konsekvence kaj dancetis, sin ankoraŭfoje klininte, elegante, elen.

Spite al sia ekscito ne ignoris sinjoro Arnold la tre danĝerajn sekvojn de tiu vizito. Jen bela afero, kiun li faris! Kvardek kvin jaroj da deca vivo, senriproĉa reputacio, brila firmaoevoluo estis en danĝero. Kaj tuj sen longa pripensado li veturis al sia advokato.

Nu certe, tiu forestis kaj troviĝis en tribunalo. Stultulo, kiu tion estus ekspektinta alie! Por kio propre ni havas niajn advokatojn! Por ke ili malaperu, tuj kiam ni bezonas ilian konsilon. Niaj familiaj kuracistoj? Ili venas nur tiam, kiam ni ĉesis vivi, kaj skribas atenton pri nia morto. Niaj sekretariinoj? Ili metas nin pro stulta ŝerco en la plej embarasan situacion. Niaj edzinoj? Kun ili ni tute ne povas paroli, kiam nia koro estas ŝvelplena; nia malfeliĉo nur satigas ilian eternan vengemon. Niaj infanoj? Ili havas siajn proprajn zorgojn kaj ni patroj estas eble eĉ iliaj malamikoj.

Kaj kvankam ĉiuj el tiuj cirkonstancoj eble de jarcentoj estis realaj kaj validaj, estis tamen tiel, ke multo da tio, kio koncernis la specialan kazon Bernotat, Lenz kaj Arnold, estis kulpo de ĉi tiu tempo; de tiu terura nuntempo, kies tendencoj inkliniĝis al detruo de diversaj ordoj. En kiu epoko de la mondhistorio krom la nuna povis okazi, ke malgranda sekretariino sendas sian fianĉon al sia mastro? Ke tiu "fianĉo" - sinjoro Arnold imagis tiun esprimon en citiloj - venas al ĉefo de alte ŝatata firmao kaj postulas klarigan raporton - cetere fianĉo, kiu eĉ estas homo el cirko! En kiu alia tempo tiu rubaĵo de la homaro kolektis

tiom da impertinenta kuraĝo?

Sinjoro Arnold igis forveturi la aŭton kaj iris tra la stratoj. Li manĝis en restoracio. Ankaŭ lia familio do estu iomete ekscitata. Ja ĉu li eble havis la devon hejmenveni ĝustatempe jam de jaroj? Ili do kredu hejme, ke lin trafis akcidento.

En la gastejo la kelnero ŝajne ne volis rimarki kiel atentofrapan personon kiel sinjoron Arnold. Arnold detruis per peza prenilo de tranĉilo salujon kaj akceptis kun la senvorta ofenditeco de potenca tirano la humilan pardonpeton de la ceremonie parolanta direktoro.

Poste li trinkis mokaon, por subpremi la lacon. Tamen eĉ ankoraŭ surstrate li devis batali kontraŭ la dormo, aperanta per persisto de longjara kutimo.

Sinjoro Arnold iris tra fremdaj stratoj, per hastaj paŝoj, kvazaŭ li volus atingi celon. Dum ĉiu paŝo li rimarkis en amaro kaj preskaŭ ekplorante, kiom malmulte li propre gravis. Oni iradas tra la mondo, tra sia propra lando, tra sia hejmo, por kiu oni laboregis kvardek kvin jarojn - kaj estas nulo. Kontraŭ fremdaj aŭtomobiloj kaj veturiloj oni devas sin gardi. La bubaĉoj policistoj rigardas fiere elsupre al ni malsupren. Ordinaraĵoj el la subaj tavoloj de la popolo, drinkemaj kaj ĉifonvestitaj, ne flankeniras for el nia vojo. Firmao-servistoj kun pakaĵoj puŝas kontraŭ ni. Deksesjaraj junuloj kun mieno de seriozaj viroj petas pri fajro por sia cigaredo. Sed ni eĉ ne havas ideon halti kaj fari al buboj nazfluhavaj komplezojn. Dum ĉiu paŝo oni ekkonas la demoralizajn tendencojn de tiu tempo. Tiu disperdita nuntempo!

La krepusko subiĝis surmondan. La unuaj lanternoj ekardetis. Lamanta viro starigis sin bare kontraŭ la vojo de Arnold. Li portis sur dorso kaj brusto provokan afiŝon. "Kamaradoj" - tiel ĝi komenciĝis. "La mizero de la invalidoj limigojn ne konas. La registaro estas senpotenca!" Tiutone ĝi pluis. Tio ja estas ankaŭ bela bando! Almozuloj, ŝtelistoj kaj enrompisto. Multaj ja estas eĉ falsaj. Simulante dolorojn. Pretendante esti kripluloj! Simpatia societo! La registaro toleras tion. Sur publikaj afiŝoj ili skribas: Kamaradoj! Terura vorto. Anarkista. Demoraliza. Odoras je bomboj. La rusaj judoj inventas tiajn esprimojn. La policisto staris en proksimo kaj ne intervenis. Pro tio oni pagas la supermezure altajn impostojn! Terure, tio ĉi! Jen ja la kunvenejo! Enen ili svarmas! Okulfrape malmulte

da kripluloj. Tri aŭ kvar blinduloj kun hundoj. Sed la aliaj?
- nenifarantoj, almozuloj, friponaro.

Estis malfrue. Oni devis hejmeniri. Plej bone, oni eniĝas en tramo.

Se sinjoro Arnold estus, al kio li certe havis la eblon, preninta aŭtomobilon por hejmenveni, li evitus la lastan eksciton de tiu terura tago kaj lia vojo ne kruciĝus sinistre kun tiu de gurdisto Andreas Pum. Sed ĉar la realo alias, malica fatalo aranĝas, ke ni pereas, ne proprakulpe kaj ne supozante interrilation, pro la blinda furiozado de fremda viro, kies ĝisnunan vivon ni ne konas, kies malfeliĉon ni ne kulpas kaj pri kies mondkoncepto ni eĉ konsentas. Ĝuste ĉi tiu estas nun la instrumento en la neniiga mano de la sorto.

VIII

Koncido okazis, ke Andreas, kiu en tiu posttagmezo lasis sian gurdon hejme kaj la azenon en la stalo, kiel li tion faris kutime ĉiumerkrede, subite tiom laciĝis, ke li kvankam ŝparema kaj jam en proksimo de sia domo preferis eniri la tramon. Tuj ĉe ties enirejo kaj en maniero, ke li la duonan vagonŝtuparon okupis, staris sinjoro Arnold kun pluvombrelo kiel gardisto. Pluraj pasaĝeroj jam ekscitiĝis pri tiu tre ampleksa sinjoro tiel aroge baranta la trafikon. Sed Arnold estis - ni scias pro kio - ne en tiu humoro, en kiu oni traktas siajn kunhomojn per justeco. Li, kiu alikaze ĉiam partiis por la preskribita ordo en publikaj veturiloj, ribelis kontraŭ sia propra konvinko.

Andreas jam delonge ne veturis per tramo. Ĝin li konservis en sia memoro simpatia trafikilo. Ĉiam prezentis al li samtempe du kaj tri pasaĝeroj siajn sidlokojn. Lia lambastono, lia militista vestaĵo, portata de li labortage, kaj lia brila kruco kapablis alparoli la konsciencon de la homoj, eĉ de tiuj grumblemaj apuduloj, kiuj ĉiam zorgomarkite kaj kvazaŭ pro miloj da maljustaĵoj fare de iu al ili amarsente iras tra la mondo sole kun la celo malfaciligi al ĉiuj vojkrucantoj la ekzistadon. En la tramo Andreas Pum ĉiam renkontis komplezajn vizaĝojn.

Des pli granda estis lia miro pri la fremda sinjoro, kiu forlokiĝis eĉ ne duonan colon, kvankam li ja vidis, ke Andreas kun lamul- kaj stumpbastono bezonis minimume por si mem tutan vagonŝtupon por entramiĝi sukcese. Malantaŭ Andreas la homoj interpretiĝis. La konduktoro forestis en la vagona interno. Kaj intertempe, imagu, rigardadis sinjoro Arnold rekte antaŭen, kvazaŭ ne perceptante la situacion, kiu okazas antaŭ liaj okuloj, kaj liaj pensoj estis proksimume de tiu speco:

Tiu do estas unu el tiuj invalidoj. Simulanto. La alian kruron li kaŝis zorgeme. Soldato! Ha-ha! Pri tio ni jam sufiĉe spertis. Tiuj uloj eĉ ne hontas senhorigi la uniformon. Premio! Kia malpia trompo! Tiu venas de la invalido-kunveno, kiun mi ĵus vidis. La sinjoroj kamaradoj!

Ne sufiĉe oni povas fari por ili. Mi apartenas al la estraro por karitato de la Arĝenta Kruco. Sinjoro Reschofsky same. Ĉiuj sinjoroj el mia socio. Ĉiu faras kion li povas. Ili estas malkontentaj. Ja, bonfaron facile oni forgesas. La fikativo, kiun mi hieraŭ nur ete tuŝetis, sendis al mi sian prostituiston por elsuĉi min. Varietean artiston! Li aŭdacis ofendi min! Povus eĉ okazi, ke la tribunaloj konstatos lian pravecon! Tiuj tribunaloj nuntempaj! Kie enmonde ankoraŭ ekzistas justeco?

Homaj pensoj pli rapidas ol fulmoj, kaj indignanta cerbo certe ne bezonas pli ol duonan minuton por naski tutan revolucion. La tramo jam atendis minuton pli longe. Finfine Andreas Pum decidis ŝovi sin kiel eble plej bone preter la ŝtona sinjoro. Tio al li sukcesis, post kiam sinjorino, kiu staris dorse al li, helpis lin. Sed nun eĉ la kvietaj Andreas ekscitiĝis. Ankaŭ lin nun tute ne interesis la envagoniĝo. Li restis apud la senmova sinjoro.

Unufoje en la vivo de Andreas Pum okazis, ke al li la vizaĝo de bonvestita sinjoro ne estis simpatia. Andreas vidis la nerektan nazon kaj la ruĝetajn lipharojn. Fakte li jam delonge kutimiĝis al tio - ja, preskaŭ neniam aperis al li la ideo indigni pri tio, ke al aliaj homoj ne mankis kruro. Sed la korpa senleziteco de tiu ĉi sinjoro ĉagrenis Andreas. Ŝajnis al li, ke nur nun li malkovris, ke kriplulo estis li kaj sanuloj la aliaj.

Vidalvide al sinjoro Arnold staris altstatura sinjorino. Ŝi portis malgrandan pelerinon sur sia jaketo kaj tenis la manojn alte super la brusto. Ŝi havis flavan longan vizaĝon, nazumon kaj ege malgrandan nazon kun sekaj truoj. Ŝia aspekto similis al flaviĝinta fragmito.

Al ŝi subite parolis sinjoro Arnold: "Tiuj invalidoj estas danĝeraj simulantoj. Ĝuste mi estis en ilia kunveno. Ĉiuj kompreneble bolŝevikoj. Parolanto donis instrukciojn, kiel oni simulu. La blinduloj estas ne blindaj, la lamuloj ja vere ne estas lamaj. Ĉio trompo."

La svelta sinjorino kapjesis kaj provis rideti. Ŝajnis, kvazaŭ iu premis ŝian vizaĝon dolorige, kiel oni premas kutime citronojn. "Ankaŭ la unugambuloj", pluis sinjoro Arnold, "ne estas unugambaj. Oni tion faras tutsimple - tiel!" Kaj Arnold levis la piedon por demonstri kiel oni povas kaŝi duonon gambon.

Tiumomente ekkriis Andreas: "Ci dikventro, ci!"

Li ne konsciis, kio produktis en li tiun krion. Ĉar neniam

antaŭe en sia tuta vivo Andreas estis kriinta tiom laŭte kaj antaŭ kvin minutoj eĉ ne kapablus imagi, ke tiel li povus ataki fremdan sinjoron. Neklarigebla malamo perfortis Andreas. Eble ĝi ripozis longe en li, vualite de la humileco kaj pieco de l' viro malsupre.

Sinjoro Arnold levis la manon. "Ci mensogisto, simultanto, bolŝeviko, ci!" Arnold kriis, kaj kelkaj pasaĝeroj rapidis el la vagono sur la platformon.

Je malfeliĉo troviĝis en la vagono etrangaj civitanoj kaj virinoj, homoj, kiuj, puŝitaj kaj sencertigitaj pro la revoluciaj eventoj, sed ne malpli en amareco, luktis tenacan batalon kontraŭ la nuntempo, kiuj rigardis, kun dentoj kunpremitaj kaj en la gorgo sufokaj larmoj, rememore al la brila pasinteco de sia lando kaj prenis la senco de la vorto: bolŝeviko samkiel rabmurdisto. Ŝajnis al ili, kvazaŭ familiano estis de antaŭe helpvokinta, kiam ĝi eligis la krimon: Bolŝeviko!

"Simulanto! Bolŝeviko! Ruso! Spiono!" kriis kelkaj voĉoj intermikse.

Kaj digna sinjoro, kiu restis sidanta en la interno de la vagono, en vintra jako de majesta pureco kaj brila aĝo, diris por si mem: "Li estas verŝajne judo!"

Andreas jam suprigis sian bastonon, parte por defendi sin en kazo de agreso, sed ankaŭ por ataki. La kondukto venis, fermis skrupule sian mansaketon, ĉar li el sperto sciis, ke en ĉiu homamaso estas ŝtelistoj, kaj enmiksiĝis en la ekscititajn pasaĝerojn sur la platformo. La tramo veturis ĵus tra longa, senbrua strato kun malmultaj haltejoj. La kondukto provis resendi la homojn en la internon de la vagono. Li pripensis momenton, kiu el ambaŭ eble povus esti prava, kaj tiam li memoris pri gazet-artikolo, el kiu evidentiĝis, ke la simultantoj estas ruzaj uloj kaj ke oni per almozpetado sub certaj kondiĉoj perlaboras multajn milojn ĉiutage. Li ankoraŭ precize sciis, kiel li post legado estis indigninta pri la senhonteco de la almozuloj kaj pri ties altaj enspezoj, kiujn li komparis kun la propra mizera salajro. Krome admonis lin la vizaĝo kaj la staturado de la krianta sinjoro de fore al supra magistrata oficisto, kiun li iam unufoje vidis. Sammomente li memoris pri la malfeliĉo de kolego, kiu en la tramo traktis sinjoron krude kaj pro tio perdis sian laboron. La sinjoro estis nome magistrata oficisto. Ĉiuj el tiuj konsideroj igis la kondukton demandi Andreas Pum pri ties

legitimilo. Nu, en ĉiu alia situacio Andreas montrus nun sian licencon kun kontentigo, kiel li tion ja ofte devis fari antaŭ policistoj por pruvi sen iuj malfacilaĵoj, ke li rajtas gurdi kaj iri per lambastono. Sed nun Andreas ne inklinigis. Ĉar unue konduktoro ne estas polica organo, due li sin opiniis pli ol konduktoro kaj trie la sinjoro ne estas demandita unua pri la legitimilo. Kaj dum Andreas hezitis, kredis la konduktoro, ke la simulanta invalido mistifikas lin. Tial li kriis: "Ĉu vi pretos baldaŭ?!"

En tia maniero al Andreo ĝis nun neniam parolis konduktoro. Li do diris pro tio: "Viajn diktojn mi rekte ignoras!"

"Nu, ĉi-kaze forlasu la vagonon!" komandis la oficisto.

"Kaj se mi ne volas?" rediris Andreas.

"Tuj forlasu la vagonon!" kriis la konduktoro, kaj lia nazo bluiĝis. Tuj poste li blovis dufoje en sian trumpeton, ke sekve de tio la motorkonduksito per unu ekpuŝo stopis la tramon.

"Mi ne eliras!" deklaris Andreas.

La konduktoro prenis Andreas ĉe unu brako. Sinjoro Arnold ekcelis kapti la alian de sia kontraŭulo. Nun ekbatis Andreas blinde per sia bastonapogilo. Nenion plu li vidis. Rondaj flamoj cirklis antaŭ liaj okuloj. Li trafis la orelon de sinjoro Arnold kaj la oficistan ĉapon. La virinoj fuĝis en la vagoninterton. Sur la strato amasiĝis la homoj. Inter ili elkreskis subite, kiel fakira miraklo, policisto. Li duonigis la mason per ambaŭ brakoj, kiel naĝanto la ondojn. Li albordiĝis sur la vagonŝtupon kaj ordonis: "Venu suben!"

Andreas trankviliĝis iom post iom, vidante la viron de l' leĝo, al kiu li surbaze de sia licenco, de sia mondkoncepto kaj de sia ordeno sentis sin parenca. Kun la certa antaŭsento, ke li nun fine troviĝas sub la ŝirmo de la justeco, li diris al la policisto:

"Unue, irigu tiun ĉi malsupren!" - montrante al sinjoro Arnold.

Per tio Andreas jam de komence perdis ĉiun polican simpation. Nome, la viro, kiu ĝuas la plej grandan aŭtoritaton de la strat-amaso, ne ŝatas obei al subordigitaj homoj - kaj subordigitaj homoj estas ĉiuj, eĉ se ili milfoje pravas. La policisto respondis:

"Komandi min vi tute ne rajtas! En la nomo de la leĝo! Venu suben!"

Dum la policisto diris "en la nomo de la leĝo", penetris tra ĉiuj partoprenantoj kaj sciaviduloj friska ekstremo. Spiritforeste vidis Andreas krucifikson inter du brulantaj kandeloj kaj la pala vizaĝo de juĝisto kun bireto.

Li surstratiĝis sen pluaĵo.

"Vian legitimilon", diris la polico.

Andreas montris sian licencon. Poste pridemandis la policisto la konduktoron. Tiu ŝajne ne konis la verajn kaŭzojn de la granda ekscitiĝo. Li prisilentis la estigajn punktojn. Al ni interesis la okazintaĵo nur ekde tiu momento, kiam Andreas rifuzis akcepti lian ja certe rajte donitan instrukcion. "Mi ja konas nian regularon", finis la konduktoro sian raporton.

Ĝuste tiam vokis sinjoro Arnold malsupren: "Tiu estas bolŝeviko, lin mi aŭdis fiagitadi en la invalida kunveno!" "Mensogisto!" kriis Andreas kaj levis ankoraŭfoje sian bastonon. Sed tuj la policistaj fingroj fulmis al lia gorgo. Doloro kaj malamo rabis al Andreas la konscion. Li batis la policiston. Du viroj el la publiko ŝiris for de li la bastonon. Tiam li sinkis sur la pavimon.

La policista oficisto restarigis lin lifte per unu ekpuŝo, ordigis la uniformon, metis la licencon en la notlibron kaj tiun en la poŝon, kaj foriris.

La vagono veturis plu, la homo malamasigis.

Andreas lamiis hejmen.

Li ankoraŭ tiam furiozis. Li hontis. Dolorige li disreviĝis. Ke ĝuste lin tia afero devis trafi! Al li, Andreas Pum, premiita de la registaro! Li posedas licencon, perdis gambon kaj ricevis krucon. Batalinto estas li, soldato!

Subite li memoris, ke li ne plu posedas la licencon. Abrupte li nun iĝis vivanto sen vivrajto. Ekde nun li estis absoluta neniu! Kaj sammaniere, kvazaŭ li estus ĵetiĝa el ŝipo en la grandan oceanon, lia animo komencis fari la malesperajn klopodojn de dronanto. Ĉiumomente oni povus aresti lin, se li montrus sin surstrate kun gurdo.

Li atingis sian hejmon kaj rakontis ĉion al sia edzino. Ankoraŭ survoje sonis tra lia ekscitita animo softa espero, espero je la prudento, la boneco, la amo de lia edzino. Sed dum li parolis, iĝis ĉirkaŭ li fride pli kaj pli. Ŝi diris nenion. Ŝi staris antaŭ li, kun la manoj sur la koksoj, maldekstre pendis fasko da ŝlosiloj kiel armilo kaj pasto gluis sur ŝiaj fingroj. Li ne vidis ŝian vizaĝon, li ne povis konstati, kiam impreson lia parolo faris. Li kredis

senti, ke ŝi iomete moke malsuprenrigardis al li.

Li ĵetis de sube timeman rigardon al ŝi supren kaj similis tiumomente al hundo, batojn atendanta. Sed poste ŝanĝiĝis lia vizaĝo, ĉar li ektimis. Subite, al li ŝajnis, antaŭ li staris fremda ino, nekonata kaj terura. Je la unua fojo Andreas eltrovis, ke homa vizaĝo aspektas tute alie, se oni rigardas ĝin de sube. Li ekvidis la grasŝvelan mentonon de sia edzino kaj poste tuj super ĝi, kvazaŭ ŝia vizaĝo perdis la buŝon kaj la lipojn, la larĝajn naztruojn, jen sin plenblovantaj kaj jen malstreĉantaj, el kiuj elfluis malagrabla sufoka spiro, strange memoriganta pri odoro de sovaĝaj bestoj. Mallaŭta ĝemo ŝajnis veni el la virina interno, kiel volupta kaj sopira sono, kiun rabobestoj en siaj malsataj faŭkoj estigas vidante predon.

Andreas timis antaŭ sia edzino.

Li ekfinis la rakonton en la mezo. Katharina movis sin unu paŝon for de li, kaj al li ŝajnis, ke li ŝrumpis kaj iĝis malgranda, tute malgranda, vidante sian edzinon nur tiel, kiel oni grandan kirkturon pli supozas ol vidas, se oni estas tre proksime antaŭ ĝi.

Ŝiaj mamoj kaj levis kaj klinis sin kaj ŝi spiregis per la gigantaj naztruoj. Tiel ŝi luktis kelkajn sekundojn pro aero kaj trafa vorto. Fine ŝi trovis ĝin!

"Mizera kriplulo!" ŝi kriaĉis.

Andreas paliĝis. Meze en la granda oceano li naĝis. Li kroĉis sin al sia seĝo kiel al savanta tabulego. De malproksime tra nebulo, kaj sammomente mergante, li havis ankoraŭ sufiĉe da tempo por ekvidi la vizaĝon de la malgranda Anna, staranta scivoleme en la ĉambro.

Sinjorino Katharina ŝajne estis forgesinta ĉion. Ŝi vidis nek sian edzon nek sian infanon. Evidente ŝi forgesis, ke najbaroj vivas. Ŝi ektranĉis per la dekstra mano la aeron kaj tuŝetis florvazon el gipso, surpentritan per koloroj, kiu antaŭe staris meze sur la tablo. La akvo gargaris mallaŭte kaj plaŭdetis per solaj tristaj gutoj de la vakstuba rando sur la plankon. Des pli bone! pensis Katharina. La fluanta akvo duobligis ŝian koleron.

"Jen la danko, ke mi permesis al vi hejmi en mia loĝejo", ŝi kriis. "Ci vagadas, vivante je la kostoj de miaj perlaboroj, ja, de mia peniga laboro, kaj eĉ komencas nun kverelojn kun fremdaj sinjoroj kaj perdas vian licencon. Ĉu vi tute frenezigiĝis? Dek sanajn virojn ĉiufingre mi povintus havi, anstataŭ vin, anstataŭ mizeran viron, kiu estas al

mi nek protekto nek ĝojo kaj nun aldone malhonoro. Oni arestos vin, per akvo kaj pano vi tie vivaĉos, kaj mi devas porti vian nomon. Fi! Fi! Fi!

Kaj trifoje sinjorino Katharina elkraĉis. Unufoje ŝi trafis la pantalonon de sia edzo. Andreas forviŝis la salivon de sia edzino per tremanta mandorso.

Nur ekde tiam ŝi turnis sin al la mastrinaj aferoj. Ŝi faligis sin surgenuen kaj komencis viŝi per kriĉanta ĉifonaĵo la plankon. Dume ŝi kriis: "Anjo, starigu la vazon!" kaj: "Bela afero!" kaj: "Tia kriplulo."

Ŝi koleris viŝe kontraŭ la delonge jam sekaj kaj flave brilantaj tabuloj de la planko. Ŝiaj ungoj penetris inter ĉiuj solaj tabuloj en la fendojn kaj ŝi kirlis, saltigis malgrandajn terbulojn supren. Spite al sia streĉa manipulado ŝi povis pensi kaj eĉ perdi sin en melankolio. Sin sur la planko etendinte kaj preskaŭ punante ĝin prilabore, ŝi pensis malgaje pri sia fuŝita vivo. Aĥ, ŝi pensis pri la eleganta svelta subinspektoro de la polico, Vinzenz Topp, kiun ŝi rifuzis pro kriplulo. Ho, kio igis ŝiajn okulojn blindaj?!

Rapide ŝi leviĝis. Rapide ŝi refaldis sian suprentiritan robon, ĵetis la ŝlosilaron sur la tablon, prenis kombilon, starigis sin antaŭ la spegulo kaj aranĝis sian hararon.

Tiam ŝi klakfermis la pordon kaj kuregis laŭkoridore al la loĝejo de tubisto Fasbend, ĉe kiu la subinspektoro okupis meblitan kabineton.

Lastnokte Vinzenz Topp deĵoris. Nun li ĵus intencis razi sin. Kun duone sapumita vizaĝo li iris al la pordo. "Bonvolu pardoni, bonvolu pardoni, multfoje mi petas pardonon!" diris Vinzenz Topp, dum li kondukis sinjorinon Katharina en sian ĉambron. Familio Fasbend forestis du tagojn el la tago pro infanbapto ĉe agrikulturista onklo. Vinzenz Topp prezentis al sinjorino Katharina seĝon kaj petis ŝian permeson razi sin. Ĝentileco estis lia dua naturo, eĉ se oni lin vekus meze en la nokto, li montrus ĝentilan konduton.

Sinjorino Katharina volis elpeti juran konsilon. Ŝi havis konfidon al li kiel al advokato. Tre rapide kaj per la preciza objektiveco, kiu distingis ŝin el ŝiaj samseksanoj, ŝi rakontis ĉiujn faktojn.

Vinzenz suprigis sian suban lipon inter la dentojn por sapumi per la ŝtono sian vundrazitan mentonon. Poste li ŝutis bonodoran pudron sur sian vizaĝon. Tiam li prenis

de la seĝapogilo sian uniformjakon kaj englitis en ĝin zorgeme, ĉe kio liaj ostoj krakis. Nur post tio li kapablis doni informon.

Aĥ, tio ne estis la unua fojo, ke personoj - laŭ lia esprimo "amatoroj" - turnis sin al li por konsilo kaj informo. Kelkon li sciis el sia praktiko. Tiu kazo ŝajnis al li tre komplika.

"Tio estas armita rezisto kontraŭ la ŝtata potenco kaj cetere ofendo de la oficista honoro. Via sinjoro edzo" - Vinzenz diris ĉiam: sinjoro edzo, ĉar li estis plej bona homo - "povos ĝoji, se li elvenos nur kun polica puno. Verŝajne ankaŭ la tribunalo okupiĝos pri tiu afero."

Katharina etendis siajn brakojn, apogis ilin sur la tablon, kaj sur ties platon sinkis ŝia kapo. Post certa tempo aŭdebligis ŝia plorĝemado. Ŝiaj brakoj kuŝis ripoze, rozaj, rondaj kaj allogaj.

Vinzenz Topp kovris per odora mano unu el tiuj brakoj. "Konsoliĝu!" li diris. Tiam li iris al la pordo kaj riglis ĝin pro kazoj eble venontaj.

Ŝi mem ne konsciis, ĉu ŝi verŝis la larmojn pro sia edzo aŭ Vinzenz Topp. Li estis tiom bela kun sia blanke pudrita mentono kaj sia nobla odoro je tualeta sapo, kaj lia uniformo konvenis al li kiel dua haŭto. Ho, kio igis ŝiajn okulojn blindaj?

Ŝi komparis. Agi alie eĉ vole ŝi ne povis.

"Savu min!" ŝi ĝemis subite kaj etendis siajn brakojn. Vinzenz faligis sin en ilin.

Tiamaniere li nun finfine ricevis la ĝurajton pri tiu virino, al kiu li jam longe kaj sekrete sopiris. Tio estis kompleza destino de la sorto.

Li ne forgesis amasigi premajn kulpigojn kontraŭ Andreas, kiun li nun ne nomis plu "Sinjoro edzo". Kaj ankaŭ al sinjorino Katharina li donis mildajn riproĉojn. Sed ĉi tion li diris per tenera, venka flirtotono, kian Katharina neniam antaŭe aŭdis.

Kiam ŝi forlasis lian loĝejon, estis jam malfrua nokto. Ŝi odoris je lia sapo kaj portis kun si lian atmosferon. Oni povas diri, ke ŝi estis en tiu vespero plene feliĉa.

IX

Ankoraŭ al alia estis la malfeliĉo de Andreas Pum bonfara: nome al sinjoro Arnold. Lia kolero forvaporiĝis. La malagrablan Luigi Bernotat li provis forgesi. Venontage li intencis iri al la advokato. Li kisis sian edzinon kaj siajn florantajn infanojn. Li parolis denove afable kun la servistino. Kaj kvankam severa seriozo ŝvebis super lia naturo, liaj movoj kaj vortoj, eksentis sin liaj ĉirkaŭantoj senŝarĝigitaj. Komplezan ombron li ĵetis sur sian familion.

Alie por Andreas Pum. Li iris en la stalon. Tie staris Muli kaj elspiris softe varmon. Vesperto pendis vintro-dorme inter du fostoj, kiuj en kaŝita loko formis triangulon. La humida pajlo fetoris, frostiĝinte pordoprosime. La vento blovis tra la fendoj. Tra eta malfermo vidis Andreas kelkajn stelojn de la vintronokta ĉielo. Li ludis per pajlero, plektis ringon el tri kaj ŝovis ĝin sur orelon de Muli. La besto estis bonanima kaj permesis karesojn. Ĝi levis kun aminda malrapideco postkruron, kaj tio aspektis, kvazaŭ ĝi mallerte provus tuŝeti Andreas tenere. Sufiĉis la helo por vidi ĝiajn okulojn. Ili estis grandaj en la mallumo kaj verdaj kiel sukceso. Ili estis malsekaj, kvazaŭ plenaj de larmoj kaj pro honto tamen ne ekplorantaj.

Ju pli progresis la nokto, des pli malvarmiĝis. Andreas nun certe plej volonte estus plorplendanta, sed li hontus antaŭ la besto. Lia mankanta gambo denove doloris, post longa tempo. Li malligis la lambastonon kaj pripalpis la stumpon. Ĝi havis formon kiel platigita konuso. Mallargaj sulkoj kaj kavoj zigzakis ĉiudirekten super la karno. Se sur ĝin Andreas metis la manon, mildiĝis la doloro. Sed la alia, koleranta en li, ne ĉesis.

La nokto estis kvieta kaj hela. La hundoj bojis. Foraj pordoj moviĝis. La neĝo grincis, kvankam de neniu surpaŝata, kaj nur ĉar la vento ĝin balais. Ekstere la mondo ŝajne vastiĝis. Oni vidis tra la fendeto maldikan ĉielpecon. Sed ĝi sufiĉis por doni klaran ideon pri ties senfineco.

Ĉu Dio loĝas trans la steloj? Ĉu Li vidis la korsuferon de homo, ne ekmoviĝante? Kio okazas malantaŭ la glacia bluo? Ĉu tirano tronas super la mondo, kaj lia maljusteco estas nemezurebla kiel lia ĉielo?

Kial Li punas nin per subita malfavoro? Ni faris nenion maljustan kaj pekis eĉ enpense neniam. Ja male: Ni estis ĉiam piaj kaj humilaj al Li, kiun ni ja eĉ ne konis, kaj vivis, kvankam nia buŝo ne ĉiutage laŭdis Lin, kontente kaj sen blasfema indigno enkore, modestaj membroj de la mondordo, de Li kreita. Ĉu ni donis al Li motivon por venĝi sin kontraŭ ni? Ŝanĝante la tutan mondon tiel, ke en ĝi ĉio, kio al ni ŝajnis bona, subite iĝis malbona? Eble Li konas en ni kaŝitan pekon, pri kiu ni mem ne konsciis?

Kaj kun hasto de homo, serĉanta forestan horloĝon en sia poŝo, Andreas komencis peni por malkovri kaŝitan pekon en sia povra animo. Sed li ne trovis iun. Ĉu tio eble estis peko, ke li prenis vidvinon Blumich, kaj ŝia mortinta edzo nun venĝas sin? Aĥ! Ĉu mortintoj vivas? Ĉu li iam pekis kontraŭ la azenon Muli? Ĉu tio eble estis maljusto, ke li la beston, kiam ĝi survoje haltis kaj ion neklarigeblian surtere serĉis, unufoje antaŭenpuŝis per milda bato? Aĥ, ĉu la bato estis vere milda? Ĉu ĝi ne pli ĝuste estis forta, doloriga, malkompatema bato? "Muli, azeno mia!" flustris Andreas kaj metis sian vangon sur tiun lokon, kien li estis batinta.

Proksimume dum tagiĝo ekdormis Andreas. En lian dormkomencon jam miksiĝis murmure la frua bruo de la strato. La besto restis rigida. Ĝi aŭdigis mallaŭtajn gruntojn kaj humidigis la pajlon, tuj frostiĝantan. Ĝia urino ege odoris, narkotante.

Sekvatage venis Andreas sensalute en la loĝoĉambron. Li prenis mem panon kaj margarinon el la ŝranko. Ĝus venis la malgranda Anna el la lernejo. Ŝi premetis sin al li, kvazaŭ ŝi provus repacigi lin. "Ludu iomete!" ŝi petis. Kaj Andreas ludis per sia gurdo la plej melankoliajn kantojn, per kiuj la fabrikanto provizis la instrumenton. "Ĉe la fonto sidis knabo" kaj la "Lorelej". Kaj la melodioj memorigis lin pri tiu feliĉa tago, kiam li unufoje venis en la korton de ĉi tiu domo. Ho, belega estis la somero, valorega ŝnuro el feliĉaj tagoj, tagoj de l' suno kaj libero, de l' maljunaj tilioj en la gastamaj kortoj. La fenestroj en ĉiuj etaĝoj malfermiĝis abrupte, rondajn ruĝajn vizaĝojn, kiel lampionoj por festo, eligis la knabinoj el la kuir-

ejoj kaj laodoro de bonaj manĝaĵoj satigis la nazon. Ridantaj infanoj dancis ĉirkaŭ la muzikejo, la kruco flagris en la suno, la uniformo, nun makulita de pajlo kaj koto, kiel pura kaj respektiga tiam ĝi estis!

Katharina tiam aperis. Per laŭtaskaj kurtaj movoj ŝi manipulis en la domo. Ŝi ŝajne ne plu vidis sian edzon. Ŝi starigis senvorte kaj per forta ektiro argilan pelvon sur ĝian lokon. Li konis ĉi tiun malgrandan pelvon kun la damaĝa glazuro. Foje-foje ricevis el ĝi manĝon olda almuzulo, kato erarinta la vojon, hundo hazarde alkurinta. Katharina sorbis la supon el ore randita porceltelero. Krome troviĝis antaŭ ŝi en apartaj ujoj brasiko kaj terpomoj. Sed en la malgranda pelvo de Andreas konfuziĝis ĉio, kaj granda osto elstaris inter la pelmelo, kiel tegmentpeco inter la rubo de disfalinta domo.

Kion li faru? Li manĝis kaj iĝis humila, kaj direktis tiam kaj tiam sian rigardon al Katharina. Ŝi havis ruĝan vizaĝon kaj estis tre zorgeme ondumita kun multaj malgrandaj ondetoj, etendantaj sin ĝis la okulparo, kaj en la mezo kelkaj kurte tonditaj kaj frunten kombitaj haretoj, kiuj, fortranĉitaj ĉe la finoj per akra liniilo, aspektis kiel frangoj de ŝalo. Ŝi odoris kiel frizejo je diversaj parfumoj; paĉulo miksiĝis kun haroleo kaj tiu kun kolonja akvo. Aliulo tuj estus rimarkinta, ke Katharina pasigis la tutan antaŭtagmezon en frizsalono por sinjorinoj. Sed Andreas rimarkis nenion.

Lin okupis nur la enigmo de la subitaj ŝanĝoj okazintaj ĉirkaŭ li. Ĝi similis al ensorĉado. Li provis sin klare rememorigi pri la evento en la tramo. Ree li vidis la sinjoron, atakintan lin. Aĥ, ĉu tio eble okazis inverse? Kion do diris la sinjoro? Ke la invalidoj simulis! Kaj tio estis vera. Kiom ofte Andreas mem jam vidis simulantajn. El kio li propre konkludis, ke la sinjoro celis lin persone? Li parolis tute ĝenerale. Li ĉagreniĝis rajte pro la kunveno. Ili ja estas nenifarantoj, ribelantoj, sendiaj uloj, ili volas faligi la registaron, kaj ili meritas sian sorton.

Nu jes, estis escepto, ke ĝuste Andreas malfeliĉis karamboli kun malĝentila konduktoro kaj senkomprena policisto. Ili do igu lin antaŭ tribunalon. Tie li postulos la kategorian punadon de la subordigitaj organoj. Tie li rakontos pri sia vivo, sia milita partopreno kaj pri sia porpatruja entuziasmo. Li ricevos la licencon. Li denove gajnos la estimon de Katharina. Familia mastro estos li.

La edzo de sia edzino. Ŝi ekstaris. Ŝiaj larĝaj koksoj, premitaj en korsaĵo, moviĝis per si mem kaj la plenplena abundo de ŝiaj mamoj baraktis, kiam ŝi faris paŝon. Andreas memoris iliajn komunajn amofestojn, la premon de ŝiaj fleksiĝemaj kaj tamen muskolaj femuroj, kaj li kavigis la manon kaj kredis eksenti la larĝan molan ŝvelan senfinecon de ŝiaj mamoj.

Nu, ni do renkontiĝos antaŭtribunale! Tie ne sidas senkleraj policistoj kaj krudaj konduktoroj. La justeco brilas super la kortumaj haloj. Saĝaj noblaj viroj en talaroj rigardas per prudentaj okuloj en la hominternon kaj apartigas per atentaj manoj la bonon disde la malbono.

Se Andreas estus havinta sperton en la jurisprudenco, li sciis, ke la tribunaloj jam okupiĝis pri li. Ĉar lia kazo apartenis al tiuj tiel nomataj "urĝaj kazoj", kiuj laŭ dekreto de justicministro tuj venis al pritrakto aŭ nuligo. Jam prilaboris la grandaj ruliĝantaj radoj de la ŝtato civitanon Andreas Pum, lin, sen supozo kaj scio, malrapide kaj precize muelante.

X

Sekvatage venis juĝa alvoko al la "licencposedanto Andreas Pum". La oficiala skribaĵo havis oficejan sigelon, blankan litografiitan blazonaglon sur ruĝ-ronda papero, kaj kvankam la adreso sur supraĵe estis skribita, kio la multokupitan haston de la tribunaloj evidentigis, diskonigis la skribaĵo tamen supozon de tiu malrapide soleneco, kiu distingas niaj oficejojn. Li ricevis alvokon antaŭ la Duan Ĉambron, kiu la urgajn kaj negravajn kazojn devis pritrakti. Andreas Pum jen estis unuafoje nomata "akuzito", vorto, kiu, skribita de juĝejo, jam preskaŭ sonas kiel "punito". Cetere entenis la skribaĵo aldone nur la pli detalan terminfikson, rond-ruĝan stampon iomete palan kaj malklaran kaj la nelegeblan subskribon de la juĝisto, kiu ŝajne alude volis esprimi, ke la viro de l' justeco ankoraŭ ne deziras esti konata.

Multfoje legis Andreas la tribunalan skribaĵon en la vana kaj malprudenta espero, ke li povus eltrovi ion inter la linioj de la presita formularo, utilan aŭ malutilan, ion de la humoro reginta la juĝiston. Post malsukceso li provis imagi la juĝejon, la krucon, la lumojn, la barieron, la benkon por akuzitoj, la ex-officio*-advokaton, la juĝiston, la skribiston, la juĝejan serviston, la dosierojn kaj la grandan pentraĵon kun la krucmortigito, al kiu li interne jam preĝis. Li transiris al la preĝejo el flavaj brikoj, en kiu li ekde sia nupto ne denove gastis. La preĝejo estis senhoma, fenestroklapo en la alto de etaĝo estis malferma, kaj vento blovis fridan aeron en la di-konstruaĵon, kiu tamen odoris mucida je homoj, estingitaj sebokandeloj kaj surkalkaĵo. Andreas interplektis la manojn, surgenuigis, kaj diris per malforta voĉo, per kiu li kiel lerneja knabo preĝis antaŭ la lecionoj, tri, kvar, kvin Patroniajn.

Post tio li sentis sin trankviligita, sekurita kontraŭ malicaj surprizoj, kontraŭ la tribunala verdikto, kuŝanta en la sino de la morgaŭo. Li revenis hejmen kaj renkontis fremdan viron en la ĉambro. Tiu ekstaris kaj klinis sin iomete, sidigis denove kaj sidante diris al Andreas: "Mi

* oficiala

atendas vian estimatan edzinon. Vi do pardonu! Via estimata edzino devus esti ĉi tie post kvaronhoro. Hodiaŭ matene estis via estimata edzino ĉe mi en la magazeno. Vi ja nun mem vidas kiel akurate mi venis. Tuttage survoje kaj ĉiam akurate. Tio estas mia devizo."

Andreas rigardis al la viro malamike, kvankam lin ne konante nek komprenante. Certe li estis pro iu malica celo ĉi tie - Andreas supozis. Ne malmulte li klopodis diveni la profesion kaj intencojn de la fremdulo. Sed tio al li ne sukcesis. Dum la fremdulo ankoraŭ sidis, li ŝajnis homo altstatura; kiam li ekstaris, li estis tre malgranda. Ĉar mallongajn kruojn li havis. Lia antaŭen-volbita ventreto estus permesinta konkludi certan bonkorecon, same kiel la ruĝetaj knabinaj vangoj, la sendanĝeraj ne vastaj nigraj lipharoj kaj la glata, pudrita kaj ekzakte razita mentono, kaj en kies mezo kavoj ridetis. Ankaŭ la nazeto estis gracia, zorgema kaj kvazaŭ pergipse formita. Sed en la malgrandaj nigraj okuloj brulis malica brilo. La fremdulo aspektis kiel pufvanga knabo kun la staturo kaj konduto, la voĉo kaj barbokresko de viro. El li radiis gaja malico, insida bonkoreco. Jen lin do sidis kaj tute ja sen vizaĝo de atendanto. Ŝajnis, ke li enuis eĉ ne momenton.

Liaj brulantaj okuloj elĵetis fajrerojn sur la objektojn de la ĉambro, sur la tapiŝon kaj tiun antaŭ la tablo, la vazon el blua ŝtono, la kusenon kun la brodaĵo, kvazaŭ li dezirus ekbruligi ĉion. Tiel li sidis, vigle okupate kaj komprenigante, ke lia agema spirito ankaŭ pri la plej indiferentaj aĵoj en la mondo kapablas interesiĝi.

Ankoraŭ nun odorante, ĉirkaŭite de nubo el parfumita gajeco, sinjorino Katharina enpaŝis, kaj la viro, kvazaŭ io lin estus pikinta sur lia seĝo, eksaltis alten. "Sindone mi bonvenigas vin!" li diris. "Ni tuj volas transiri al la negoco. Nur ne prokrasti ion! estas mia devizo!"

Katharina tintis per la ŝlosiloj. Andreas observis ŝin kaj la viron silente el angulo. Li sekvis ilin, kiam ili eliris. Sur lia frunto estis frida ŝvito kaj lia koro martelis per egaj, preskaŭ la bruston krevantaj, de tempo al tempo paŭzantaj batoj. Sin apogante kontraŭ la pordo, limo inter korto kaj koridoro, li staris kaj vidis sian edzinon malŝlosi la stalon de Muli kaj eltiri la azenon. Estis sunplene kaj seke, kaj la malgranda besto ĵetis nekredeble gigantan ombbron sur la trembrilan neĝon. Antaŭ la okuloj de Andreas malheliĝis la mondo. La radiantaj ĉielo iĝis profunde blua

kaj ŝajne volis sinki kiel kurteno. Ĉiuj objektoj ŝanĝiĝis al smeraldoverdo, kvazaŭ vidate tra bierbotela vitro. Ĉio okazis en tiu magia songolumo.

La fremdulo karese manfrapis la azenon. Li pinĉis ĝin, kvazaŭ li volus konvinkiĝi, ĉu la felo sufiĉe dikas. Li tiklis la beston ĉe la orelpintoj, ke ĝi malinkline turnis la kapon kaj sin skuis.

"Nu, rigardu mem", diris la fremdulo, "Kion mi faru kun tia besto. Per tio mi ne volis diri, ke mi tute ne bezonas ĝin, sed kion mi faru kun besto? Se ĝi almenaŭ estus ĉevalo, malgranda ĉevaleto", li diris per tenera voĉo, kvazaŭ li jam parolus al malgranda ĉevalido.

"Mi jam diris al vi: temas pri azeno", redonis per voĉo energia kaj strida, kiu aŭguris nenion bonan, sinjorino Katharina.

"Certe, certe", diris la viro kun suben rigardantaj okuloj, "azeno, certe. Sed tiom malgranda azeneto!"

"Azeno ja ne estas kamelo!" kriis sinjorino Katharina.

"Vi deziras ŝerci, ha, ha, azeno certe estas azeno. Sed ekzistas kaj grandaj kaj malgrandaj azenoj, ankaŭ tute malgrandaj bestetoj. Mi jam ofte vidis multe pli malgrandajn bestetojn!"

"Do, nun vi ja komprenas!" triumfis Katharina, "Vi diras tion ja mem!"

Heziteme la viro faris kaptan movon al la monujo. Li eltiris tri bankbiletojn, ili estis tre novaj kaj kraketis, kaj ilin li nombris dufoje, tenis ilin en la aero kaj bruotis per ili ankoraŭ certan tempon. Tiam li plektis sian malgrandan grasan braketon ĉirkaŭ Muli kaj la besto trotis elen, preter Andreas. Lin ignoris la rigardo de Katharina, kvazaŭ li estus parto de la pordofosto.

Andreas okulsekvis sian azenon ĝis la pordo. La viro turnis sin ankoraŭfoje kaj salutis: "Via plej sindona servanto!" li diris.

Andreas postlamis lin. Li rigardis ĝis la fino de la strato. Jen iris la viro kaj Muli trotis ĉe la rando de la trotuaro, tute proksime ĉe la trotuara sojlo, la kara besto, la varma, malgranda estaĵo. Ĝi havis orbrunajn okulojn, kaj ĝia griza, griza korpo gastigis kaŝe homan animon.

XI

La tago, je kiu Andreas aperu antaŭ la tribunalo, komenciĝis kiel tute ordinara tago, kiel ĉiuj tagoj, tiun antaŭitaj. En la nokto, kiun Andreas sen kuseno kaj en vestoj pasigis sur la sofo, li ekformis grandiozan parolon, kies efiko ja ne povus esti alia ol tiu, ke oni pardonpetos lin kaj arestos la sinjoron, la policiston kaj la konduktoron. La mateno trankviligis Andreas. Je la deka oni ekprocesos. Preskaŭ certas, ke jam je la dekdua Andreas Pum triumfe kaj kiel posedanto de sia licenco foriros el la juĝejo.

La suno brilis iomete pli varme kaj la frostoj estis venkita. La neĝo degelis. Gutis de la tegmentoj kun dolĉa espergaja melodio. Jes, eĉ pasero komencis pepkanti. La afabla mildo de la naturo estis kiel la konsola indulgo de Dio.

Andreas ne estus fidinta je antaŭsignoj tiuspecaj, havinte pli familiaran sperton pri la leĝoj de la ŝtato. Li ne sciis, ke la bone oleo-ŝmiritaj radoj de tiu maŝino ankaŭ foje-foje - kaj precipe en negravaj aferoj - rotaciis unu de la alia sendepende, ke ĉiuj unuope muelis la oferon, transdonitan al ili de la hazardo. Nome ne nur la tribunaloj, ankaŭ la polica instanco rajtas kondamni per punoj, kaj kiu kun ĝi komencis devas unue esti nuligita de ĝi. Ŝajnis al la polico, ke Andreas kulpiĝis pro ordinara "malobeo" kaj, ke li ne plu indus la posedon de licenco, kiun li ricevis pro precipa graco de la ŝtato. Andreas Pum devis do antaŭ ĉio esti pridemandata.

Tiel okazis, ke, dum li preparis sin por la ekskurso al la tribunalo, la pordo malfermiĝis kaj kriminalagento eniris por eskorti Andreas al la polica pridemandado. Andreas prenis en sia katastrofa nekono pri la ŝtataj elementoj tiun homon de la polico por unu de la leĝoj kaj diris, ke oni fiksis la ekprocesan horon ne antaŭ la deka. La oficisto montris al li la juĝan alvokon, klarigis al Andreas la enorman diferencon per la preciza kono de homo sperta en tiu fako, tordis ĉe tio siajn blondajn lipharojn kaj diris finfine: "Devo estas devo!" Tio signifis, ke

li ne kulpis pri tio sed sian ordonon, konduki Andreas al la polico, ne povas ignori. Antaŭ la komisaro, tiel li konsilis, Andreas montru sian juĝan alvokon.

Andreas Pum konsolis sin. Kvankam li novan malfeliĉon supozis. Sed lia intelekto diris al li, ke la ŝtato ja devas mem esti respondeca pri propraj eraroj kaj, ke la ŝtatoj ne rajtas atentigi al la publikaj instancoj ties kontraŭdirojn. Tiel do li ekiris. Survoje li rakontis al la afabla kriminalagento la tutan okazintaĵon. La viro ridis elkore kaj forte, liaj bluaj okuloj flagretis kaj liaj largaj, blankaj dentoj brilis. "Al vi nenio okazos!" li diris. Kaj Andreas kolektis novan kuraĝon.

En la policejo li devis atendi. Aŭ la oficisto, kiu lin devis pridemandi, estis ankoraŭ ne ĉi tie, aŭ okupata pri aliaj aferoj. La normalhorloĝo sur la nuda muro de la oficeja ĉambro indikis la naŭan kaj duonon. Andreas proksimiĝis al la bariero, post kiu viro en uniformo transkribis nomojn kaj datojn de flavaj kartotekaj slipoj sur ruĝajn, kaj Andreas diris: "Pardonu!"

La enuniforma viro skribis plu. Li traktis la literon K. Dum tio li deziris ne esti ĝenata. Nur tiumomente, kiam li foliume atingis la unuan nomon, komenciĝanta per L, li turnis la kapon.

Andreas montris al li la juĝan alvokon. La uniformulo demandis, kia historio estas tio jam denove, kvazaŭ travivinte jam gravan disreviĝon kun tiu personeco. Andreas rakontis la tutan okazintaĵon pli ol detale. En la ĉambro atentis du stratfraŭlinoj. Ili ridis.

La uniformulo kunfaldis denove la juĝan alvokon kaj diris: "Atendu!" Tiam li skribis plu. Finfine pordo malfermiĝis kaj voĉo de nevidebla homo vokis: "Andreas Pum!"

Andreas iris ĝis antaŭ iu sinjoro kaj klinis sin unufoje, dum tio forglitis lia lambastono iomete, tiel, ke li falis kun la mano kontraŭ la skribotablo, malantaŭ kiu la komisaro sidis.

"No, no!" diris tiu.

"Permesu, mi petas", balbutis Andreas, "mi havas jen alvokon!"

"Tion mi scias", diris la sinjoro, "respondu, se vi estas demandita."

Post tio li komencis laŭtlegi la raporton de tiu policisto, kiu notis Andreas. Atingante la parton, ĉe kio la

licenco estas menciita, li ŝvingis ĝin iomete alten, tiamaniere, ke Andreas povis vidi ĝin.

"Ĉu tiel veras?" demandis la komisaro.

Li estis juna viro kun tre alta starkolumo kaj tre malgranda svelta vizaĝo. Lia pinta mentono preparis sin fuĝi en la kolumon. Li parolis per raŭka voĉo. Dum tio li glatigis sian frizon ambaŭmane kaj kontrolis per molaj fingropintoj ĉiam kaj ĉiam ree la rektan linion de la hardislimo.

"Jes, diris Andrea, "sed ne tute."

"Kiel do alie?" demandis la komisaro.

Andreas rakontis sian historion la trian fojon. Tiam li rapide elpoŝigis sian juĝan alvokon kaj montris ĝin al la komisaro. Tiu rigardis al la horloĝo kaj diris: "Tro malfrue! Kial vi tion ne diris tuj!"

"Kion mi nun faru?" demandis Andreas.

"Nun ni unue nuligos vian aferon."

"Kiom longe tio daŭros?"

"Tio tute ne koncernas vin", kriis la komisaro. "Tute ne vin" - li ripetis - kaj eksaltis. Li komencis paŝadi en la ĉambro tien kaj reen. Li pugnobatis sur la tablon kaj kriis: "Tia impertinenteco!"

Andreas sentis, ke lia sango torentis en la vizaĝon. Malamo kaptis lin kontraŭ la oficisto, skuis lin, ke li tremis. Per bastono li batis sur la plankon. Salivo kunfluis en lia buŝo. Li elkraĉis.

La oficisto pugnigis la manojn. Andreas vidis lin el fora distanco. La oficisto kriis. Andreas aŭdis lian krion obtuza kaj senforta. Ruĝaj radoj cirkle turniĝis antaŭ la okuloj de Andreas. Li levis la bastonon kaj trafis la lampŝirmilon. Ĝi tintis akrasone. Du viroj ĵetis sin al Andreas.

"Dudek kvar horojn!" kriis la oficisto. Tiam li transdonis la akton Andreas Pum al skribisto: "Senlicencigo!" li ĝemis kaj diris: "La sekvanto!"

Kaj dum oni kondukis Andreas trans la korto de la konstruaĵo en la arestejon por malgravaj kazoj, forflugis ĉiuj pensoj el lia cerbo. Estis, kvazaŭ lia kranio vakuiĝus. Doloriga malpleno estiĝis en lia kapo.

XII

La arestejo por negravaj aferoj troviĝis ŝajne tre profunde. Andreas falis en duonlumon. Ĉe la pordo li haltis. Li aŭdis la knarantan ŝlosilon. Li estis kvazaŭ morta. Estingita estis la suno. Por ĉiam forflugis la tagoj netroveble disŝutitaj, kiel grandaj perditaj perloj ĉiudirekten ruliĝintaj. La vivo ne plu revenis. Ĝi estis fuŝita. Restis nenio. Mortaj estis la okuloj. Super ĉio, kion ili vidis kaj iam respegulis, etendiĝis la kurteno. Malantaŭ tiu paliĝis la bildoj pri la objektoj, la bestoj, pri la homoj. Mortinta estis Muli la malgranda azeno ĉe la stratangulo, post kiu ĝi malaperis. Roza, rondeta morto aĉetis la beston kaj strangolis ĝin per kurta grasa brako. Mortinta estis Katharina, la larĝkoksa, altmama. Mortinta estis Anna, la malgranda knabino kun la du maldikaj harplektaĵoj. La granda, blanka, larĝ-ala banto estis vampiro sur la kapo de la infano. Forviŝitaj, kvazaŭ per granda spongo, kiel nuraj iamaj kretodesegnaĵoj sur pala tabulo, estis la hospitalo, la milito, la licenco, la kamaradoj, inĝeniero Lang, Willi, ties fianĉino, la gurdo kaj la tramo. Nur kun subtilaj, nebuliĝantaj konturoj ili blovetis tra la memoro.

La lignejo montriĝis el la mallumo de la ĉelo, kvazaŭ ĝin balais rapidpentristo per ege hasta penikstrio sur tolon. Jen estas Kastor, la hirta hundo kun la verde brilantaj okuloj, kiuj nokte fosforeskis, ĝis serioza vostokvasto, kiu ŝajne ĉiam admonis, ĉar ĝi la movojn de patra montrofigro imitis, kaj ĝiaj plumpaj surpaŝoj ja estis kiel irado sur tapiŝoj de la mallumo. Jen la barilo, brune lakita kaj odoranta je oleofarbo, kun la trifoje plektita drato sur la supra rando, kun malgrandaj zigoj kaj zagoj kiel fera vico da dentoj. La luno leviĝas malantaŭ tavoloitaj tabuloj kaj grimpas supren sur elstarantaj latoj por radie okupi la placon kaj arĝentigi la seĝpulvoron, mole kuŝanta surtere. Kaj Andreas paŝas, per armiloj kaj ŝlosiloj tintante, kun la hundo post si, apud si kaj antaŭ si ĉirkaŭ la tuta barilo. Kiam li lacas, li etendas siajn membrojn, apogas sian dorson kontraŭ la barilo, kaj lia laca rigardo glitas trans lia ventro, liaj genuoj kaj botopintoj.

Kiam li aŭdas brueton, graŭlas la hundo kaj li ekstaras atenteme, premante al si la ŝlosilojn kaj armilojn, kaj metas, kiel besto sur predopado, paŝon post paŝo kaj paŝon kaj paŝon, dum la botoj subpremas la kutiman knaradon, ĉar al tio la piedoj ilin devigas.

Li estis bona noktogardisto, li Andreas Pum, li devus esti restinta tia.

Sed li unugambiĝis.

Li perdis pecon de ŝi kaj vivis plu.

Oni povas perdi gravan, valoran, nepre necesan pecon de si mem kaj tamen pluvivi. Oni iradas per du gamboj, perdas duonon el la malfirma genuartiko, kiel pulmotranĉilo el la poŝo, kaj iradas plu. Tio ne doloras, la sango ne estas videbla, tio ne estis karno, ne ostoj, ne vejno. Ĉu ligno? Lambastono? Natura lambastono? Pli bone algluita ol la artefarita, senbrua kiel gumo kaj forta kiel ŝtalo?

Oni povis iri neaŭdeble, kaj povis paŝi laŭte. Oni povis per ambaŭ piedoj frapi la teron. Oni povis salteti. Oni povis enmane teni piedon. Oni povis kuri per ambaŭ. Oni povis fari genufleksojn simplajn kaj profundajn. Oni povis ekzerciĝi.

Ĉi tion entute kaj ankoraŭ kelkon alian ni plu ne povas fari.

Kiom da tempo pasis, ekde ni ne povis senbrue meti piedon post piedo? Ĉiuj niaj paŝoj kaŭzas sonon kaj resonon. Ni venas kun bruaro kaj foriras kun klakoj. Ni faras ĉiam bruon ĉirkaŭ ni. La lambastono pikas truojn en niajn pensojn. Homoj dugambaj preteriras nin.

La dugambuloj estas niaj malamikoj. Dugamba estas la deklivnaza sinjoro sur la platformo. Dugamba estas la krudvoĉa konduktoro. Dugamba estas la senrespekta policisto. Dugamba estas la komisaro kun la pinta mentono. Dugamba estas Katharina. Dugamba estas la ruĝvanga morto, kiu venis forpreni Muli. La dugambuloj estas "paganoj".

Pagano estas Andreas nun mem. Li estas arestita. Oni prenis de li la licencon. Li fariĝis, sen kulpo, pagano. Ĉu li alikaze estus en arestejo?

Ankoraŭ aliaj arestejas en tiu grandspaca ĉelo. Certe ili estas rabmurdistoj, sendiuloj, friponoj.

Sed ankaŭ ili estas paganoj, kiel Andreas. Li ne estas kolera al ili.

Nu jes, li ne rabis sed perdis dion.

Dion oni povas perdi. Dio falas el la genuartiko.
"Kial vi staradas?" demandis viro, sidanta sur kesto-
fundo. "Sufiĉas la spaco por pli bonaj homoj!"

Andreas sidigis.

"Vi estas invalido?" demandis la viro.

"Jes!"

"Kial vi portas tiun ladon jen sur via brusto?"

"Mi ne scias."

Ambaŭ silentas. El la profundo de la ĉelo diris raŭka
drinkula voĉo tra la aero: "Ĉu vi havas cigaredojn?"

"Jes!"

Figuro malmergigis el la malhelo kaj naĝis pli proksi-
men, dispartigante la mallumon.

Tri viroj ili estis. Kvin cigaredojn havis Andreas. Ili
decidis fumi la cigaredojn de buŝo al buŝo.

"Vi estas novulo!" diris la viro kun la raŭka voĉo.

"Cedu la ladon malalten!" kriis unu.

La tria iris al Andreas, ŝiris la krucon de lia brusto kaj
rigardis ĝin, tute proksime ĝin metante antaŭ la okulojn.

"Ili donis al vi konsolan plastron!" diris tiu unu.

"Kiu paragrafo?" demandis la raŭkvoĉa.

La raŭkvoĉa estis "juristo".

Iu tradukis: "Kion fian vi faris, li volas scii!"

Andreas diris: "Mi ne scias. Mi ja estas ĉi tie ne en
taŭga loko. Mi havas alvokon por hodiaŭ!" Kaj li montris
sian alvokon.

La "juristo" legis. Li ekbruligis laŭlonge de sia panta-
lono alumeton, troviĝintan sen skatolo en lia poŝo, kaj
legis. "Rapidu, rapidu, homo! Kioma horo nun estas?"

"Estas ja tro malfrue", diris Andreas.

"Nu, tiam ili ja juĝis vin malliberejen!"

"Kial?"

"Ĉar vi ne ĉeestis tie. La tribunalo scias nenion pri la
polico. Kaj la polico scias nenion pri la tribunalo. Se vi
ne estas ĉe via proceso kaj vi akuzito, tiam vi ricevos
sekvatage la ordonon eksuferi punon. Kion do vi faris?"

Andreas rakontis la okazintaĵon en la tramo.

"Jes", docentis la raŭkvoĉa, "tio povas esti fizika minaco
kontraŭ la oficisto. Ĉiukaze ofendo al la oficista honoro.
Tio povas esti perforta rezisto kontraŭ la ŝtata potenco.
Se la oficistoj depozicias, ke vi batis ilin, la tribunalo
decidas: rabia ulo! Ses semajnojn! Ho, kial vi tien ne
iris?"

"Ili min ja venigis ĉi tien!"

"Simple ne revenu. Tiel vi ankaŭ ne devos sidi puneje. Ses semajnoj estas por mi bagatelo. Sed ne por vi. Per kio vi propre vivas?"

"Mi havas licencon! Por ludado!"

"Vendu al mi vian gurdon!"

"Sed tiukaze mi devus alporti ĝin de hejme!"

"Mi alportos ĝin al vi. Kie vi loĝas? Donu al mi signon por via ulino, por ke ŝi ekkonu min."

"Morgaŭ ni parolos pri tio", diris Andreas.

"Vi estas tre stulta", diris la raŭkvoĉa. "Ĉion vi tute false faris. Mi akuzintus la sinjoron. Oni nur devas koni la leĝojn. Mi estus ĉin draŝinta kaj akuzinta. Kiel, propre, li aspektis? Eble oni karambolos kun li. La mondo, nome, estas globa kaj gnoma."

Sed Andreas ne sciis precizajn informojn.

La aliaj ekdormis. Unu post la alia komencis ronki.

Kun plezuro Andreas volis punsidi ses semajnojn kaj pli longe. Ĝismorte li volas esti en prizono.

Sed ne nur tie oni estas malliberulo, Andreas Pum! Kiel feraj bestokaptiloj kuŝas la leĝoj sur la vojoj, kiujn ni la malriĉuloj laŭpaŝas. Kaj eĉ se ni havas licencon, ja tamen embuskas la policistoj angule. Ĉiam ni estas kaptitaj kaj sub la potenco de la ŝtato, de dugambuloj, de la polico, de sinjoroj sur la tramaj platformoj, de virinoj kaj de azenoĉetistoj.

XIII

Sekvamatene ricevis Andreas pelveton da kafo kaj peco da pano. Li adiaŭis la tri virojn. "Ne refaru tiajn erarojn!" admonis lin la raŭkvoĉa.

La straton surirante, Andreas kredis, ke la mondo estus nove farbita kaj renovigita, kaj li sentis sin ne plu hejmeĉa en ĝi, kiel oni fremdas en ĉambro, al kiu oni revenas, post kiam ĝiaj muroj novan koloron ricevis. Fremdaj kaj malkompreneblaj estis la movoj de la homoj, veturiloj kaj hundoj. Tre strange aspektis en la svarmado de vivplena placo la biciklantoj, kiel helaj silfoj inter la grandaj aŭtobusoj kaj tramoj, ŝarĝaŭtoj kaj la nigre ŝirmitaj fiakroj. Akre flava aŭtomobilo ruliĝadis, tintegis, furiozis trans la placo. Sur ĝiaj vandoj fajris ardflame la ruĝa reklamo: "Fumu nur Jota". Ĝi estis la veturilo de l' frenezo. Tiu sidis inter kvar akreflavaj ruĝfarbitaj vandoj, kaj ĝia spiro blovis fatale el la malgranda kadrofenestro. Strange, ke mi nur nun vidas la interligojn, pensas Andreas. El tiu veturilo disvastiĝas la deliro monden. Milfoje la aŭto veturis preter mi. Kia stultulo mi estis! Tiu ne povas esti poŝtaŭto! Ja, kiel rilatu la poŝto kaj ruĝaj Jota-cigaretoj? Ja, kial la poŝto okupiĝu pri tio, kion la homoj fumas?

Mil mirindaĵojn subite Andreas ekvidas. Sur la pinto de aŝkolono troviĝas ventflago. Ĝi faras mallongajn turniĝojn, kvazaŭ ne kapabla decidi sin por certa direkto. Se oni staras proksime antaŭ ĝi kaj rigardas ĝin, oni eĉ aŭdas ĝian mallaŭtan krakadon rekte tra la strata bruo. Kion intencas ventflago sur aŝkolono? Ĉu signoj de la ĝenerala frenezo? Kion alian tio do signifas? Ĉu la tasko de aŝkolono estas montri la ventdirekton? Aŭ avizojn por prelegoj, koncertoj kaj teatraj prezentadoj?

Andreas sendis sian rigardon malespere supren al la ĉielo, ĉar eskapi li volis el la surtera frenezo. La ĉielo, nome, konsistas el senmorta klara bluo, kaj ĝia koloro estas pura kiel la saĝo de dio, kaj eternaj nuboj migras super ĝi. Sed hodiaŭ ligiĝis nubaj fragmentoj al deformitaj vizaĝoj, maskaĉoj blovetis laŭ la ĉielo, kaj dio faris

grimacojn.

Ĉar la mondo do ŝanĝiĝis, Andreas decidis pli zorgi pri ĝi kaj ne reveni en la arestejon. Li formetis sian piecon, sian sindonon, sian humilecon kaj sian kredon je la registaro, kiel malnovajn vestojn, el kiuj oni elkreskis. Timide, sed ĉiam pli kaj pli grandigante, kreskis en lia animo la ruĝa floro de la ribelo. Li estis nun kvardekkvin-jara kaj tute ne vidis ĝis hodiaŭ la frenezon de la mondo kaj ĝiajn erarajn aranĝojn.

Liaj okuloj iĝis novaj kaj malkovremaj. Lia rigardo glitis al lia maldekstra brustflanko. Li memoris, ke li ne plu portis krucon. Kaj kvazaŭ sentante la bezonon gajni anstataŭ la ordeno, kiun li akiris dum sia iama vivo, novan, al sia renaskiĝo konforman, li turnadis en sia cerbo la vorton "pagano", spitan vorton, kiu subite ricevis alian sencnon, kaj per kiu li, kvazaŭ per ordeno, sin mem dekoraciis.

Andreas deklaris sin pagano. Li kredis je nenio plu. Nek je la leĝo, nek je la Savanto. Granda estis lia miro, ke li eĉ iam ajn povis kredi. Jam li kalkulis sin per petola kuraĝo al la gildo de la krimuloj. Liaj paŝoj iĝis timemaj kaj lia rigardo embuska, kiam policisto preteriris. Kvazaŭ li estus persekutletere kaptenda murdisto, Andreas ŝteliris tra la apudstratoj de la urbo.

Tiel li alvenis, ne propravole, antaŭ sia malnova loĝejo. Ŝajnis al li, ke ne pli frue ol hieraŭ li forlasis ĝin. Li frapis, kiel kutime kaj kiel tio necesis pro la profunde dormanta Willi, per la bastono trifoje kontraŭ la pordon. Li aŭdis la dormeman oscedon de Willi kaj la klakojn de liaj fortaj ostoj, kiuj ĉiam aŭdebliĝis, kiam Willi streĉis la brakojn.

"Jen vi ja estas denove!" diris Willi. "Kio do estas via koncertfortepiano?" Ekvidante Willi, Andreas kolektis tre multe da kuraĝo. Li havis la konfidon, kiun oni sentas al frato. En familiara duonlumo troviĝis la ĉambro. Hejmeca, karigiinta odoro de acida mucideco venis el la muroj kaj el la malpura kuŝejo. Kaj la sama ravo, kiu kelkajn sentimentalajn homojn ekkaptas, kiam ili post longdaŭra mondvojaĝo transpaŝas la limojn de la lando, en kiu ili naskiĝis - la sama hejmravo plenumiĝis en Andreas Pum.

Willi preparis per kartonskatola kovrilo la tablon. Sur tiun li metis la kolbason, kiun li ankoraŭ nun akiris ĉe la malnova liveranto en la apudstrato. Tiam li verŝis brandon en la teglason.

"Hieraŭ ni festis naskiĝtagon de Klara!" li klarigis. Kaj li sidis kun larĝe etenditaj kubutoj, premantaj la tablon, antaŭ Andreas kaj aŭskultis ĉi tiun strangan, tiun ĉi kuri-ozan historion, el kiu li konkludis, ke ĝi povas okazi nur al tiaj idiotoj kia tiu kriplulo.

"Vi restas ĉi tie!" instrukciis Willi kun certo de homo, kiu potencon posedas kaj scias fari rapidajn decidojn. "Ni ja vidis, ĉu ili trovas vin ĉi tie!" diris Willi kaj estis vere sciivolema. Post tio li kuŝiĝis denove por dormi.

Ankaŭ Klara aŭskultis kun granda miro la historion de Andreas Pum.

"Tiel vi ja perdis edzinon kaj infanon kaj tion entute per unu fojo!" ŝi diris. Ŝi havis nome kompateman koron.

"Kiel akirite, tiel nuligite", diris Willi. Tiam li kantis la unuan strofon de stratkanto.

"Ne komencu tiajn aferojn kun la stultaj tribunaloj!" diris la molkora sed ankaŭ iomete timema Klara. "Iru tien kaj punsidu viajn ses semajnojn ĝisfine."

Sed Willi, kiu parolon pri cedemo tute ne deziris konsenti, puŝis ŝin en la dorson, tiom, ke ŝi falis trans la tablo.

Ĉi-nokte Andreas havis la ridetantan, profundan kaj virgan dormon de infano.

Sed matene venis du kriminaloficistoj. Ili ne renkontis lin ĉe lia edzino kaj eksciis de ŝi la malnovan loĝejon. Ili venis por eskorti Andreas al la arestejo. Ili venis kun li al la periferia stacidomo kaj ekster la urbo ne malgrandan distancon plu.

La punejo troviĝis en la proksimo de vastaj kampoj, larĝa konstruaĵo kun multaj krenelaj tureloj el brunruĝaj brikoj.

Tiel situis la malliberejo, reganta la landon, sankta kiel preĝejo kaj obskura kiel masonita leĝo.

La lasta, kion Andreas vidis de la mondo, estis juna katino. Ŝi eble apartenis al mallibereja gardisto. Ŝi kuris kun hela sonorileto, ligita al ruĝa rubando ĉirkaŭ la kolo, laŭ la barilo, kiu la domon de la justeco apartigis de kampa vojo. Ŝi memorigis pri malgranda knabino.

XIV

Andreas kutimiĝis al sia ĉelo tre rapide; al ĝia acida humideco, ĝia trafenetra malvarmo kaj al la multkvadrata grizo, kiu ĝia taglumo estis. Jes, li lernis distingi la fazojn de la malhelo, markantajn matenon, vesperon, nokton kaj la nebulecajn horojn de la krepusko. Pli kaj pli li hejmiĝis en la mallumo de la noktoj, liaj okuloj traboris ĝian nepenetreblon, ke travidebla ĝi iĝis kiel malhele kolorigita vitro je tagmezo. Li logis el la malmultaj objektoj, inter kiuj li vivis, ilian propran lumon, tiel, ke li kapablis observi ilin nokte kaj ili mem al li prezentis siajn konturojn. Li lernis konatiĝi kun la voĉo de la mallumo kaj la kantado de la sentonaj aĵoj, kies surdeco eksonas, kiam la bruegaj tagoj pasas. La sonoron de grimpanta onisko li povis percepti, tuj kiam ĝi forlasis la glatan mursurfacon, atingante lokon, kiu perdis la morteron kaj sin tiam montris en sia fendoriĉa briknudeco. La malabundajn rimarkojn de la granda urbo, alvenintajn ĝis la prizono, li identigis, ĉiun laŭ ĝia maniero kaj unuopa deveno kaj origino. El la plej delikataj diferencoj de iliaj sonoj li ekkonis esencon, formon kaj dimension de la objektoj. Li sciis, ĉu ekstere eleganta privatveturilo preterŝtormis aŭ nur bone konstruita fiakro; ĉu ĉevalo havis la ĉarmajn artikojn devene el nobla bredo aŭ la larĝajn hufojn el la malkara utilraso; li konis la diferencon inter vigla troto de ĉevalo, kondukanta malpezan veturileton sur surdaj kaŭĉukaj radoj, kaj la troto de tiu, portanta sur sia dorso la mastron-rajdanton. Li ekkonis la trenajn paŝojn de oldulo kaj la vagajn de juna naturamiko; la viglan saltet-iradon de facilmovo knabino kaj la celkonscian paŝaron de negocema patrino. Li povis perorele distingi promenanton disde migranto; la delikatstaturan de la krude-fortika; la fortan de la kaduka. Li ricevis la fascinajn kapablojn de blindulo. Liaj okuloj iĝis vidantaj.

La unuajn tagojn de sia aresto li ankoraŭ provis rigardi elen tra la alta kadro. Li ŝovis la lignan benkon al la fenestro kaj persistis senĉese, ĝis li per ambaŭ manoj ek-kaptis la malsupran randon de la mura kavono, en kiu trov-

iĝis la kadro. Aĥ! Li estis nur unugamba, la malakra lambastono eĉ ne sukcesis sur la glata muro la mizeran apogon, kiun lia sana piedo ankoraŭ povis palpadi al si, kaj pende li pasigis sekundojn kun sia tuta pezo sur la spasmantaj lastaj membroj de siaj fingroj. Tiel lia korpo ŝvebis en la aero, kaj lia animo inter la sopiro vidi magran sektoron de la mondo kaj la timo fali suben kaj morti. Neniam antaŭe li eksciis pli grandan danĝeron. Nome neniam - eĉ ne batalkampe - li sentis tiom la valoron de la vivo, tiun malgrandan vivreston, kiun la ĉelo koncedis al li. For de ĝi per ruzo kaj mil penoj li ŝiris la mallongan elrigardon monden tra la kota vitro post la malvastaj kvadratoj, kaj revenis spite al tio refreŝigita kaj pli riĉa suben en la eternan malhelgrizon, kvazaŭ la terajn belojn ĉiujn ĝuinte. Tiuj malgrandaj ekskursoj, kiujn liaj okuloj entreprenis, ĉiam repacigis lin denove kun la senkompato de lia karcerio; ili pruvis ja al li, ke eĉ la ĉelo, kiu izolis lin, ne ekzistis ekster la mondo kaj li do ankoraŭ apartenis al la vivo. Li estis kriplulo kaj ne senlima mastro super la tero kiel dugamba homo. Li ne povis iri sensone, salteti aŭ kuri. Sed li rajtis almenaŭ lami kaj suriri la teron unuplande - post ses semajnoj, post ses mallongaj semajnoj.

Foje-foje li esperis revidi la malgrandan katinon, kiun li renkontis dum la eniro en la korektejon. Sed pene lia rigardo kaptis nur la obskuran pinararbaran randon kaj mallarĝan ĉielstrion; iam kaj iam flugilhavan beston; rapideman nubon; unufoje eĉ la mallarĝajn planeojn de aeroplano, kies bruon li daŭre aŭdis; - ĉar aviadejo estis proksime. Malgraŭ tio li sopiris al la juna katino. Ŝin li vidis en la lasta momento de sia libero. Nokte liaj nun pli subtilaj oreloj aŭdis ĉarman feblan tintadon. Li iluziis al si, ke tion kaŭzis la tintilo, pendilo ĉirkaŭ la kolo de la besto.

Sed baldaŭ li tion forgesis. Li ne plu grimpis mursupren. Intima ŝajnis al li la ĉelo. Mil bildoj ekfloris el lia soleco. Mil voĉoj plenigis ĝin. Li ekvidis porkon, kiu hazarde kun la rostro glitis en la fendon inter la stala pordo kaj muro kaj ne povis liberigi sin. Li konis tiun bildon. Kiel knabo ĉe sia onklo, kiu estis kaj impostkolektisto en ruraj distriktoj kaj bienposedanto, li ĝin jam vidis. Li ekvidis hirundan neston en necesejo; ĉenitan papagon, provantan bekhaki liajn fingrojn; la komponon kaj la denton

muntitajn en arĝenton sur la horloĝa ĉeno de lia patro; la naskiĝon de papilio el la maldika fragila krizalido en herboplenigita alumetskatolo; sekigitajn anemonojn en herbario; kantlibron kun oritaj paĝrandoj kaj la unuan kravaton el violkolora silko.

Andreas estis multe okupata. Li devis ordigi la bildojn. Kiel infano sur la rungoj de ŝtuparo, same la novnaskita Andreas grimpis sur tiuj malgrandaj memoroj cedeme supren. Ŝajnis al li, ke li ankoraŭ longe por atingi sin mem devis grimpi. Li ektrovis sin mem. Li fermis la okulojn kaj ĝojis. Malfermante ilin, li eltrovis novan pecon, rilaton, sonoron, tagon kaj bildon. Li sentis sin, kvazaŭ li komencus lerni kaj antaŭ li malkaŝiĝus sekretoj. Tiel li do vivis kvardek kvin jarojn en blindeco, nek sin nek la mondon konante.

La vivo do certe estis alia, ol kia ĝin li rigardis. Virino, antaŭe en amo al li, perfidis lin en malfeliĉo. Koninte ŝin, tion li neniam estus spertinta. Sed kion li konis de ŝi? Nur la koksojn, la mamojn, ŝian karnon, ŝian larĝan vizaĝon kaj la lascivan spireton, kiun ŝi eligis. Je kio li kredis? Je dio, je la justeco, je la registaro. Dum la milito li perdis sian kruron. Li ricevis premion. Eĉ bagatelan protezon ili ne havigis al li. Dum jaroj li portis la krucon kun fiero. Lia licenco, la permeso turni la gurdan krakon en la kortoj, ŝajnis al li la plej alta rekompenco. Sed la mondo montriĝis iutage ne tiel simpla, kiel li rigardis ĝin dum sia pia naiveco. La registaro ne estis justa. Ĝi ne nur persekutis la rabmurdistojn, la poŝtelistojn, la paganojn. Evidente okazis, ke ĝi eĉ premiis rabmurdistojn, ĉar ĝi ja la piulon Andreas enprizonigis, kvankam li ĝin adoris. Ĉi-simile dio agis: Li eraris. Ĉu dio estas ankoraŭ dio, se Li eraras? Kio do ankoraŭ restas lia propra mem? La patrujo? Al kiu ĝi apartenas? Al tiu, kiu turnas la gurdan krakon? Aŭ al Willi, kiu ŝtelis la kolbasojn? Aŭ al la komercisto, kies propraĵo ili estis? Al la juĝisto en talaro? Al la gardisto, kiu kondukis la arestitojn promenejen?

Ĉiumatene promenis la loĝantoj de tiu domo en la korto. La korto estis dense pavumita, malgrandaj brikoj kovris la grundon, kaj oni tute ne vidis pecon da polvo, pecon da tero. Granda evento oni rigardis kokinon, kiu ofte en la korto aperis. Cent kvindek kvar pundomanoj pilgrimis, unu post la alia, kun mallevitaj kapoj ĉiam en la direkto dekstre-maldekstren, ĉiam laulonge de la kvar

muroj. En la mezo iris la blank-brune makulita kokino kaj la gardisto, kiu enmane svingis kanvipeton kaj ĉekokse portis revolveron. Sur la maldekstra maniko la arestitoj havis siajn nigrajn numerojn. La procesio komenciĝis kun unu kaj finiĝis kun cent kvindek kvar. Kvarfoje ili sekvis la kortan kvadraton. Post tio la horo pasis. Ili ne parolis inter si. Ili rigardis sopireme al la kokino. Unu el ili iam kaj iam ridetis. La sepdek tria estis Andreas Pum.

Unufoje li ekvidis en la korto pecon da gazetpapero. La gardisto ĵus rigardis en la malan direkton. Andreas levis la paperon kaj kaŝis ĝin en sia mano. Li estis tre scivolema. Tio egalas, kvazaŭ homo aperus en lia ĉelo por paroli kun li. Eble, ja, verŝajne tiu papero entenis gajan aŭ strangan historion. Post ĉifado li konservis ĝin inter du fingroj. Tiel li sukcesis laŭregulare teni la manojn sur la pantalona kunkudro. La vojo ŝajnis al li longa, la horo senfina kaj la korto terure pligrandiĝinta. Finfine eksonis la gardista fajfo. Andreas atingis la ĉelon kaj atendis, ĝis liaj okuloj kutimiĝis al la malhelo. Tiam li disfaldis la paperon, ŝovis la benkon al la fenestro kaj sidiĝis. Li legis:

"Privataj publikigoj

Kiel gefianĉoj konigas sin respektplene fraŭlino Elsbeth Waldeck, la fianĉino de Prof. Leopold Waldeck, kaj Dr. med. Edwin Aronowsky, fraŭlino Hildegard Goldschmidt kaj Dr. jur. Siegfried Türkel, fraŭlino Erna Walter kaj sinjoro Willi Reizenbaum. La bankdirektoro Willibald Rowolsky kaj sinjorino Martha Maria, denask. Zadik, anoncas ege ĝojigitaj la naskiĝon de filo. Sinjorino Hedwig Kalischer, denask. Goldenring, funebras pri la forpaso de sia edzo Leopold Kalischer, kunposedanto de firmao König, Schrum & Kalischer, prezidanto de la kontrolkonsilio pri la Asocio de la Komercista Kemikaĵa A.S., kiu post turmentaj suferoj mortis en la 62-a vivjaro. Sinjoro Johann Kotz anoncas la vivfinon de sia edzino sinjorino Helene Kotz. Mineja direktoro kaj asesoro Harald Kreuth donas informon pri la morto de sia patro Sigismund Kreuth. En la 77-a vivjaro post longaj suferoj forpasis la intima sanitara konsilisto Dr. med. Max Treitel."*

Andreas turnis la paperon kaj legis en la dorsa paĝo:

"Se tio montriĝas vera, tiam oni komprenas nun, kial en

la lastaj tagoj la Poincaré-gazetaro tiom intence kaj diligente gloris la ekspertan raporton porfranca - por ŝirmi sian mastron. Daily Mail, rekte informita el Parizo, apartenas al difinita formo..."

Jen ĉesis la papero.

Andreas provis imagi la homojn, pri kies vivo li la plej gravajn etapojn eksciis. Fraŭlino Elsbeth Waldeck estas blonda kaj nobla, la filino de profesoro, la fianĉino de kuracisto. Doktoro Siegfried Türkel eble estas advokato, kaj certe oni ne malbonŝancus konatiĝi kun li. Eble oni eĉ neniam enprizoniĝas, se oni kun advokato Türkel estas konata. Ja, faktas tiel: ĉiuj, kies nomoj troviĝis sur ĉi tiu peco de la gazetpapero, supozeble estas amikoj unu kun la aliaj. Doktoro Aronowsky kuracas sinjorinon Martha Maria, naskitan Zadik, kaj la mineja asesoro Harald Kreuth prunteprenas monon de bankdirektoro Willibald Rowolsky. Por tiu advokato Türkel pledas antaŭ la tribunalo kaj advokato Türkel faras kondolencan viziton al sinjoro Johann Kotz. La nomoj saltis memstare el la linioj kaj interligiĝis alterne. Jen hopis la sanitara konsilisto al la asesoro kaj tiu al la advokato. La nomoj vivis. Ili alprenis homajn formojn. Andreas rigardis sur la presitan paperon kiel en ĉambron, en kiu ĉiuj tiuj homoj enestas, iradas kaj interparolas.

Ĉi tiu bildo emociis lin. Li imagis la societon tre brila. Ŝajnis al li, ke li malkaŝis la sekreton de la mondo. Li kredis scii, ke li enĉelis, ĉar li ne konis unu el tiuj fianĉoj, naskitoj kaj mortintoj. Kial la presaĵo ne menciis, ke sinjoro Andreas Pum licencposedanto post maljusta traktado kaj neaŭdite ricevis kondamnon al ses semajnoj?

XV

Tio ofendis Andreas Pum. Nome ankoraŭ nun subbrulis en lia povra animo resteto da fiero pri lia pozicio kaj publika graveco, pri lia invalideco kaj lia kruco, kaj eĉ pri la licenco, kiun oni forprenis de li antaŭ ne tre longa tempo. Andreas sentis la honton de neglektita homo, sin preparinta por kariero. Ke oni ĝuste lin enkarcerigis, ke oni ĝuste lin devigis al paganeco, estis maljusto, estis kruela, nepardonebla kaj krima. Kiom da tempo propre pasis, de kiam li preskaŭ kun la digno de oficisto, nu, sed ĉiukaze kun la ditima sento de pastro, licencenpoŝe ĉe vivplena stratangulo ludis la nacian himnon, kaj li la homojn preskaŭ samtiom instigis al porpatruja amo kiom al bonfaremo? De kiam policisto paŝis al li kaj, respekto-plene salutante, retirigis, ĉar la rajton de Andreas Pum ludi la nacian himnon li devis agnoski?

Do, kio vere okazis? Ja, kiel la mondo povis ŝanĝiĝi tiel rapide?

Aĥ, ĝi ja tute ne ŝanĝiĝis! Ĉiam ĝi estis tiel! Nur, se se ni neordinaran fortunon havas, ni ne enprizoniĝos. Sed la sorto nia estas provoki skandalon kaj stumbli en la densa arbustaĵo de arbitre ege kreskantaj leĝoj. Kiel araneoj sidas la administristoj, embuskante en la fajnamaŝaj retoj de la dekretoj, kaj estas nur pritema demando, kiam ni la predo falas en ilin. Kaj ne sufiĉas, ke ni iam perdis kruron. Ni devas perdi nian vivon. La registaro, kiel ni nun ekkonis ĝin, ne plu estas io fora, alte super ni troviĝanta. Ĝi havas ĉiujn mondajn neperfektaĵojn kaj ne kontakton al dio. Antaŭ ĉio ni spertis, ke ĝi absolute ne estas unueca potenco. Ĝi partiĝas en polico kaj jurisdikcio kaj kiu scias kiom ankoraŭ multaj ministerioj. Povas esti, ke militministro dekoracias iun per ordeno, kaj la polico tamen lin enprizonigas. La tribunalo alvokas lin al si kaj sinjoro komisaro agas sammaniere. Tiel kelkiu iĝis sendia, pagano kaj anarkisto.

Foje-foje Andreas pensis, ke necesus esti denove pri-demandato. Kaj unufoje, kiam la direktoro de la punejo, kiel ĉiusemajne laŭ reglamento, inspektis la ĉelon, An-

dreas rakontis al li sian historion. La direktoro estis tre severa viro, sed kredis, ke la ekzisto de la ŝtato estas dependa de la amplekso de la justeco, aplikata inter la patronadaj limoj liaj. Li farigis protokolon kun Andreas Pum kaj promesis "aranĝigi la aferon".

Ekde tiu tago plenumiĝis en Andreas nova malgranda espero. Nu, kvankam li ne sciis al kiu li revenu. Kvankam li perdis la plej gravan, kion en libero homo bezonas por komenci novan vivon per gaja humoro kaj sukcespromesa forto: nome la kredon, la hejmon de la animo. Kaj ankaŭ lia korpo ne havis hejmon plu. De Katharina li volis eks-edziĝi. Verŝajne ŝi jam mem prezentis al la jura instanco la divorcan plendon. Ĉu li revenu al Willi? Farigi strat-almozulo? Ĉu li ĉi-kaze ankaŭ ricevus la licencon ree? Ĉu sume ne estus pli bone, se li restus en ĉi tiu ĉelo, libervole, tutan vivon?

Iutage li vekigis tre frue. Li ne sciis, kioma horo estas, sed ĉiukaze ne povis esti jam la sesa. Ĉar je la sesa la arestitojn oni ordinare vekis. Ĉe la lokó, kie oni forĝegis lian kruron, li sentis dolorojn. Do certe okazis iu grava ŝanĝiĝo de la vetero. Subite aŭdebliĝis softe plaŭdantaj gutoj. Evidente pluvis.

Andreas stariĝis. Li albukis sian lambastonon kaj poziciigis sin sub la fenestro. Nun li aŭdis la pluvon tutklare. Se la fenestro ne estus metita en tiel profunda muraper-turo, tiam la pluvo tamburus eĉ kontraŭ la vitro. Tiel do de tempo al tempo klakis sola guto kontraŭ krada stango. Sed ĉiukaze estis fakto: pluvis.

Subite aperis el jam entombaj jaroj tago el la junaĝo de Andreas. Tiel li ellitiĝis noktomeze, pelita de mal-trankvilo, kaj konstatis poste, ke la potenco de la longa vintro rompiĝis. Tiutempe li tute ne povis atendi la mate-non kaj ankau nun li tion preskaŭ ne eltenis. Ja, kio emociis lin tiel? Jarón post jaro li rigardis kutima afero tra-vivi la regulan ŝanĝon de la sezonoj, kaj pli ol tridek jar-ojn la unua pluvo ne impresis lin. Li devis serĉi tian en longe forgesita junaĝo. Kaj li vidis la mallarĝan strateton de la tute malgranda urbo, en kiu li naskiĝis, kaj kiel ĝi la enmarŝantan printempon salutis, sendante ludantajn in-fanojn al ĝi kaj akvokuvojn, kien la pluveroj kaptiĝu; kiel ĝi siajn defluejajn kradojn malfermis, ĉar ili estis ŝtopitaj, kaj kiel la pluvo senbare kaj per obstine sin ŝetantaj, ŝaumaj, gargarantaj torentoj invadis en la subejojn de la

strateto, kiel la pluvo la vintrajn neĝrestojn ĉe la trotuara rando per detrua kolero forigis, degeligis, ŝanĝis al nenio; kiel ĉiuj infanoj el bunta kartono konstruis gajajn ŝipetojn kaj kun nudaj piedoj kaj suprenfalditaj pantalonoj kuris en la stratmezo, kie akvoflakoj, en la pavimkavoj, sin kolektis al malgrandaj lagetoj; kiel la pajleroj naĝis kaj sin turnadis, ankoraŭfoje montrante mallongan kirlodancon, antaŭ ol la ĉion neniigantaj amasoj ilin suben tiris en la malfermajn kanalojn.

Aĥ, iĝis printempo kaj li ne vidis tion! La mondo ŝanĝiĝis kaj li estis kaptita.

Nun frapis la gardisto, kaj Andreas kriis: "Jen!" tiel rapide, ke la singardema oficisto malŝlosis la pordon, rigardante per mirigita suspekto al Andreas en vestoj. "Ĝam ellite?" demandis la gardisto.

"Aĥ, mia genuo doloras!" respondis Andreas.

"Hodiaŭ ne elĉeliĝo!" diris la gardisto kaj ŝlosis la pordon.

Ho, kial hodiaŭ ne elĉeliĝo?

La mallumo heliĝis, malrapide solvigante en la kutima malhelgrizo. Tagiĝis kaj la pluvo pli kaj pli kvietigis sian voĉon. Subite ekpepis birdo. Tuta birda grupo pepis. Kelkaj paseroj interpuŝis sin kontraŭ la krado. Ili kriis kaj batis per la flugiloj.

Andreas observis la birdojn kaj ridetis. Li ridetis milde kiel avo spektanta la ludojn de siaj genepoj. Neniame li speciale zorgis pri paseroj. Sed nun ŝajnis al li, ke li devus nuligi malnovan kulpon al ili. Volonte li manĝigus ilin per paneroj. Li planis peti la gardiston pri tio.

Kiam oni alportis al li la manĝaĵon, li petis la gardiston resti momenton. "Aŭdu", li diris, "volu alporti ŝtuparon! Mi deziras disĵeti kelkajn panerojn por la kompatindaj paseroj!"

Eĉ se Andreas estus troe postulinta de la gardisto transdoni ĉiujn ĉelajn ŝlosilojn, la surprizo ne povintus esti pli granda. La oficisto deĵoris ĉi tie dudek ses jarojn. El ĉiuj inter la miloj da areŝtitoj, konfiditaj al lia severa patronado, neniu iam esprimis tian frenezan deziron. La gardisto pensis, kaptite en sia profesia suspektemo, eco, kiun li adoptis komplete kiel duan naturon, pensis tuj pri iu ruzaĵo de prizonulo. Li lumigis Andreas poŝlampe por esplori ties vizaĝon.

"Kio igas vin pensi pri tio?" diris la gardisto.

"Mi kompatas ilin, la povrajn birdetojn!" diris Andreas per tiel skuita voĉo, ke la gardisto komencis kredi, ke Andreas estas freneza.

"Ne ridindigu vin!" li diris. "La Sinjoro zorgas pri birdoj. Manĝu pli taŭge la karan panon sola!"

"Tio estas via opinio?" diris Andreas. "Ĉu certas tiel, ke dio zorgas pri birdoj? Kial Li tiam ne same zorgas pri homoj?"

"Tio ne estas via afero!" redonis la oficisto. "Kaj ankaŭ ne la mia. Pro kio ja ni havas leĝojn? Mi konas miajn regulojn. Estas malpermesate porti ŝtuparon en la ĉelojn. Se vi malsanas en la cerbo, vi devas anonci vin ĉe sinjoro doktoro! Mi povas ja noti vin, tiam vi venos al la kuracista primaroda vizito. Nu, se la direktoro donus al vi permeson, tiel vi ja ankaŭ rajtus manĝigi la birdojn. Sed petskribon vi devas fari."

"Mi volas fari petskribon." diris Andreas.

La oficisto notis la deziron en sian deĵorlibron. Post horo li alportis paperon, inkon kaj pupitron. "Skribu vian peton", li diris, "sinjoro direktoro permesis tion."

Andreas petis la oficiston pro helpo. Tiu eklumigis kandelon kaj surnazigis siajn okulvitrojn. Tiam li diktis:

"Al la altaŭdinda moŝta direkcio!

Finnomito petas pri la konsento unufoje tage al la paseroj kaj same al birdoj ĉiuspeciaj meti aprobite sur sian ĉelfenestron panon kaj manĝorestojn.

Subskribo: Andreas Pum, nuntempa arestito."

Ĉi-petskribon enpoŝigis la oficisto.

Posttagmeze venis la doktoro. Li pridubis la spiritan sanon de Andreas Pum. Li komencis paroli kun la arestito. Andreas, kaptante la okazon, rakontis ankaŭ al la kuracisto sian historion.

La doktoro konsolis. La direktoro, tiel li diris, ja aranĝigos la aferon. Andreas do havu konfidon.

"Sed manĝigi la paserojn oni al vi ne permesos! La afero estas, por esprimi primitive, tro komplika. Oni ja ne povas porti ŝtuparon al vi en la ĉelon!"

"Kial mi faris do petskribon?"

"Tion postulas la reglamento. Se vi havas deziron, vi devas ĝin esprimi skribe. Sed oni ne plenumos ĝin al vi." La doktoro ridetis. Li estis olda korpulenta sinjoro, kun grizaj stoploj sur la vangoj kaj duobla mentono. Li portis eksmodajn rande oritajn okulvitrojn. "Transcedu do al la Kara

Dio la zorgon pri Liaj birdoj!"

"Aĥ, sinjoro doktoro!" diris Andreas malgaje. "Kelkaj diras: Ni do transcedu al Dio la zorgon pri ĉi tiu homo! Tiam Dio ne zorgas!"

La doktoro ridetis denove: "Efikas ne sanige esti filozofa. Por tio ne sufiĉas via forto. Oni devas kredi, kara amiko!" La doktoro jam sciis, ke li debatas kun pajaco; kaj ankaŭ ke ĉi tiu estas sendanĝera. Cetere, sume punsidi tiu devis ankoraŭ tri semajnojn. Sekve li decidis lasi Andreas al si mem kaj al siaj filozofiaj pensoj. Krome, ĉi-tage la doktoro atendis sian nevinon. Urgi stacidomen li ankoraŭ devis kaj eĉ antaŭe hejmen. Kaj ĉar li estis filantropo, li prezentis al Andreas la manon.

Malfrue en tiu tago, eble horon antaŭ la ekkrepusko, vidis Andreas, kiel ekstere malfermiĝis la ĉielo. Peco da brilanta bluo videbliĝis eĉ tra la eta malpura vitro. Kaj denove bruegis la paseroj.

Tiam li perceptis la facilmovan trotadon de ĉareto, kiu regule aŭdebliĝis en ĉiu tago. Andreas meditis, al kiu ĝi povus aparteni. Eble ĉiutage riĉa sinjoro veturis al sia najbara bieno. Li komencis imagi la sinjoron. Li vidis lin: kun dika, bruneta vizaĝo, en leda paltojako, kun verda ĉapeleto sur la kapo. Tiam li aŭdis la gracion paŝetadon de juna knabino. Poste alfulmis aŭto de ie kaj pneŭmatiko eksplodis per laŭta krako. Peza ŝarĝaŭto preterklakegis. Anseroj kriis. Ĉiuj tiuj bruoj vekis la sopiron en Andreas al la vido sur la straton.

Kvankam nun estis nur februaro, Andreas supozis, ke la burĝonoj sur la salikoj kaj kaŝtanoj jam devus esti sufiĉe grandaj. Li pensis pri ili kun la sama tenero, kian li dediĉis al la birdoj. Li planis estonte fari longan promenadon, kondiĉe, ke oni permesos al li la liberon.

En tiu nokto li ekdormis malfrue. Li havis dolorojn en la genuo. La vento furiozis ekstere kaj en la longaj malliberejaj koridoroj.

Sekvatage estis ree inspektado. La direktoro diris, ke la afero progresas bone. Post du semajnoj ĝi povus esti finigita. Do Andreas ricevos la liberon semajnon pli frue. Oni aranĝos novan proceson. Tiam Andreas ja povos plendi ĉe la tribunalo. Tiam oni ja ekkonos la maljustaĵon, deklarante Andreas senkulpa. La direktoro volas ĉiukaze skribi eksterordinare bonan prijuĝon. Tiam prijuĝon, kian ankoraŭ neniam li skribis. Kaj koncerne al mangiĝado por

la paseroj, tia kaj similaj aferoj ne estas kutimo ĉi tie. La malliberejo ja ne estas bestprotekta klubo. Ĉi-momente malkovris sinjoro direktoro, ke la kuvo, en kiun Andreas devis neceseji, ne staris apud la fenestro sed en la benka proksimo. Kaj ĉar sinjoro direktoro preskaŭ same tiom amis la ordon kiom la humanecon, li diris severe: "Sed la devojn viajn ne neglektu!" Kaj precize kiel Willi li aldonis: "Ordo devas esti!" Li foriris, kaj post li tintetis la gardista sabro.

XVI

Unu tago estis pli bela ol la alia.

Tion oni sentis ne nur en la korto, plenumante la laŭ-reglamentan promenadon. Oni sentis tion eĉ malpli en la korto. Ĝia aero nome estis mucida kaj, kvankam super ĝiaj altaj muroj la ĉielo volbigis, ŝajnis, ke nevidebla sternaĵo kuŝis streĉita super ĝi. Neniam venis la suno en la korton. Pro tio ĉiam malsekis ĝia pavimo, kvazaŭ eligante ŝviton. Tio montriĝis kiel malsano de la pavimŝtonoj.

Cetere, ĉiutage venis la paseroj en amasegoj antaŭ la ĉelfenestron, kvazaŭ ili volus memori Andreas pri lia promeso. Tio afliktis lin. Li vidis supren, dolorplene rigardante al la bruantaj malgrandaj animoj. Li mute oratoris, kaj lia koro parolis al la bestoj, dum liaj lipoj ne movis sin. Miaj karaj malgrandaj birdoj, multajn jardekojn mi estis fremda al vi kaj vi al mi indiferentaj, samkiel la flava ĉevalsterko stratmeze, per kiu vi nutras vin. Nu jes, mi aŭdis vin pepi, sed tio estis egala al mi, kiel la burda zumado. Mi ne sciis, ke vi povus havi malsaton. Mi apenaŭ sciis, ke homoj, do miaj egaluloj, malsatas. Mi apenaŭ sciis, kio doloro estas, kvankam mi milit-servis kaj perdis gambon same kiel mi mem faligus ĝin el la genuartiko. Mi eble ne estis homo. Aŭ mi estis malsana je dormanta koro. Nome, tio eblas. La koro longe dormas, tik-kaj-takas, sed krom tio ĝi estas kvazaŭ morta. Proprajn pensojn ne kreis mia povra kapo. Nome, la naturo ne benis min per klarvida ekkompreno, kaj mian feblan intelekton trompis miaj gepatroj, la lerneja klerigado, miaj instruistoj, la sinjoro serĝento kaj la sinjoro kapitano kaj la gazetoj, kiujn oni por legado donis al mi. Malgrandaj birdoj, ne koleru! Mi obeis al la leĝoj mialandaj, ĉar mi kredis, ke pli granda racio ol la mia ilin iam elpensis kaj nun granda justeco ilin plenumas, en la nomo de la Sinjoro, kiu kreis la mondon. Aĥ, ke pli longe ol kvar jardekojn mi devis vivi por ekkoni, ke mi blindis en la lum' de la libero kaj ekkapablis vidi nur en la mallumo de la prizono! Mi deziris manĝigi vin, sed oni malpermesis tion al mi. Kial? Ĉar ankoraŭ neniam

arestitoj havis tiun deziron. Aĥ! tiuj estis eble pli junaj, pli viglaj kaj pli prudentaj kaj pensis, vidante vin, ne pri viaj zorgoj sed pri sia libero kaj la eblo fuĝi. Ja, eĉ min vi memorigas pri la libero, vi estas la signoj de la libero, miaj birdoj, jes, mi scias, kial mi amas vin. Kaj mi scias ankaŭ, kial mi ne konis vin, kiam mi mem ankoraŭ estis ekster prizono. Nome tiam mi estis, kvankam unugamba, stulta kaj maljuna, samkiel vi, kaj ne supozis, ke mil arestejoj atendas min, embuskante en la diversaj landpartoj. Vidu! Mi deziras doni al vi iom de mia pano, sed tion malpermesas la ordo. Ĉi-tiel la homoj nomas la malliberejojn. Ĉu vi scias, kio estas ordo, malgrandaj birdoj?

La nokto alkroĉiĝis al la tago, kaj fandiĝis ree en la triumfa grizo de la mateno. La tagojn Andreas ĉesis nombri. Jaroj apartigis lin de lia antaŭa vivo. Jaroj apartigis lin de la venonta libero. Kaj kvankam li sopiris ĝin, estis al li tamen agrable kredi, ke li eble neniam trovos sian sopiron realigita. Li ege sinkis en sian doloron kaj priploris sin, kiel karan mortinton, kaj malamis siajn fuŝe pasintajn jarojn, kiel perfidemajn amikojn. Nur pri sia junaĝo li memoris volonte kaj en ĝojiga funebro.

En iu tago - li ne sciis la kioman de sia mallibereja tempo - oni permesis al li la liberon.

Kvankam li modeste kaj humile dankis al la mallibereja direktoro kaj metis sian manon en ties prezentatan, li tamen ankoraŭ horojn poste sentis la premon de la potenca direktora mano, kvazaŭ reprezentanton de malamika potenco kaj de la ŝtata kaj oficistara volo, kiu al sia viktimo Andreas Pum ne deziris redoni la liberon. Andreas iĝis ege suspektema kontraŭ la leĝoj kaj ties reprezentistoj, kaj jam tiam li ektimis la novan proceson. Ĉu oni ne traktis lin maljuste je la unua fojo? Ĉu oni ne ankoraŭfoje metus lin en la malliberejon? Li prefere volis fuĝi. La tuta monda senlimeco subite malfermiĝis antaŭ li, li vidis Amerikon, Aŭstralion kaj la al li fremdajn bordojn de la tero kaj perceptis la landon, en kiu li vivis kaj kie li spertis suferojn, tiel, kvazaŭ la nove gajnita lia libero ankoraŭ nun estus prizono, ke ĝi ŝajnis al li mallibereja korto, en kiu oni provizore rajtas libere promeni por reveni denove en la ĉelon.

Sin okupante pri tio, li iris al la antaŭurba stacidomo kaj aĉetis, atakite de neklarigebla spitemo, kiu eĉ al li

ŝajnis infaneca, bileton por la unua klaso. Tiel okazis, ke li unuafoje sidis sur verdaj remburajtoj, apogante sin vastspace en angulo apud la fenestro, metante la kubuton sur molan, ŝvelan ledon, dum li ĝojis, ke li ĉi tie sidis, kie ne estis lia loko, ke li faris maljustaĵon kaj ke li arogis al si ion, kion li ne rajtis. Li ribelis kontraŭ la neskribitaj sed tamen sanktaj leĝoj de la surtera kaj trajna ordo, kaj lia malhumila rigardo montris al la silentaj bone vestitaj pasaĝeroj, ke li estas ribelulo. Ili movis sin flanken kaj Andreas ĝojis. Li ekstaris, ĉar subite li havis la ideon, ke li vidu kaj ĝuu ĉiujn ekipaĵojn de la dua klaso, kaj komencis serĉi la necesejon en la vagona koridoro. Ĝi estis ŝlosita. Li vokis la konduktoron, kiu kontente en sia deĵorkupeo dormetis, kaj ordonis per voĉo de ekscitita sinjoro al la oficisto, ke li malfermu la klozeton. La konduktoro trovis eĉ pardonpetan vorton.

Andreas eniris kaj tuj eksaltis pro hororo. El la mal-larĝa spegulo kontraŭe de la pordo rigardis al li oldulo kun blanka barbo, flava vizaĝo kaj sennombraj faltoj. Tiu oldulo memorigis pri malbona sorĉisto el fabeloj, kiu ek-kreas respekton kaj timon, kaj kies blanka avobarbo reprezentas la naŭzan signon de perfidema amo, de hipokrita boneco kaj falsa honesto. Andreas kredis memori pri la koloro de siaj okuloj: ĉu ili iam ne estis bluaj? Nun ili glimis kun verdeta malico. Ĉu ankaŭ la koloro de la okuloj ŝanĝiĝis en la aero de la ĉielo? Kial do la okuloj restu tiaj, kiaj ili estis, dum la bruna hararo blankiĝis en la mallongaj semajnoj? En mallongaj semajnoj? Ĉu ne ĝuste tiu honorinda harkoloro pruvis al li, ke li longajn jarojn pasigis en la ĉelo?

Nun li estis oldulo, malkapabla komenci novan vivon, mortproksima. Nu, li ne volis timi. Li volis nedevigite reiri en la prizanon kaj morti. Nur mallongan tempon li ankoraŭ rajtis vivi.

Li revenis al sia sidloko. La homoj eksidis dise. Ŝajnis, ke ili estis parolintaj pri li. Tiel abrupte kaj nekredible ili silentadis. Andreas rigardis tra la fenestro eksteren, kiel iu, kiu renkonte veturas al sia morto kaj adiaŭas la buntajn bildojn de la tero. Iomete malgaja estis Andreas. Eĉ la malbelajn tabulbarilojn kaj la reklamobildojn li vidis per la doloro de la adiaŭo lasta por eternaj tempoj.

Kaj tamen, dum li foriris el la stacidomo, vekigis en lia animo nova espero. Denove li vidis la ĝojigan kirladon

de la vivanta granda urbo, kaj vidis super la kaoso de la veturiloj, ĉevaloj kaj homoj la sunon de l' estonta printempo. Kaj kvankam li estis blankhara kriplulo, sian spitemon li ne rezignis. Destinite morti, li tamen pluvivis por ribeli. Kontraŭ la mondo, la publikaj instancoj, kontraŭ la registaro kaj kontraŭ Dio.

XVII

Willi ne dormis malgraŭ tagmezo kaj la horo de la plej bela kaj profunda dormo. Andreas ne bezonis frapi al la pordo. Willi jam aŭdis la lambastonan surbatadon en la koridoro. Li malfermis la pordon kaj ekŝokigis pro la blanka hararo.

Sed por la ĉiama impertinenta gajo, kiu estis propreco de Willi kaj nun afable trafis Andreas kiel bonintenca amikeca puŝo kontraŭ la brusto, Willi trovis karitemajn kaj laŭtajn ŝercvortojn. Li ege satigis Andreas per kolbasoj kaj spritaĵoj. Tiam li alportis grandan tondilon, ligis mantukon ĉirkaŭ Andreas kaj komencis barbirmove mallongigi la blankan barbon. Li formis ĝin kvarangula kaj respektinda. Andreas vidis sin en la spegulo kaj sentis obeemon antaŭ la propra vizaĝo. "Vi aspektas kiel patro de orfoj!" diris Willi.

Post tio Willi komencis vesti sin. Tre mirigite Andreas spektis la alvenon de hele kvadratita kostumo el la mallumo de la vestokesto en la helon; de helbruna rigidĉapelo kun ripa larĝa silkobendo, kaj sunflava silka kravato. Nur mallonge, kaj Willi jen staris kiel modelo el tajlora gazeto. Liaj tro grandaj manoj sidis en brunaj ledogantoj, kies kunkudroj mallaŭte krakis. Subbrake li tenis moveblan sveltan flavan bambubastoneton kun ora pomelo. Tiam Willi diris: "Fartu bone! Mi foriras nun kontroli! Satdormigu vin intertempe! Kaj antaŭ ĉio estu senzorga!" Li perĉapele salutis kaj ŝlisis la pordon. Tiam li ekiris "kontroli".

Dum la kvin semajnoj ŝanĝigis nome grandskale la vivo de Willi. Iam kaj iam okazas, ke nin subite ekkaptegas la inklino esti agema kaj gajni monon, eĉ se ni laŭ naturo ŝatas nenifaradon. Eble, ĉar la printempo vekas en ni novan agdeziron, aŭ ĉar nia naturo nun tedita de laceco postulas alternadon sen iu rilato al la transformiĝo de la sezonoj - iutage pelas nin hazardo el nia indiferenteco, ni surpaŝas la straton, ni revenas en la mondon por petoli en ĝi kun viglaj, freŝaj sensoj ripozintaj.

Hazardo skuis Willi el la dormo. Ne nur de nun li konis entreprenemon. Li konsciis pri siaj talentoj. Ofte li jam pripensis profiti el la konjunkturo nuntempa. Li spektis, kiamaniere junuloj kun apatiaj cerboj kaj nur per la volo perlabori monon komencis malgravan aferon, ekzemple negocon per alumetoj aŭ tualeta sapo, kaj kiel ili sukcesis akiri proprafegon. Ja li rajtas arogi al si, ke pro siaj malnovaj pekoj li ne restu por ĉiam kaŝiganta antaŭ la polico. Li kapablas falsi pasportojn, kaj aspektas jam delonge ne tiel, kiel antaŭ kvar jaroj, kiam li enrompis en la Bastei-strato. Cetere, lia portreto ne gluas plu sur la urbaj afiŝkoloj. Li de nun ne devas timi ion pasintan.

Tiuj pensoj aperis ĉe li en la nokto, kiam Klara hejmenvenis kaj al li rakontis, ke la oldulo de la vir-necesejo de la kafejo "Exzelsior" mortis. Klara proponis al li timide, ke eble, provizore, nur por kelkaj semajnoj, li en la vir-necesejo transprenu la servon. Tion Willi strikte rifuzis. Printempis. La vetrajda sezono komenciĝis. Tiam multe gajneblas. En printempo ne sidiĝas viro kun liaj kapabloj libervole en fekbudon.

Sed ideo subite inspiris lin.

Tri tagojn Willi forestis por aranĝi siajn aferojn. Unue li havigis al si en butikoj, kie surdeta vidvino vendis kafo-grajnojn kaj malton, pornegocan kapitalon. Tio grandan penon ne kaŭzis. Li enbutikigiĝis, klinis sin super la vendotablon, ŝajnigis sin amtrafita, kaj priservis krom tio ankaŭ kelkajn aĉetantojn sen invito de la vidvino. Tiam li helpis al ŝi ŝlosi la vendejon, malŝaltis la lumon kaj fingrumis per la maldekstra mano sur la virina jupo, malfermante per la dekstra la tirkeston. Post tio li iris en la grandajn kafodomojn de la urbo, parolis kun la estroj kaj direktoroj kaj rimarkis ĉie malkonvenaĵojn: la necesejoj aŭ ne bone aŭ tute ne estis administrataj, li aspektis ŝokita pri tia danĝera neglekto de la higieno kaj promesis okupi sin pri la afero. Sekvamatene li prenis de la stratoj invalidojn kaj nenifarantojn kaj elektis el ili la plej fidindajn per sperta rigardo kaj rigora severo. Ĉar nur malmulte da taŭga materialo li trovis, li eĉ ne hezitis iri la longan vojon ĝis la maljunulejo. Tie vivis la plej honestaj geolduloj. Li skribis avizajn paperetojn, donis al ĉiuj interesigemuloj bagatelan antaŭpagon, hastis en la magazenojn por tualetaĵoj, mendis sapojn, unĝofajlilojn, dentpulvoron, spongojn kaj brosojn por la grandaj kafodomoj kaj

ekrimarkis, ekstere starante, ke li preskaŭ ne konscie kunprenis kelkajn botelojn da kolonja akvo. Tiujn li tuj metis en sekurlokon kaj hejmen, kaj starigis ilin piramide sur la breton super sia kuŝejo. Tiam li informis la administraciojn de la kafodomoj, ke li transprenis la "organizon" de ĉiuj vestgardejoj kaj sinjoraj kaj damaj necesoj. Kaj post tri tagoj li kolektis siajn unuajn enspezojn. En ĉiu kafodomo sidis la liaj. Trovinte necesojn jam okupitajn, li establis vestgardejojn. Li iris en sia hele kvadratita kostumo al la oficejo, gestis vigle per la bastoneto, invitis policajn serĝentojn al glaso da biero kaj sekvigis brandon, kaj ricevis koncesion, enskribitan per la bela nomo: Wilhelm Klinckowström, propre aparteninta al jam morta soldato, kies militdokumentojn li iam ekkonservis por gardi ilin de ŝtelistoj. De nun li nomiĝis: sinjoro Klinckowström, kaj foje-foje li ankoraŭ metis modestan "de" antaŭ tiun, ja eĉ sen tio, jam tre ĉarman kaj noblan nomon. Li luprenis "grandsinjore meblitan ĉambron" en la plej distinginda kvartalo, aĉetis skribmaŝinon kaj Klara fariĝis lia "sekretariino". Ŝi venis ĉiutage de lia iama loĝejo al la nova kaj pene lernis tajpi. Willi diktis malgravajn leterojn per voĉo fortigita kaj kriis de tempo al tempo. Al la dommastrino li pagis akurate kaj postulis por tio maksimuman purecon laŭ la devizo: Ordo devas esti. Klara rezignis pri sia laborloko kaj la noktan profesion. Willi montris sin fidela kaj skrupula kavaliro. Ili deziris geedziĝi en majo. Willi aĉetis robojn, somerĉapelojn, orskarabo-ŝuojn kaj silkajn ŝtrumpojn, piĝamojn kaj mamzonojn el la plej fajnaj teksaĵoj. En ĉiuj "siaj" gastoj Willi estis regula vizitanto volonte akceptata kaj servata. Li estis tre utila. Interparoli kun la polico li sciis kaj havigi malkare muzikantojn kaj la estrojn por ili. Post kiam li iutage unuafoje pensis elmigri Latin-Amerikon, li komencis ĉie rakonti, ke li estis dek kvin jarojn en Brazilo. Li priskribis detalege la vivon en Brazilo kaj pentris la landon tiom bele, ke li ĉiam pli sentis kreskan sopiron elmigri. Tiun planon li konigis al Klara. Ŝi estis de kelkaj semajnoj tre feliĉa kaj konsentis ĉion. Ŝi eĉ memoris pri maljuna onklino kaj faris al ŝi viziton kun Willi, prezentante lin sia edzo, sinjoro Klinckowström. La onklino regule ricevis malgrandajn subtenojn. La negocoj prosperis. Willi aĉetis pupojn el ŝtofo kaj silko por la damaj necesoj. Ili havis bonan debiton. Oni

observis, ke de mallonga tempo ĉiuj virinoj, en serioza aŭ pli juna aĝo, revenis el la necesejoj kun grandaj pupoj. Multo estis farenda. Ifoje mortis oldulo, kiu, eltirita el la mezo de sia inerta ava kvieto, ne eltenis la bruriĉan noktan vivon. Oni devis anstataŭigi. Kelkaj estis malhonestaj. Willi transdonis ilin al la polico sen kompato. Ordo devis esti.

Tiamaniere la sorto mirakle ŝanĝis la vivon de Willi. Li fariĝis bonstata viro. Nur tre malofte li ankoraŭ ŝtelis, por testi sian lertecon. Ordinare li aĉetis sen longe pripensi "la plej bonan kvaliton". Li ŝatis sudlandajn fruktojn. Li fumis Brazil-cigarojn. Kaŭze de malnova kutimo li ankoraŭ nun portis enpoŝe sian batringon, kun kiu li feliĉe jam trapasis multajn aventurojn. Li montris tre zorge razitan haŭton kaj trovis iom post iom plezuron porti bone tajlitajn malhelajn kostumojn de milda kaj nobla diskreteco. La plej altpreza tajloro kudris por li. Foje-foje Willi portis ankaŭ monoklon kaj, se li skribis, okulvitrojn garnitajn per bruna testudaĵo, kiuj donis al li vizaĝesprimon pri nekontestebla inteligento. Ĉar al li la okulvitrojn plaĉis, li ofte skribis en kafodomoj nenecesajn leterojn kaj kalkulojn. Fine li ekhavis la ideon skribi artikolojn por gazetoj. Li skribis "Travivaĵoj en rondo de krimuloj", kiuj portis la stampon de sincereco kaj fakscio kaj kies laŭstilajn neperfektojn oni korektis en la redakcioj. Willi vizitis la redaktorojn. Kiel brazilano kaj ĉie-lertulo li memkompreneble ne bezonis skribi stilon senmankan. Tio estis tuj komprenebla.

Willi decidis postenigi Andreas en la Café-on "Halali". Tiu restoracio ĵus iĝis malfidela al sia origina destino kaj starigis la entreprenon sur novan bazon. Antaŭe ĝi estis la kutima gastejo por maljunaj ĉasistoj kaj ĉasamantoj. Nun Willi enmodigis salonan orkestron. Iom post iom la maljunaj ĉasistoj transmigris en la eternajn ĉasejojn. Nova klientaro, junaj homoj kaj sin freŝe ŝminkintaj fraŭlinoj, komencis okupi la lokojn de la olduloj. La posedanto rompigis vandon kaj ŝanĝis du kvietajn ĉambrojn al unu laŭta. Willi ekhavis la ideon instaligi estradon en duona vandalto por la muziko. Por tio necesis konsento de la polisdona konstruoficejo. Konstruoficejo? Bagatelo por Willi. Li ricevis la permeson por konstruado de tuta balkono. Li ankaŭ havigis la monon je agrablaj interezoj, kaj gajnis ĉe tio de ambaŭ flankoj provizion. Por la vestgardejo li vekis

la intereson de iom maljuna sinjorino el la urba necesejo, kiu jam kvin jarojn laboris en tiu malgaja profesio kaj atingis ĝuste la aĝon, en kiu la virina animo festas malfruan printempon, sopirante ŝanĝadon. Nun ankoraŭ mankiŝ nur oldulo por la sinjora necesejo. Andreas posedis, laŭ la opinio de Willi, eksterordinarajn kvalitojn por tiu ĉi profesio.

Vespere venis Willi kaj forakompanis Andreas en la novan loĝejon. Li igis la maljunulon ĵuri, ke li neniam ion malkaŝu pri la pasinteco. Willi depost ĉi tiu tago nepre alparoleblis nur sinjoro de Klinckowström. Andreas miris pri tiuj grandiozaj ŝanĝoj. Afekciite de la nova majesteco, li komencis preskaŭ kredi, ke Willi vera sinjoro de Klinckowström estis. Tiamaniere li eknomis lin per tiu nomo, el kies gloro io falas ankaŭ sur tiun, kiu ĝin elparolas. Al Klara li diris: sinjorino moŝto Klinckowström. Willi komencis la negocan diskuton. "Kie troviĝas via nova uniformo?" li demandis. "Hejme, ĉe - ŝi", diris Andreas. "Alportu ĝin", ordonis Willi. Sed Andreas havis timon. Sekve Willi decidis tuj veturi al Katharina aŭtomobile.

Subinspektoro Vinzenz Topp malfermis la pordon. El tio konkludis Willi, ke propre Andreas serĉu la veran kaŭzon de sia tuta malfeliĉo en tiu juna viro. Li prezentis sin sinjoro de Klinckowström kaj rimarkis gaje, ke kurta skuo moviĝis tra la tendena staturo de la polica subinspektoro kaj kiel sensone ties brusto pli volbiĝis. Tiam li postulis la vestaron por Andreas kaj "nu la tutan ties posedaĵon". Montriĝis, ke Katharina jam antaŭ longe vendis la gurdon. La nova uniformo ankoraŭ troviĝis ĉe ili. Willi minacis helpe de denunco pro la vendita gurdo, rezultigante, ke oni tuj transdonis al li la uniformon. Li fajfis kaj la ŝoforo, kun kiu li antaŭe fiksis tiun signalon, venis. Willi donis al li la kostumon, diris minace "bonan vesperon" kaj foriris. La subinspektoro certis, ke lin celis vizito de eminentulo.

La uniformo sola ankoraŭ ne sufiĉis. Andreas rakontis, ke li sian krucon ne plu posedas. Willi asertis, ke sen ordeno deĵori en necesejo oni ja tute ne povas. Li konis la sekretajn interligojn de necesejoj kaj patriotismo kaj aprezis la ornamantan efikon de kundekoracia invalido en necesejoj. Sekvamatene li aĉetis en magazeno por ordenoj kvin premiojn, inter ili atelon el ora kaj arĝenta falsbrilaĵo sur bluruĝaj, ruĝ-blanke striitaj kaj skarlataj

rubandoj. Tion Andreas devis alkudri sur la bruston.

Du tagojn poste li debutis en sia deĵoro en la necesejo de Café "Halali".

XVIII

Inter brilaj kahelmuroj kaj muraltaj speguloj, apud blua personpesilo, sidis Andreas Pum. El la akvokranoj super la tri pelvoj el porcelano gutis en regulaj interspacoj, la reeĥa brueto interrompis la blankan, senfine puran kvieton, kaj ŝajnis, ke gutoj de la tempo falis en la spacon de l' eterneco. Mantukoj kuŝis, plate gladitaj kaj ĉiuj tavoligitaj unu sur la alian, sur malgranda tablo, kaj kuboĵ el ŝapo formis artefaritan, altegan kaj tamen certabazan piramidon. En vitra murkesto videblis parfumboteloĵ, ludoĵ kun ĵetkuboĵ, senvaloraĵoĵ el latuno kaj ŝtalo, porpoŝa domenludo kaj magiaĵ malgrandaj ludkartoj. Ĉi tion entute ricevis Willi "komisie". Andreas tion vendis. Por doni al "la neceseĵo" pli allogan impreson, la Café-mastro havigis papagon. Ĝi nomiĝis "Ignatz" kaj havis verdan dorson, kiu viole briletis, ruĝetan ĉapelon kaj blankan faldkolumon. La papago diris "Bonan tagon" kaj "Bonan vesperon" ekzakte tiomfoĵe, kiom ofte sinjoro eniris en la neceseĵon. En la paŭzoĵ, precipe en la posttagmezaj, kiam gastoj ne venis, Andreas konversaciis kun la inteligenta birdo. Ne malmulte ili konfidis al si reciproke, Andreas kaj Ignatz. La papago sidis en la kaĝo, kies pordo estis malferma, tamen ignorante la ideon fari eble ekflugojn pli forajn ol ĝis la murkesto, kiu havis supre en la mezo triangulan gablon. Sur ĝia pinto sidis la papago ofte kaj frotis artiste per ungego sian bekon.

Andreas pensis pri la tempo, en kiu deziris posedi aldone al sia gurdo tian birdon. Li konstatis, ke multaj deziroj malfrue realiĝas, kiam la homo jam iĝis olda kaj sendezirema. Tiu papago havis tre bonan muzikkomprenon. Kiam la orkestro en la kafeĵo ludis, Ignatz komencis fajfi. Ekzistis melodioĵ, amataĵ de ĝi, kaj aliaĵ, kiuj ĝin ekscitis. Se eksonis unu malsimpatia al ĝi, tiam ekstreĉiĝis ĝia plumaro, pufiĝis ĝia ruĝa silka ĉapeto, kaj ĝi komencis furiozi, batante tiom per la flugiloĵ ĉirkaŭ si, ke tio elkirlis buntajn plumojn kaj mallaŭte la sapopiramido vibris. Tio okazis dum la someroĵ de la nacia himno en tute miriga mezuro kaj dum kelkaj militemaj marŝoĵ.

Ŝajnis, ke Ignatz estis pacifisto kaj nepatriota ĝis puninda grado. Pri tio Andreas ĝojis sekrete. Ĉar ankaŭ li ne amis plu la patriotan muzikon, kaj per amara moko li memoris pri tiu tempo, en kiu li eĉ mem disvastigis per sia gurdo ĉi tiujn melodiojn.

Ho jes, Ignatz, ni estas ribelantoj, ni ambaŭ. Bedaŭrinde tio nenion povas helpi al ni. Ĉar mi estas maljuna kriplulo, kaj vi senpotenca birdo, kaj ni ne kapablas ŝanĝi la mondon. Aĥ, se mi rakontus al vi, kiom da doloroj mi dum la vivo spertis, kion mi en la milito suferis kaj en la malliberejo, kiel miaj okuloj en la ĉelo malblindiĝis kaj kiel mi fine decidiĝis fariĝi aganta pagano, ĝis mi antaŭ la spegulo de la antaŭurba trajno devis agnoski, ke mi tro maljuniĝis! Ĉiuj miaj amikoj ankoraŭ vivas, estas fortaj kaj junaj. Sed min baldaŭ vizitos la morto. Kaj dum vi furiozas, batante per viaj flugiloj ĉirkaŭ vi, mi jam kredas aŭdi ĝian muĝadon post mia dorso.

La papago rigardis kontemple, reveme kaj tute trankvile al Andreas. Tiam ĝi komencis fajfi, kvazaŭ ĝi volus gajigi la oldulon. Ĝi fajfis tute arbitre, laŭ propraj sonleĝoj, kvazaŭ konfuzante la notan vicon, kaj ripetis ekstreme akrajn sonojn rapide kaj senpaŭze. Tiam ĝi saltis kun senbrua krio sur la ŝultron de Andreas kaj petis sukeron, kion Andreas partigis en multajn malgrandajn pecojn.

Andreas kadukiĝis. Li aspektis kiel sepdek-jarulo. Lia blanka barbo atingis preskaŭ la buntajn ordenrubandojn sur lia brusto, kiuj donis al li famon de sperta batalestro. Blanka musko kreskegis en liaj oreloj. Li tuis laŭte kaj seke, kaj estis post ĉiu tusatoko tiom febla kiom malsana infano kun febro, kaj ĉiumomente tuj svenonta. Li devis sidi kelkajn minutojn, kaj ĉirkaŭ li cirkulis la speguloj, la puraj kaheloj kaj la lumoj, unue rapide, tiam iom post iom malpli, ĝis ili fine haltis ĉe siaj ordinaraj lokoj. Tiuj strangaj movoj memorigis Andreas pri la lastaj turnoj de karuselo, ĵus aperinta el iam forgesitaj tagoj de lia infanaĝo. Al tio venis la kafeja muziko, obtuzigita, kiel el iu transejo, kaj ŝvelanta nur, kiam gasto malfermis la pordon. Tre ofte Andreas ekdormis. Li sonĝis multe kaj tre klare kaj, vekiginte, tenis ĉiujn sonĝobildojn firme en la memoro. Li baldaŭ ne plu sciis diferencigi inter maldormeco kaj sonĝo, kaj li rigardis sonĝitajn bildojn realaj eventoj kaj tiujn sonĝoj. Li tute ne rimarkis la vizaĝojn de siaj gastoj, li purigis iliajn vestaĵojn, donis al ili sapojn, brosojn

kaj mantukojn kaj ne aŭdis, kiam ili diris ion al li, ne dankis pro iliaj trinkmonoj kaj ne nombris siajn enspezojn. Kaj krome li vendis malmulte da varoj de Willi, li laŭdegis nenion, li ne "interesis", kiel Willi diris, kiam li venis "kontroli". Nur dank'al la longa amikeco li ankoraŭ restis sur sia posteno.

La mallarĝa neceseja fenestro rigardis en la korton, en kies mezo staris kaŝtanarbo, kaj kiu memorigis Andreas pri la kortoj, en kiuj li estis muzikinta. Nun la burĝonoj iĝis pli kaj pli grandaj, ili kreskis rimarkeble, iĝis dikaj kaj krevbrilaj, la birdoj sidis en la branĉoj, pariĝis kaj kverelis. Andreas disŝutis panerojn al ili kaj elrigardis en la printempon, kiu, kaŝita, malabunda kaj tamen riĉa disfaldis tiom multe da grandiozeco, kiom al tio permesis la cirkonstancoj de la pavimita korto kaj la sunradioj, envenantaj nur posttagmeze ĉi tien. Kiam gasto eniris, Andreas devis, pro kaŭzo de deco, fermi la fenestron, ĉar fronte estis kuirejaj fenestroj kaj domservistaro, kiu ŝajne scivole rigardis al la alia flanko.

La loko ĉe la genuo doloris, la remburaĵo de la lambastono jam de longe bezonis renovigon. Ankaŭ la dorso suferigis pro nekларigeblaj kaŭzoj, la humido plifortigis malnovajn reŭmatismajn dolorojn, artritaj tuberoj aperis ĉe la fingroj, kaj prema turmento ŝarĝis la bruston, la koro ŝajne restis dum sekundoj sen frapo kaj Andreas kredis, ke li jam estas morta. Tiam li vekigis, ektimis, ĉar li ankoraŭ vivis, kaj preskaŭ kredis, ke li estas ne plu sur la tero sed en la ĉielo, kies vivo prezentigis kiel la surtera. Nur nova doloro pruvis al li, ke li ankoraŭ estis vivanto. Li sciis nome, ke mortinto ne konas dolorojn, ĉar ili ne havas korpon kaj konsistas nur el anima substanco. Pri demandoj tiuspecaj li cerbumis longajn solecajn horojn, li serĉis klarigon pri la evidenta maljusteco de Dio kaj Liaj eraroj, li pripensis la eblon de sia renaskiĝo kaj komencis elbuŝigi diversajn dezirojn, kvazaŭ starante antaŭ la Eternulo kaj havante la elekton pri la formo, per kiu li deziras rei en la vivon. Li decidigis por la ekzisteblo de revoluciulo, kiu faras kuraĝajn parolojn kaj kovras la landon per murd- kaj brulvundoj por la satisfakcio de la ofendita justeco. Pri tiaj aferoj li legis en la gazetoj, de li ricevitaj el la kafejo. Ili estis plej ofte aperintaj jam antaŭ du tagoj, kaj li eksciis ĉiujn novaĵojn, kiuj jam ne plu estis veraj, kiam li distranĉis la gazetojn al rekt-

anguloj kaj tiujn pendigis laŭ egalaj pakafetoj sur la najloj. Willi nome lin estis klare instrukciinta, ke li ŝparu la multekostan tualet-paperon.

Malfrue en la nokto li revenis hejmen. Nun li loĝis sola en la iama ĉambro de Willi, sed hejme li restis ne volonte sen societo. Tial li petis la permeson kunpreni sian papagon el la kafejo. Li portis la birdon en kaĝo, sur kiun li kloŝis varmigajn kovrilojn, kiam pluvis kaj la noktoj malvarmetis. La papago dormis survoje kaj vekigis nur post la alveno en la ĉambro, sentante la lumon tra la dikaj tegaĵoj. Tiam ĝi parolis kelkajn vortojn, kiel homo kutime en dormo aŭ duondormo, kaj Andreas ĝin trankviligis per bonvola amplena parolo.

Unufoje Andreas vidis nokte enrompiston, sed li diris nenion al la policisto, kiun li renkontis ĉe la sekva stratangulo. La enrompisto prilaboris pordon de magazeno. Andreas kaŝe ĝojis. Ŝajnis al li, ke enrompistoj servas la sekretan celon, ke la justeco resaniĝu en la mondo laŭ perforta maniero. Leginte en gazeto pri murdo, enrompo kaj ŝtelo, li ĝojis. La krimuloj, la "paganoj", nun estis liaj sekretaj amikoj. Ili tion ne sciis. Sed li estis ilia amiko, ilia favoranto. Iam kaj iam li revis, ke persekutita krimulo fuĝis al li en la necesejon. Tiam li gaje helpis lin, por ke li povu rampi tra la fenestro en la korton kaj en la liberon.

Intertempe la tagoj en aprilo iĝis varmaj, pluvogavedaj kaj kiel dolĉaj promesoj. En la noktoj Andreas rimarkis foran odoron alvenantan kune kun la vento, kaj liaj membroj iĝis pli lacaj ol alitempe. Li perdis la intereson pri pluraj aferoj. Eĉ la revizio de lia proceso lin plu ne ĝenis. Li estis maljuna, li estis pli maljuna ol li mem sciis. Jam li palpis la transan vivon, ankoraŭ surtretante la pavimŝtonojn de ĉi tiu tero. La songoj lian animon sendis en la transejon, kie ĝi estis hejme. Fremda ĝi revenis en la tagon.

Liaj doloroj iĝis pli fortaj, lia tusado ankoraŭ pli seka, la paroksismoj plilongigis. Hodiaŭ li forgesis, kio hieraŭ okazis. Li dialogis kun si mem. Li foje-foje forgesis la papagon kaj ektimis dormrompe, kiam ties voĉo neatendite grakis. La morto ĵetis bluan grandan ombron super Andreas.

Jen iutage venis juĝa alvoko. Ĝi estis same kiel la unua provizita per oficeja deca sigelo, blanka aglo, kiu levis siajn flugilojn sur bluruĝa fono, kaj kvankam la adreso nur supraĵe estis skribita, jen pruvo de la multokupita

hasto en la tribunaloj, la skribaĵo ankaŭ elradiis tian decon, kiu enestas en la liberaj je sendokostoj kaj oficialaj leteroj. Andreas legis ĝin. Li ankoraŭfoje estis ordonita je la deka antaŭtagmeze.

Li memoris denove pri siaj suferoj, adaptis al si parolon, preparis sin por granda akuzo. "Altestimata kortumo" li intencis diri. "Mi estas viktimo de ĉi tiuj cirkonstancoj, kiujn vi mem kreis. Kondamnu min. Mi konfesas, ke mi estas ribelulo. Mi estas maljuna, nur mallongan tempon mi ankoraŭ vivos. Sed mi ankaŭ ne timus, eĉ, se mi estus juna." Ankoraŭ plurajn mil belajn kaj kuraĝajn vortojn Andreas elpensis. Li sidis sur sia seĝo, apud la blua personpesilo, kaj flustradis. Sinjoro deziris sapon, kaj li ne aŭdis tion. Ignatz flugis sur lian ŝultron kaj petis sukeron. Andreas ne sentis ĝin.

XIX

De turhorloĝo sonis la deka antaŭtagmeze. Dua horloĝo ripetis la dek batojn. Per longe daŭraj lamentaj tonoj iu tria aniĝis. Multaj turoj, ĉiuj turoj de la granda urbo ŝetis batojn de sonoriloj suben sur la kuprajn tegmentojn.

Andreas staris antaŭ la juĝisto. La alvokon li ŝus estis transdoninta al la tribunala servisto. Tiu portis ĝin per konsekra mieno kaj samaj movoj al la skribisto, piedfingre paŝante, por ke ne interrompiĝu la devota silento pro la peza surtretado de liaj evidente najlitaj botoj, kaj tamen, en lia irmaniero estis io ŝargita de graveco, kiel la parada marŝo de senbrua fantomo. La skribisto estis ege maljuna kaj havis deklivan ŝultron. Krome li ankaŭ ŝajnis miopa. Lia nazo nome preskaŭ tuŝis la tablon, sur kiu li skribis, kaj la pinto de lia plumingo elstaris, kiel ŝlifita lanco, minca kaj minaca super lia kapo. Ĝis nun la juĝdebato ankoraŭ ne komenciĝis, kaj tamen jam glitis la plumo per rapidaj kaj susuraj sonoj sur la papero, kvaŝaŭ pro plenumo de nepra tasko, kopiante la depoziciojn de jarcentoj.

La juĝisto sidis en la mezo inter du blondaj bone nutrataj viroj kun brilaj kalvoj. Andreas tiumomente estus tre volonte scianta, kion la viroj pensas. Ili aspektis kiel ĝemeloj kaj diferencis nur pro tio, ke unu havis lipharojn supren torditajn kaj la alia, al ambaŭ flankoj dekstre kaj maldekstre horizontale, etenditajn. La juĝisto estis senbarba. Li havis senmovan vizaĝon plena de ŝtona majesteco kiel morta imperiestro. La koloro de lia vizaĝo estis griza kiel efloreskinta sabloŝtono. Liaj grandaj grizaj okuloj estis maljunaj kiel la mondo kaj ŝajne rigardis tra la muroj en malproksimajn jarmilojn. Ne arkoforme kurbite, kiel ĉe aliaj homoj, sed horizontale, kiel du longaj nigraj karbostrioj, staris la brovoj ĉe la suba rando de lia akra eĝohava frunto. La maldikaj lipoj estis firme fermitaj, largaj kaj sangoruĝaj. Kun tiaj ecoj tiu vizaĝo certe estus provokinta la impreson de senkora malindulgo, se ĝi ne havus en la mezo de sia forta vira mentono pardoneman

preskaŭ infanecan sulkon. La juĝisto portis nigran talaron kun malgranda eĉ pli nigra velura kolumo.

Sur la altigita tablo inter la du blankaj kaj dikaj sed ne samtiom grandaj kandeloj staris kruco flava kaj kolosa, kvazaŭ per kubo konstruita. Ŝajnis al Andreas, ke tiu kruco konsistis el sapokuboj, kiujn Willi al li transdonis por vendado. Sed tio estis nur eraro unumomenta. Andreas ekkonis, ke kruco neniam povas esti el sapo kaj la pensoj pri io tia ja estas peko.

Li estis scivola pri la evoluo de la juĝdebato. Fojefoje malfermiĝis la pordo. Tiam vidis Andreas sur benko en la koridoro sian edzinon Katharina, la malgrandan Anni, la sinjoron de la trama platformo kaj, strangan maniere, ankaŭ la ruĝvangan komerciston, kiu aĉetis la azenon. Ili estis la atestantoj. Sed kial ne ĉeestis la policisto nek la konduktoro?

La juĝisto voĉlegis la nomon: Andreas Pum, murmuris la faktojn, la konfesiojn, la naskiĝlokon, la profesion okupon. Tiam li plilaŭtigis sian voĉon, kiu estis basa kaj mola, kaj diris kelkajn vortojn, kvazaŭ envolvitajn en veluro. Andreas estis aŭdinta nur la sonadon de la voĉo kaj ne tion, kion la juĝisto diris. Kaj malgraŭ tio li sciis, ke oni lin petis paroli.

Subite li memoris, ke li sur sia brusto ankoraŭ portis la buntajn ordenojn, kiujn Willi estis aĉetinta por li. Rapide li deŝiris ilin, tiujn restigante en la pugno. Sammomente li rimarkis, ke la muroj de la juĝeja salono konsistas el palbluaj kaheloj, similaj al tiuj en la necesejo de la kafejo "Halali". De la plafono, kiu estis verŝajne senlime alta kaj al kiu li ne kuraĝis rigardi, blovis frida vento kun odoro tipa al tiu, venanta el malheligita friz-ejo dum somero.

Li tuis unufoje mallonge kaj ekparolis. Li komencis kun la priskribo de la okazintaĵo sur la platformo. Sed la juĝisto etendis sian longan belan manon, elkreskantan blanka kaj nobla el la vastaj manikoj de la togo, kaj faris rifuzan movon. Samtempe sonis lia voĉo mola kaj malalta, kvankam li la lipojn ne movis. Tio ŝajnis al Andreas tre miriga. Iam kiel knabo li aŭskultis ventroparoliston. Sed ties voĉo sonis kriake. Krome, juĝisto certe ne estas ventroparolisto. Sed kiel malgraŭe eblas, ke li per fermitaj lipoj klare kaj pure parolis la vortojn: "Andreas, kio ŝarĝas cian koron?"

Andreas eĉ pli miris pro la "ci". Sed subite li memoris, ke li ja estas juna knabo. Li portas mallongan pantalonon. Ambaŭ gambojn li havas kaj estas nudpieda. Liaj genuoj estas, pro la lasta falo sur la silikojn de la balastamaso ĉe la rivera bordo, senhăġigitaj, ruġaj kaj brulantaj.

Li meditis ġuste pri tiu stranga metamorfozo, kiam muziko eksonis. Ĝi unuamomente memorigis pri la gurdo. Sed tiam la sonoj ŝveligis, ili muġis, torentis, remergigis en si mem, komencis flustri, foriris kaj aperis denove. Multaj homoj estis en la salono. Ili surgenuigis. La kandeloj apud la du flankoj de la kruco brulis orkolore kaj devastigis odoron je incenso kaj stearino.

Tiumomente Andreas komprenis, ke li estas morta kaj antaŭ la ĉiela juġisto. Kaj knabo li ankaŭ ne estis plu. Li staris sola inter mil genuantoj, ĉeestantaj en la salono. Li faris paŝon antaŭen kaj puŝis la lambastonon suben, sed ġi ne kaŭzis bruon. Andreas ekkonis, ke li staras sur molaj nuboj. Li memoris pri la parolo, kiun li preparis tiam por la tera proceso. Forta kolero kreskis en li, lia vizaġo ardis, kaj lia animo naskis vortojn, kolerajn, purpurajn vortojn, mil, dekmil, milionajn vortojn. Neniam antaŭe li ilin aŭdis, pensis aŭ legis. Profunde en li ili dormis ġis nun, obeigite de povra intelekto, mizere evoluinte sub la kruela kovraġo de la vivo. Nun ili sonis kaj defalis de li kiel floroj de arbo. En la fundo sonis mallaŭte kaj en ceremonia melankolio la muziko. Andreas ġin aŭdis samtempe kun la susurado de sia propra parolo:

"El mia pia humileco mi vekigis al ruġa, ribela spito. Mi deziras nei Vin, dio, se mi estus vivanta kaj ne starus antaŭ Vi. Sed tial, ĉar mi Vin vidas per miaj okuloj kaj aŭdas per miaj oreloj, mi devas fari ion pli malbonan ol nei Vin: mi devas Vin blasfemi! Milionojn similajn al mi Vi generas el Via fekunda sencececo, ili pasigas la infankaj junagŝon pie kaj kaŭre, suferas la batojn en Via nomo, salutas imperiestrojn, reġojn kaj registarojn en Via nomo, toleras, ke kugloj pusajn vundojn boras en iliajn korpojn kaj tri-egaj bajonetoj iliajn korojn pikas, aŭ ili trenas sin sub la jugo de Viaj laborplenaj tagoj, dimanĉaj morozaj festoj enkadrigas per malkara brilo iliajn terurajn semajnojn, ili malsatas kaj silentas, iliaj infanoj malgrasigas, iliaj edzinoj iġas hipokritaj kaj malbelaj, leġoj kreskegas kiel insidaj volvoplantoj sur iliaj vojoj, iliaj piedoj interplektiġas en la densa arbustaġo fare de Viaj ordonoj, ili falas kaj petegas al Vi, kaj Vi ne levas ilin. Viaj blankaj

manoj devus esti ruĝaj. Via ŝtoneca vizaĝo deformita, Via rekta korpo kurbigita, kiel la korpoj de miaj kamaradoj kun pafoj en la spina medolo. Aliaj, kiujn vi amas kaj nutras, rajtas nin skurĝi, kaj eĉ ne devas glori Vin. De ili Vi ne postulas preĝojn kaj oferojn, humilon kaj honeston, por ke ili trompu nin. Ni portegas la ŝarĝojn de ilia riĉo kaj de iliaj korpoj, iliaj pekoj kaj punoj, ni prenas sur nin ilian doloron kaj pentofaron, ilian kulpon kaj iliajn krimojn, ni mortigas nin mem, ili tion bezonas nur deziri; ili volas vidi kriplulojn, kaj ni ekiras tien kaj perdas niajn gambojn el la artikoj; ili volas vidi blindulojn, kaj ni lasas blindigi nin; ili volas, ke ni ilin ne aŭdu, do ni iĝas surdaj; ili solaj volas gustumi kaj flari, kaj ni ĵetegas grenadojn kontraŭ niajn nazojn kaj buŝojn; ili solaj volas manĝi, kaj ni muelas la grenon. Kaj Vi ekzistas, kaj ne intervenas? Kontraŭ Vi mi ribelas, ne kontraŭ tiuj. Vi estas kulpa, ne Viaj arestistoj. Milionoj da mondoj estas la Viaj, kaj Vi ne scias kion fari? Kiel senpotenca estas Via ĉiopotenco? Miliardojn da aferoj vi ordigas, kaj eraras en la unuopaj? Kia dio Vi estas! Ĉu Via krueleco estas saĝo, kiun ni ne komprenas - tiel neperfekte Vi kreis nin! Se suferi ni devas, kial ni ĉiuj ne suferas same? Se Via bono ne sufiĉas por ĉiuj, disdonu ĝin juste! Ĉu mi estas pekinto - fari mi volis bonon! Kial Vi ne permesis al mi manĝigi la malgrandajn birdojn? Se Vi mem ilin manĝigas, Vi manĝigas ilin malbone. Aĥ, mi tre ŝatus, ke ankoraŭ nun mi povus nei Vin. Vi ekzistas, unika, ĉiopotenca, senindulga, la plej supera instanco, poreterne - kaj ne eblas esperi, ke Vin trafos puno, ke Vin la morto disblovos al nubo, ke Via koro vekigōs. Vian gracon mi ne volas! Sendu min en la inferon!

La lastajn frazojn kantis Andreas laŭ nekonata, fremda, belega melodio. Ankoraŭ nun la muziko sonoris, kiel orkestraĵo el mil suspiroj.

Jen la juĝisto levis la manon, kaj lia voĉo sonis: "Ĉu vi volas esti servisto en muzeo aŭ gardisto en verda parko, aŭ posedi malgrandan tabakdebitejon ĉe la strat-angulo?"

"Mi volas en la inferon!" respondis Andreas.

Subite troviĝis Muli, la malgranda azeno, apud Andreas kaj kondukis la gurdon, kiu eligis tonojn, kvankam la krankon neniu movis. La papago Ignatz staris sur la ŝultro de Andreas. La juĝisto levigis, li iĝis pli granda kaj pli kaj pli, lia griza vizaĝo eklumis blanka, liaj ruĝaj lipoj malfermigis kaj ridetis. Andreas komencis plori. Li ne

sciis, ĉu li estas en la ĉielo aŭ en la infero.

Oni fermis la sinjoran necesejon en la kafejo. "Halali" kaj irigis la sinjorojn dum tiu vespero en la daman parton. Post ol ĉiuj gastoj foriris, oni delokis la kadavron de Andreas Pum. Ĝi venis post kelkaj tagoj, pro nuntempa manko de kadavroj kaj kvankam ĝi havis nur unu kompletan gambon, en la anatomian instituton kaj ricevis, dank'al mistera hazardo, la numeron 73, la saman, kiun la arestito Andreas Pum portis. Antaŭ ol oni enigis la kadavron en la dissekcejon venis Willi por adiaŭi. Ĝus li volis ekplori. Sed tiam li rapide memoris la kanton, kiun li kutime kantis.

Kaj fajfante li ekiris serĉi por la necesejo novan oldulon.

FINO